


# evangeliaj kajeroj

## EKOLOGIO



**2**  
1987

kiel  
ni  
adminstras  
la teron

## EVANGELIAJ KAJEROJ

*internacia kristana revuo en Esperanto*

*listo de la planataj sekvantaj numeroj*

- 6 UNUECO, por ke ili ĉiuj estu unu
- 7 PACO, feliĉaj estas la pacigantoj
- 8 JUSTECO

Ni daŭre serĉas kunlaborantojn. Se vi deziras kunlabori, vi povas peti instrukciojn. La artikoloj estas petataj, sed vi povas libere sendi mallongajn kontribuojn, recenzojn, noticojn, kiuj iel rilatus al la temo. Vi ankaŭ povas fari intervjuojn, poste tradukitajn.

La aŭtoroj respondecas pri la enhavo de la propra artikolo.

Redakcio, administracio : Philippe Cousson, Rue de Pré-Ventenet, 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio ;  
tel : 49 46 80 21, el eksterlande 33 + 49 46 80 21.

*Directeur de la publication : M. Philippe Cousson.*  
*Dépôt légal de la première édition : octobre 1987.*  
*Editeur : Philippe Cousson, Nouaillé-Maupertuis.*  
*Imprimé par : Michel Brun SARL, Poitiers (12 rue des Frères Lumière, Beaulieu, BP 252, 86006 Poitiers Cedex).*

## EVANGELIAJ KAJEROJ

Unua numero, tio estas komenco, sed dua numero, tio estas daŭro. Per la dua numero, revuo vere komencas sian ekzistadon (se vi ankoraŭ ne posedas la unuan, petu ĝin).

Same, kiel la unua, la dua estas tre varia. En ĝi vi trovos sciencajn, bibliajn, sociologiajn, politikajn artikolojn, de analiza al spekulativa vidpunkto, de eseo al prediko.

Vi povos konstati, ke estas eble aliri al la naturo tre diversmaniere. Oni povas esplori ĝin kiel stud-objekton, admiri ĝin kiel kreaĵon de Dio, protekti ĝin kiel loĝlokon de la homoj.

Mia espero estas, ke post tiu legado, kiam vi rigardos la belan naturon, viaj pensoj ne plu estos samaj, viaj okuloj vidos aferojn, kiujn vi ne rimarkis, viaj oreloj aŭdos alvokojn, al kiuj vi estis surda.



Karol BAKLARZ, polo, tradukisto el la angla por la pola revuo *Swit* (Tagiĝo) de la Asocio de Bibliaj Studantoj.

Gerrit BERVELING (*Berit*), nederlandano, naskita en 1944. Fakulo pri klasika filologio latina kaj helena, teologo, esperantisto de post 1972. Pastoro en la Remonstranta Eklezio. Kunlaboras en diversaj revuoj. Eldonas la serion Voĉoj Kristanaj.

Philippe COUSSON (*filip kusŝ*), franco, naskita en 1953, mez-lerneja bibliotekisto, vic-prezidanto de K.E.L.I., esperantisto de 1975. Redaktoro de ĉi tiu revuo. Presbitero en lia reformita paroĥo.

Jacques ELLUL (*ĵak elŭl*), franco, naskita en 1912, doktoro pri juro. Li ne estas esperantisto. Aktivis en la Rezistado (1940-1945). Estis membro de la nacia konsilantaro de la Franca Reformita Eklezio. Fama verkisto pri sociologio kaj teologio.

Otto GESSNER, germano, naskita en 1953, studis biologion, kemion kaj teologion. Gimnazia instruisto. Verkis por la religia instruado en Bavarujo.

Jeremi GISHRON (*ĝišron*), israelano, naskita en Svedujo en 1948, migris al Israelo en 1972. Studis ekonomion, geografion kaj religion. Doktorigis pri Religiaj trajtoj en Esperanto. Aktivas en Eldonejo Sivron.

Mervyn C. JACKSON (*mervin ĵakson*), anglo, naskita en 1939, studis fizikon kaj meteologion. Laboris en la Brita Meteologia Servo. Laika predikanto en la Unuiĝinta Reformita Eklezio. Nun instruas fizikon, matematikon kaj geografion.

KNÁVER Zoltán, hungaro, naskita en 1923. Studis teologion en Budapeŝto. Pastoro de la reformita Eklezio. La familianoj ankaŭ parolas Esperanton.

Jelly KOOPMANS-SCHOTANUS, nederlandano, 67-jara, edzino de Wim Koopmans, konata porpaca laboranto kaj esperantisto. Ŝi predikas ĉu nacilingve, ĉu en Esperanto. Ŝi verkis Preĝo por ĉiu tago, tradukita germanen, *Bete mit mir*.

Maire MULLARNEY (*milarni*), irlandano, 65-jara. Estis flegistino, interesiĝis pri filozofio kaj teologio. Esperantistino de 1980. Nun aktiva en la partio La Verduloj.

Antoni Paweł TABACKI, polo, naskita en 1932, studis pedagogion, biologion. Doktorigis pri hidrobiologio kaj zoologio. Laboras en la Silezia Universitato en Katowice. Esperantistiĝis en 1978.

## LA NATURO EN LA BIBLIO - AKVO

La Biblio ne estas lernolibro pri naturo, sed pri saviĝo. Tamen ni trovas en ĝi multajn priskribojn pri la naturaj fenomenoj, kiujn la antikvaj verkistoj uzis, por klarigi, kompari kaj reliefigi aliajn esencojn. Kvankam la naturproblemoj estas en la Biblio marĝenaj, tamen ili estas ĉiam tute korektaj, kompare al la nuntempa scio pri la naturo. Sed ne ĉiam tiel estis, ĉar la scienco longe refaris la malfruigon rilate al la Biblio, ĝis kiam ĝi scipovis ĝuste interpreti la cititajn en la Sankta Skribo naturajn faktojn. Ekz-e antaŭ ol oni malkovris kaj priskribis tiajn naturajn fenomenojn, kiel la sfereco de la globo aŭ profundeco de maroj kaj oceanoj, en la Biblio ĉio ĉi jam de longe estis tute korekte priskribita. Same estis kun pluraj nocioj kaj faktoj, kiujn la scienco, en sia malscio, longe konsideris kiel la tiel nomatajn Bibliajn erarojn. Legante la Biblion, homo malgraŭvole devas admiri la antikvajn verkistojn pro tio, ke ili priskribis tiom da naturaj faktoj neniam erariĝinte. Ankaŭ ĉi tiun kapablecon de la verkistoj la Biblio plene klarigas per la vortoj de la apostolo Petro :

"Ĉar neniam profetaĵo estas alportita per homa volo ; sed homoj, movataj de la Sankta Spirito, parolis laŭ Dio."  
(2 Pet 1:21)

Jam la unuaj paĝoj de la Biblio, sur kiuj ni trovas priskribon de la mondkreado, enhavas faktojn ligitajn al la naturo. Ni legas tie, kiel Dio kreis la tiel nomatan naturan medion ; kiel Li dividis la ĉielon de la tero, lumon de la mallumo, kiel Li formis kontinentojn kaj marojn, kaj kiel Li alvokis al la vivo plantojn kaj bestojn. Ĉio ĉi tio okazis en la ejo, kiun Dio antaŭpreparis por la homo - Lia lasta, plej perfekta kreitaĵo,

"por ke li prilaboru ĝin kaj gardu ĝin" (Gen 2:15b).

Ni ofte substrekas, ke homo, kiel la lasta inter ĉiuj kreitaĵoj, estas la plej perfekta kaj plej inteligenta vivanta kreitaĵo. Valoras aldoni, ke homo estas ankaŭ la plej minacita kreitaĵo. Nome, oni povas imagi la naturan medion sen homo, sed homon ekster la natura medio oni tute ne povas imagi, ĉar homo estas plene dependa de la naturo. Dokumentas ĉi tion ne nur la du unuaj bibliaj ĉapitroj, sed ĉiuj ĝiaj paĝoj, sur kiuj ni ne nur trovas emociigajn priskribojn de homaj luktoj kun la potenco de sovaĝa naturo, sed ankaŭ eksterordinare belajn ekzemplojn de la harmonio kaj dependeco de la naturaj fenomenoj kun la vivestaĵoj, inter kiuj troviĝas ankaŭ la homo.

Priparolante la naturan medion oni devas klare ekkonscii, ke ĝi konsistas el nevivaj faktoroj, al kiuj apartenas, inter aliaj, akvo, grundo, temperaturo, lumo..., kaj el vivaj faktoroj, ĝenerale dirite, el vivestaĵoj.

Celante respondi la demandon : kion diras la Biblio pri la homa medio, sufiĉas analizi kelkajn el la supre menciitaj medi-faktoroj. Sube estas priparolita la akvo, unu el la plej gravaj nevivaj ekologiaj faktoroj. Oni povus same verki pri plantoj kaj bestoj, la vivaj ekologiaj faktoroj.

#### Akvo

Laŭ la Biblio, la akvo estas Dia donaco, pro kiu oni devas danki, kiel instruas la aŭtoro de la 147-a psalmo :

"Kantu al la Eternulo gloradon,

Muziku al nia Dio per harpo.

Li kovras la ĉielon per nuboj,

Pretigas por la tero pluvon,

Kreskigas sur la montoj herbon." (Psa 147:7-8)

Estas sciate, ke la akvo senĉese cirkulas kaj malgraŭ ĉio ne perdiĝas en la vasta naturo, sed ŝanĝas nur siajn formojn en diversaj fazoj. En la akvo-cirkulo estas tri fazoj : vaporiĝo, kondensiĝo kaj precipitaĵo (atmosfera akvaĵo).

Dank'al la suna varmeco milionoj da tunoj da akvo vaporiĝas ĉiutage el la oceanoj, el la maroj kaj la riveroj. Tiamaniere la surteraj akvujoj garantias senĉesan fluon de la akva vaporo, kiu supreniras de la tersurfaco en la aeron. Tiun ĉi fluon signife kompletigas la plantaro, kiu en la procezo de transpirado eligas multe da akva vaporo. Ekz-e mezgranda arbo povas en la jaro elvaporigi 15 000 - 20 000 litrojn da akvo.

Rezulte de la kondensado, kiu okazas en la aero kaŭze de la malaltiĝo de la temperaturo, formiĝas nuboj el la akvaj vaporoj. Kiam la nuboj fariĝas plenaj, tiam sekvas la gutiĝo de la vaporo kaj komenciĝas pluvi. La procezo de la nubofarado en la naturo estas simile priskribita en la Biblio :

"Kiam la nuboj pleniĝos, ili verŝos pluvon sur la teron."

(Pre 11:3a)

La pluvakvo kolektiĝas en la tiel nomataj grundaj akvoj. Tamen kiam la grundaj akvujoj fariĝas plenplenaj, tiam la superflua pluvakvo fluas al la maroj kaj oceanoj, de kie ili denove vaporiĝas. Tiamaniere la akvocirkulo fermiĝas. Ĝenerale oni asertas, ke la maroj estas la fontoj de la pluvo. Same ni legas en la libro de

Amos 9:6b :

"Li vokas la akvon de la maro kaj verŝas ĝin sur la teron. Lia nomo estas Eternulo."

La supre priskribita akvocirkulo estis science finesplorita en la 16-a kaj 17-a jarcentoj. Pierre Perrault (*pjer' pero*) kaj Edme Mariotte (*edm' marjot'*) dokumentis ĉi tion eksperimente. Ankaŭ la fama astronomo Edmund Halley (*hali*) esploris ĉi tiun problemon kaj konstatis, ke ekzistas precize difinita ekvilibro inter la vaporiĝo de la akvo sur la tero kaj la sumo de la atmosfera akvaĵo. Tiu ĉi ekvilibro montras, ke la ambaŭ fazoj estas en la naturo egalvaloraj. Kvankam la sciencistoj, kiel la unuaj pruvis eksperimente, ke ekzistas en la naturo fermita akvocirkulo, tamen la Biblio jam antaŭ jarmiloj jene informis pri ĉi tiu natura fenomeno :

"Ĉiuj riveroj iras al la maro, sed la maro ne pleniĝas ; al la loko al kiu la riveroj alfluas, ili alfluas ĉiam denove." (Pre 1:7) (rigardu ankaŭ Psa 135:7 kaj Jer 10:13)

La esploroj de Pierre Perrault kaj Edme Mariotte korektis ankaŭ alian eraran imagon pri la akvo en la naturo. Nome, oni asertis, ke la grundo ne estas tralasiva kaj pro tio la pluvakvo ne penetras en la pli profundaj tavoloj de la grundo. Tiuj ĉi esploristoj konstatis, ke ĉiuj grundaj akvoj devenas ĝuste de la pluvakvo. La Biblio ankaŭ ĉi tiun fakton notis pli frue per jenaj vortoj :

"Ĉar kiel la pluvo kaj la neĝo falas de la ĉielo kaj ne revenas tien, sed malsoifigas la teron kaj naskigas kaj produktigas ĝin kaj donas semon al la semanto kaj panon al la manĝanto." (Jes 55:10)

Akvo, kiu en sia cirkulo atingas la atmosferon, revenas sur la teron en pluraj formoj, inter kiuj oni povas elekti la jenajn : pluvo, roso, hajlo, neĝo, pruĵo kaj ofte ankaŭ la nuboj froatas la grundon. Ĉiujn ĉi akvoformojn mencias la Biblio. Sube estas cititaj kelkaj Biblifragmentoj, kiuj rilatas al la atmosfera akvaĵo-formoj.

#### Nuboj.

Jenaj fragmentoj el la libro de Ijob (38:34-37 ; 36:29) montras al ni, kiel manifestiĝas la Dia saĝeco en la nuboj :

"Ĉu vi povas levi al la nubo vian voĉon, ke abundo da akvo vin kovru ? Ĉu vi povas sendi fulmojn, ke ili iru kaj diru al vi : Jen ni estas ? Kiu donas al nuboj aŭguran signifon, aŭ al la ĉiela brulruĝo profetan esprimon ? Kiu estas tiel saĝa, ke li povu kalkuli la nubojn ? Kaj kiu elverŝas la felsakojn de la ĉielo ?"

"Kaj kiam Li intencas etendi la nubojn kiel tapiŝojn de Sia tendo."

Por kompreni kaj esplori ĉi tion, kion mencias Ijob, la nuntempa homo elsendadas plurajn meteorologiajn satelitojn. Dank'al la esploroj, sciencistoj opinias, ke la nombro de la grandaj ŝtorm-nuboj, kiuj senĉese cirkulas ĉirkaŭ la tero, estas konstanta kaj troviĝas en iuspeca ekvilibro. Dank'al la ŝtormoj kaj la uraganoj miksataj estas grandegaj aermasoj, kio faciligas la nuligadon de la elektra tensio, formiĝanta inter la tero kaj ĝia atmosfero. La aer-miksado ebligas ankaŭ la disiĝon de la oksigeno en la tuta atmosfero kaj la forportadon de la aeraj malpuraĵoj. Laŭ sciencistoj, la ekvilibra stato, en kiu troviĝas nuboj estas ebla dank'al du grandaj fortoj kontraŭdirektaj. Unu el ili estas la gravito, kiu tiras la nubojn sur la teron kaj la dua estas la fluo de la varma aero, kiu senĉese puŝas la nubojn for de la tero. La demando, kiun ni trovas en la libro de Ijob, certe concernas ĉi tiun problemon :  
 "Ĉu vi scias ion pri la ŝvebado de nuboj, pri la mirakloj de Tiu, kiu estas la plej perfekta en la sciado. (Ijob 37:16)

#### Pluvo

En la malseka klimato, kiu regas en Palestino, pluvo estas la plej valoro media faktoro. En tiu ĉi lando, konataj estas tri pluv-periodoj : la tiel nomataj frua, vintra kaj malfrua pluvoj. Post la somero, fine de septembro kaj komence de oktobro komencas la periodo de frua pluvo. Decembro kaj januaro estas monatoj, en kiuj pluvas la vintra pluvo. Ĝi povas eĉ en Palestino iomete turmenti la loĝantaron, kiam fariĝas tro longdaŭra. Eble ĉi tiun pluvon komparis Salomono al kverelema virino (Sen 27:15). La periodo de la malfrua pluvo okazas en marto kaj aprilo. Tiu ĉi pluvo estas en Palestino precipe grava por la vegetado de la kulturplantoj. Pro tio oni opiniis, ke ĉi tiu pluvo estis donaco de Dio En la libro de Readmono ni trovas ankaŭ vortojn, kiuj rilatas al la kondiĉoj, de kiuj dependas la pluvo en la ĝustaj periodoj :

"Kaj se vi obeos Miajn ordonojn, kiujn Mi ordonas al vi hodiaŭ, amante la Eternulon, vian Dion, kaj servante al Li per via tuta koro kaj per via tuta animo : tiam Mi donos al via lando pluvon ĝustatempe, fruan kaj malfruan ; kaj vi kolektos vian grenon kaj vian moston kaj vian oleon. (Rea 11:13-14 ; kp. Joel 2:23-24)

#### Roso

Roso estas formo de akvo, kiu troviĝas en la aero. La varma aero povas pli multe da akvo alpreni ol la malvarma. Roso formiĝas, kiam varma kaj malseka aero malvarmiĝas ĝis punkto de saturiĝo, en kiu la akva vaporo komencas koncentriĝi (kondensiĝi). Roso do estas nenio alia ol koncentriĝinta akva vaporo, kiu sedimentas sur la surfacoj de diversaj objektoj. En Palestino roso estas precipe grava en la periodo de rikolto, kiam ĝi forte influas la kreskon kaj maturiĝon de fruktoj. Pro tio ĝi estas simbolo de la precipa Dia beno. Kiam Isaak benis Jakobon, tiam ankaŭ deziris al li roson.  
 "Dio donu al vi roson ĉielan" (Gen 27:28),  
 tiel taksis la beno.

#### Hajlo

Hajlo estas kontraŭo de la roso, ĉar roso pligrandigas la rikolton kaj hajlo male, havas ruinigan forton. Ĝi naskiĝas en la nuboj de kumulus-nimbusa tipo, en kiuj troviĝas akvo kaj glaciaj kristaletoj. Probable ambaŭ elementoj estas bezonataj, por ke la hajleroj povu formiĝi. En Palestino hajlo estas nenio eksterordinara, precipe en la vintra pluvperiodo. La Biblio kelkfoje mencias hajlon, kaj hajlerojn lige al la Dia juĝo. Ekz-e en la libro de Josuo (10:11) ni trovas kortuŝan priskribon de hajl-uragano, kiu mortigis pli multe da homoj ol la glavoj de la Izraelidoj. Unu el la tiel nomataj egiptaj plagoj estis ankaŭ hajlo (Ĝl 9:23-26). Dio ofte uzadis ĉi tiun naturan fenomenon kaj komparante la tempon, la lokon kaj la abundon, en kiu ĝi estis uzita, tiam ni vidas veran miraklon. La psalmisto klare diris, en kies manoj estas la potenco de la naturaj fortoj :

"Per hajlo Li batis iliajn vinberojn,  
 Kaj iliajn sikomorojn per frosto ;  
 Li elmetis al hajlo iliajn brutojn,  
 Kaj iliajn paŝtataron al fulmo." (Psa 78:47-48)  
 Ankaŭ en la Apokalipso hajlo estas menciita kiel Dia puno, en kies tempo la hajleroj havos eksterordinaran pezon, preskaŭ 50-kg-an :  
 "Kaj granda hajlo, peza kvazaŭ po unu talento, falis el la ĉielo sur la homojn ; kaj la homoj blasfemis Dion pro la plago de la hajlo ; ĉar ĝia plago estas treege granda."  
 (Apo 16:21)

#### Prujno

Prujno estas ankaŭ formo de akvo. Ĝi formiĝas, kiam en serena nokto la temperaturo de la grundo malaltiĝas sub la punkton de la glaciĝo. Tiam formiĝas glacieroj sur objektoj. La glacieroj

komponiĝas en belaj formoj, sed neniam egale. La aŭtoro de la psalmo 147 komparis prujnon al cindro :

"Li donas neĝon kiel lanon,  
Li ŝatas prujnon kiel cindron." (Psa 147:16)

Neĝo

Neĝo estas la lasta el la preparolataj akvoformoj. Akva vaporo kristaliĝas je neĝo, kiam la temperaturo en la nuboj malaltiĝas sub la glaciopunkton. Kiam ankaŭ la temperaturo de la aero inter nuboj kaj grundo troviĝas sub la nulo, tio estas sub la glaciopunkto, tiam neĝas. Konata estas la beleco de la neĝokristaloj. Dum la procezo de glaciigo de la akvo, la atomoj kolektiĝas ĉiam en sesangulaj sistemoj, kaj malgraŭ la sama konstruomaniero la neĝeroj estas tute malegalaj. Neĝo estas en la Biblio menciata, kiam bezonata estas komparo al pureco aŭ justeco. Ekz-e :

"Senpekigu min per hizopo, kaj mi fariĝos pura ; Lavu min, kaj mi estos pli blanka ol neĝo." (Psa 51:9,7 ; kp. Jes 1:18)

Neĝo estas ankaŭ citita en la Biblio kiel kvazaŭ armilo. Hajlo kaj neĝo estas priskribitaj kiel armiloj de la Dia juĝo. Eĉ nia historio konfirmas ĉi tion tute klare. Sufiĉas rememori la malvenkojn de la napoleona kaj hitlera armeoj sur la malvarmaj ebenaĵoj de Rusujo. Jena fragmento el la libro de Ijob koncernas la menciitan ekzemplon :

"Ĉu vi venis al la devenejo de la neĝo, kaj ĉu vi vidis la devenejon de la hajlo, kiujn mi konservas por la tempo de suferado, por la tempo de batalo kaj milito." (38:22-23)

Ĉi-supra, nur supraĵa, trarigardo de ĉi tio, kion la Biblio diras pri akvo, ne estas kompleta. Tamen, ĝi klare montras, ke la faktoj priskribitaj en la Libro de Saviĝo, estas enradikitaj en la realoj de la natura medio, kies parto estas ankaŭ homo.

Finante la konsideron pri akvo, no povas ekstari ĉe la jakoba puto, por aŭskulti la interparolon de Jesuo kun la samarianino (Joh 4:6-15), kaj poste provi respondi je la demando : Ĉu mi ĉerpas akvon por la propra vivo el ĝusta fonto ?

Antoni Paweł Tabacki, Pollando

HOMA RESPONDECO PRI LA KLIMATO ?

Noa kaj granda klimat-ŝanĝo

Antaŭ dek mil jaroj okazis granda ŝanĝo al la klimato de la mondo, kiu multe influis la homaron. Okazis gravega diluvo kaj inundo kaj multaj homoj pereis. Urboj kaj landoj malaperis sub la akvo.

Preskaŭ ĉiuj kulturoj kaj religioj en la mondo scias pri tiu ege grava evento en la historio. Ĝi certe estas ne nur parabolo. Tamen poste, homo raciigis ĝin. Oni rimarkis, ke antaŭ la diluvo multaj homoj pekis, kaj malbone kondutis al aliaj homoj kaj al Dio. Post la granda inundo homoj devis rekomenci la vivon, espereble pli bonkondutaj, pli religiaj. Kaj Dio agnoskas tion. Li uzas la ĉielarkon dum pluvo por montri al homo, ke Li ne permesos novan inondon por forpreni tiom da civilizacio.

Klimatologoj nun povas klarigi tion, kio okazis. Antaŭ ĉirkaŭ 10 000 jaroj, la klimato de la mondo rapide plivarmiĝis kaj la glaci-epoko subite finiĝis. Tio sufiĉis por fandi grandajn kvantojn da neĝo kaj glacio en polusaj regionoj kaj en la montaroj. Hodiaŭ ankoraŭ restas granda kvanto da neĝo kaj glacio en la mondo, kaj nur malgranda ŝanĝo de temperaturo fandos pli da glacio.

Antaŭ 10 000 jaroj la meza temperaturo pliiĝis je kelkaj gradoj. Pro tio la akvo en ĉiuj maroj kaj oceanoj pliprofundiĝis kaj la marniveletoj kreskis je kelkaj dek metroj. La plejparto de la civilizacioj vivis ĉe la marbordoj kaj en malaltaj valoj, speciale la valoj de Induso kaj Eŭfrato. Tie loĝis la prapatroj de Abraham, kaj ĉio malaperis sub la akvo. Samtempe pro la pli granda areo de akvo anstataŭ tero, konsekvence multe pluis. Parenteze, antaŭnelonge, en komputilaj prognozoj de la vetero, ne-intenca inundo de parto de Saharo simile kaŭzis grandajn pluvojn en la dezerto.

Verŝajne la fandiĝo de la glacio daŭris kelkajn jarojn aŭ jarcentojn. Sed Noa rimarkis tion kaj konstruis grandan boaton, ĉar li estis lerta kaj konis Dion.

Eltrovoj de klimatologoj

Post tiu granda varmiĝo de la tero kun pli altaj marniveletoj, la klimato poste estis ĝenerale pli konstanta, sed iom pli malvarma dum la lastaj tri mil jaroj. Antaŭ nur 50 jaroj sciencistoj opiniis, ke la klimato estas konstanta, ĉiam la sama. Sed nun ni scias, ke,

## HOMA RESPONDECO PRI LA KLIMATO ?

kontraŭe, la klimato ĉiam ŝanceliĝas, iom pli varma, pli seka, pli malvarma, pli malseka, ktp. Nun homoj studas la historion de la klimato de la mondo, kaj provas eltrovi la pasintajn, kaj prognozi la estontajn klimatojn.

Homoj komencis mezuri per instrumentoj la veteron en Eŭropo antaŭ 300 jaroj, kaj tio donas al ni multon da informoj pri la klimato en Eŭropo dum tiu tempo, speciale dum la lastaj 150 jaroj.

Sed jam antaŭ 300 jaroj homoj havis grandan intereson pri la vetero kaj notis faktojn kaj opiniojn pri la vetero de la jaro, ĉu la pluvo estas pli aŭ malpli ol kutime, ĉu la rikolto estas pli bona ol kutime, ĉu la vintro estas pli severa ol kutime, ktp. Homoj ofte notas datojn por la unuaj floroj kaj fruktoj kiuj aperas ĉiun jaron. Ekz-e, mi persone notas ĉiun jaron la daton por la unua frago en mia ĝardeno : la plej frua (31-an de majo 1982), la plej malfrua (20-an de junio 1979). Kun tiu informo mi povas kompari la daton de la unua frago ĉijara, 7-an de junio 1987, kun aliaj jaroj.

Do, antaŭ la 17-a jarcento, klimatologoj povas diveni ion pri la klimato per tiu speco de informo. Krome, homoj studis la frontojn de glaci-riveroj en Eŭropo dum jarcentoj, kaj konsekvence la klimaton. Pro tio klimatologoj povas desegni diagramojn por la klimato dum 900 jaroj (Fig. 1).

Krome, sciencistoj studas por alimaniere diveni pasintajn klimatojn de la mondo. Ekz-e per arb-ringoj, poleno en marfundaĵoj, radio-aktivaj izotopoj. Pro tio ni povas konstrui diagramon pri la klimato dum la tempo post la lasta galci-epoko kun la grandaj inundoj. Tion montras Fig. 2.

Tiujn diagramojn mi elprenis el la libro, *Vetero kaj klimato de la mondo*, 1987, kiu ĵus aperis en Esperanto-traduko de Kris Long.

Nova vidpunkto ekster la mondo

En 1987 kunvenis, la unuan fojon en la tutmonda historio, gravaj homoj el ĉiuj kontinentoj por diskuti la mondon, la ekologion, kaj la efikon de la homaro sur la mondo. La konkluda raporto, *From one earth to one world*, 1987 (De unu tero al unu mondo) diskutas la homan respondecon pri la klimato. La raporto komentas, ke nur meze de la 20-a jarcento ni homoj unue vidis la planedon de ekstere. Verŝajne tio multe influas niajn pensmanierojn, same kiel la eltrovo de Kopernik en la 16-a jarcento. Interese, ke el la kosmo oni rimarkas oceanojn, verdaĵojn, formaciojn de nuboj, sed oni ne rimarkas homajn aferojn aŭ konstruaĵojn. Tamen la homaro multe minacas la estontecon de nia mondo.

## EVANGELIAJ KAJEROJ




Fig. 1 Tutjaraj mezaj eŭropaj temperaturoj post 1066 (laŭ H. H. Lamb)




Fig. 2 Temperaturoj dum la holoceno (laŭ J. Imbrie kaj K. P. Imbrie)

Klimataj ŝanĝoj kaj polucioj

Dum la pasintaj kelkaj jaroj la homaro multe diskutas klimatologiajn aspektojn kaj konsekvencojn, speciale pri polucioj en la atmosfero. Ekz-e, gravan intereson vekis la grava sekeco de la afrikaj Sahel-regionoj, kiu kaŭzis gravajn malsatojn kaj mortojn en kelkaj landoj dum jaroj. Samtempe oni diskutas la influojn de kemiaĵoj (ekz-e aerosoloj) sur la ozona tavolo, la konsekvencojn de nukleaj provoj, aŭ akcidentoj, aŭ nuklea milito, la bruligon de karbo, la detruon de tropikaj arbaroj, ktp.


Ĉiun jaron pliaj 6 milionoj da hektaroj de grundo iĝas senvalora dezerto, pliaj 11 milionoj da hektaroj de arbaro estas detruitaj. La bruligo de karbo sendas poluciojn en la atmosferon por fali en aliajn lokojn kaj landojn, kaj pli acidiĝas la grundo. Samtempe ĝi aldonas CO<sub>2</sub> (karbon-dioksido) al la atmosfero. La normala funkcio de CO<sub>2</sub> en la atmosfero estas obstrukcii elirantan longondan radiadon de la tero (vidu fig. 3) kaj multe influas la mezajn temperaturojn en la mondo. Oni nun timas, ke pli da CO<sub>2</sub> havos gravan efikon sur la temperaturoj de la mondo, kiuj verŝajne iom altiĝas. Konsekvence glacioj fandiĝos, marniveloj altiĝos denove, kaj nacioj krizos.

Samtempe industriaj gasoj minacas la ozon-tavolojn de la alta atmosfero, kio kaŭzus pli da kanceraj homoj kaj bestoj. La ozono forprenas la danĝeran kurtondan radiadon de la suno, kaj la perdo de ozono signifas multe pli da danĝera radiado sur la surfaco de la mondo.

Oni ankaŭ multe diskutas la efikon de nuklea vintro al la mondo, kaj oni nun opinias, ke nur malgranda nuklea milito kaŭzus morton al multaj plantoj, bestoj kaj konsekvence al homoj. La malgranda akcidento en Ĉernobil, Ukrainio, efikis en multaj landoj dum pli ol unu jaro. Oni konsekvence multe cerbumas pri la milit-elspezoj de la mondo (po 2 x 10<sup>11</sup> guldenoj jare) kiuj daŭre kreskas. Nur malgranda nuklea milito kaŭzus malvarman, malhelan "vintron", kiu daŭrus dum jaroj, detruus ekologiajn sistemojn kaj donus al la postvivantaj homoj ruinigitan planedon, kiu multe malsimilas la nunan.

La estonteco

Kiam tiu ĉi jarcento komenciĝis, nek homo, nek teknologio povis ŝanĝi la klimaton de la mondo. Sed kiam la jarcento finiĝas estas multe pli da homoj, kaj multaj aktivoj, kiuj povas influi la klimaton, aŭ intence aŭ neintence. La granda tragedio estas, ke en





## HOMA RESPONDECO PRI LA KLIMATO ?

la venonta jarcento estos duoble da homoj en la mondo, sed la nuna jarcento daŭre detruas la medion, ne nur por hodiaŭ, sed ankaŭ por la venontaj jarcentoj.

La respondeco pri la klimato ne apartenas al iu nacio aŭ al iu speco de nacioj, ĉar eĉ evolu-landoj detruas la arbarojn, la grundon kaj la medion. Ĉiuj nacioj devas kunlabori por gardi la klimaton. La homaro devas nun kunlabori, aŭ la kreskantaj problemoj superfluos nin, ĝuste kiel la akvo superfluis la mondon en la epoko de Noa.

Mervyn C. Jackson, Britujo

Libroj : RILEY (Denis) & SPOLTON (Lewis). - *Vetero kaj klimato de la mondo*, trad. Kris Long. - Rotterdam : UEA, 1987.

*From one earth to one world.* - Oxford Univ. Press, 1987.



## EVANGELIAJ KAJEROJ

### LA SOPIRO DE LA KREITARO - ROM 8:19-22

Kiuj atentis la vivon kaj luktadon de la mondo kaj de la eklezioj, tiuj spertas, ke ili vivas en reciproka riproĉo. Eĉ tion ni povas diri, per ne eldirita vorto, per fingro montrante, ke taentas la mondo la Eklezion, kaj la Eklezio la mondon. Ni rigardu. La Eklezio atentis la mondon per iom da riproĉo, tial, ĉar la mondo ne bezonas Jesuon Kriston, kaj la Eklezio atentis tion, kion atingas la mondo sen Jesuo Kristo. Kaj, ĉar la mondo atingas nenion sen Jesuo, tial estas la ne eldirita riproĉo, kaj malica diro. Sed la apostolo Paŭlo rigardas la mondon sen malica diro, kaj li konstatas, ke

"la tuta kreitaro kune ĝemas kaj naskodoloras." (v. 22) Tio estas ofte klare aŭdebla. Aŭdigas tion senespere mortontoj, forlasitaj infanoj, malsataj milionoj. Kaj en tiu ĉi ĝemo estas la preĝo-ĝemo de la poluciita aero, de la arboj kondamnitaj al la forhakado, de la formortintaj bestospecioj. Unusenca estas tiu ĉi ĝemo, kaj preĝado, se ni pripensas, ke unu litro da oleo kapablas polucii unu milionon da litroj da akvo. Unusenca, se ni kapablas ekkompreni, ke dum la lastaj tridek jaroj la homaro venenis 500 milionojn da hektaroj da produktokapabla tero. Estas aŭdebla tiu ĉi ĝemo kaj preĝo, en kiu aŭdeblas ankaŭ la kriĉo de birdoj, ĉar dum la lastaj kvardek jaroj oni pereigis la du-trionojn de la arbaroj, kaj aŭ la birdoj pereis, aŭ en mortotino ili kriĉas, ploras kaj ĝemas. Ĉe tiu ĉi ĝenerala ĝemo diras Paŭlo ke

"la tuta kreitaro kune ĝemas kaj naskodoloras !"

Ĝuste tiam ankaŭ la mondo per ne eldirita, silenta malica diro atentis la Eklezion, ĉu ion ĝi atingas kun Jesuo Kristo ? En tiu ĉi plorinda fin-situacio ! Vere, ni konfesu, ke ni ne povas multon montri : malplenajn preĝejojn, enuigajn predikojn, malriĉigintan animan kaj eklezian vivon... Tiaj oni vidas nin. Nur en nia reformita eklezio, en du cent komunumoj, jam ne plu sonas la Evangelio, ĉar mankas predikanto, kaj kie estas, ĉu tie oni sentas la altan flugadon de la predikado, kaj la fortan esperon kaj kredon al Jesuo Kristo ? Paŭlo, kvazaŭ sentante, ke "oni atentis nin !", tion diras, ke ankaŭ ni plorĝemas en ni mem... Do ne nur ili, sed ANKAŭ ni ! Estus bone, se la vorteto ANKAŭ al humilo kondukus nin, kiam ni atentis tion, kion atingas la mondo sen Jesuo Kristo ? Kvankam ni ne ĝemas, sed ANKAŭ preĝas. ANKAŭ ni, tio signifas, ke ni vivas sur la sama planedo, spiras la saman aeron, kaj samtempe sentas la konturojn de planeda katastrofo. Same ANKAŭ ni demandas : kiel plu ?... se ĝenerale ekzistas ia plu... ANKAŭ, tio instruu nin

pri humilo, ni travivu pormomente la kunligitecon kun ĉiuj niaj homfratoj, kaj komunumoj. Ankaŭ ili atendas, ili la filojn de Dio, sed ANKAŬ ni atendas, ni la filecon, kaj la savon de nia korpo. Ili ĝemas kaj preĝas, ni preĝas. Ili suferas laŭ siaj manieroj, sen espero, ankaŭ ni suferas laŭ nia maniero, en espero ! ANKAŬ tio kondukis nin, kaj avertu al humilo : ĉu ion ni povas fari por la mondo ? Ĉu ni komencu savi la ankoraŭ ne tute poluciitan aeron ? Aŭ ni, el la bretoj de nia fido, ĉarpentu tian arkeon por ni mem, kiu tra-savas nin tra la akuŝo de la universa last-momento ? Nu, la Vorto de Dio ne donas ordonon eĉ pri tio, ke ni provu savi la malnovan ĉielon, la malnovan teron, kio ne signifas, ke ne staras la dia ordono, kiu akcelas la respondecan responson super la tero. Sed samtempe la Dia Vorto eĉ tion ne ordonas, ke ni "konstruu por ni mem", jen tian loĝejon aŭ arkeon, ke en tio rifuĝante ni konservu nin mem ĝis la alveno de la novaj ĉielo kaj tero.

La apostolo Paŭlo rekomendas alian vojon, pli aŭdante la ĝemon kaj naskodoloron, ni aperu, kiel filoj de Dio por tiu mondo, kiu "sopire atendas la malkaŝon de la filoj de Dio." (v. 19) La apostolo Paŭlo al tio respondas, kiamaniere eblas aperi por la mondo, kiel filoj de Dio. Tiel, ke ni atendas la filecon, se ni povas atendi kun pacienco, kaj se ni kuraĝas rekonii nian malfortecon.

1. Kion do ni atendas ? Ni atendas la filecon ! Ne la pluan vivon de la malnovaj ĉielo kaj tero, sed la filecon. Ne tion, ke silentiĝu la eskatologiaj ĝemoj de la tero, kaj la akuŝodoloro, kaj poste venu pac-epoko, kiun ni povu ĝui sur tiu ĉi tero, sub tiu ĉi ĉielo, ne, ni atendas la filecon ! Tion ĉi Paŭlo klare diras. Kion signifas atendi la filecon, tion la sekva historieto klare montras al ni.

Vivis en Usono tre riĉa, sed seninfana hungara viro. Por li estis bona la riĉeco, sed suferigis lin la seninfana stato, tute ĝis kiam li decidis adopti la filon de sia kuzo. Do, li adoptis la fileton, ke estu heredanto, kaj ke li povu iun ami. Okazis la adoptado de la okjara infano, kaj nun ni rigardu la okazintaĵojn el la vidpunkto de la fileto. La afero formiĝis tiel, ke la fileto jam havis la nomon de la nova patro, sed ankoraŭ lin ne vidis. Nu, li jam sciis, ke li havas novan patron, lia naskopatro mortis, tiam li travivis ion el tio, ke lin amas iu patro, kiu adoptis lin. Sed li havis ankaŭ ĝenan senton, li ankaŭ ne vidis la novan patron, kiu lin adoptis. kaj tio ĉi vere kaŭzis al li malcertecon, timon, la foresto de la patro.

Tiel ni estas rilate la filecon ! Per la kara sango de Jesuo Kristo, li elaĉetis nin el la senpatra, falinta stato, sed ni ankoraŭ ne vidis vidalvide tiun ĉi patron, kiu adoptis. Ni jam scias, ke ni lin havas, kaj per la brakoj de nia fido ni brakumas lin, sed ankoraŭ ni ne vidis lin vidalvide. Kiel amataj, adoptitaj filoj de Dio, ni atendas, ke ni povu vidi lin, tion signifas atendi la filecon ! "Mi jam estas filo, sed ankoraŭ ne vidis lin !" Do, tiujn ĉi "jam" kaj "ankoraŭ" signifas atendi la filecon. Dum ni atendas, ni povas plenumi la ordonon de la Patro ĉiela, ke ni regu super la fiŝoj de la maro, kaj la birdoj de la ĉielo. Sed ni atendas ne la konservadon de la malnovaj tero kaj ĉielo, sed la filecon, ĉar estos novaj ĉielo kaj tero. Ke ni atendas la filecon, por tiuj, kiuj persone spertis, ke Dio en Jesuo Kristo entreprenis la patrecon, tio persone signifas ion. Sed ankoraŭ ĝi ne efektiviĝas, ne montras sin vidalvide. Jure ni jam estas filoj, sed efektive ankoraŭ ne plene realiĝis nia adoptiĝo. Tion ni atendas, ke ĝi estu plena. La mondo

"sopire atendas la malkaŝon de la filoj de Dio," la aperon de tiuj, kiuj spertis, ke ili havas Patron ĉielan, ja, tiuj povas sinteni kiel atendantaj filoj. Tiujn ĉi filojn de Dio atendas la mondo. Tiuj, kiuj scias : "Ni havas Patron !", kaj ĝuste tial, povas zorgi pri la aferoj konfiditaj al ili, pri la tero, la aero, la birdoj, la bestoj, sed antaŭ ĉio pri la homoj, tiel, ke ili devas iam fari al la Patro kalkulon. Tiuj ĉi filoj scias, ke ili povas esti responsaj pri la havaĵoj konfiditaj al ili, sed ankaŭ ili scias, ke la savplanon de Dio, la plenumon de tio, ili ne povas malhelpi, aŭ iamaniere bari.

2. Sed kiel ni povas elteni tiun ĉi atendadon ? Pere de la PACIENCO ! En la hungara lingvo tiu ĉi vorto konsistas el du partoj. Unu signifas : pace, alia : elteni. Kune ili signifas : per tia paco, atendado, dum kiu ne la malpacieneco, sed la tuta interna, nemovebla trankvilo karakterizas la homon. Ja, atendi nur tiel oni povas : PACIENCO ! Se ĝi estus nur elteno, signifus, ke ni atendas, sed dume estas plenaj per maltrankvilo, senpacieneco. Se ĝi estus nur pacienco, tio ne estus bone, ĉar ne estus tie la streĉo de la atendado, kaj ni rezigancie akceptus, kio estas. Sed tio, PACIENCO, jam estas tute alia. Signifas, ke ekstere furiozas la ŝtormoj, falas la batoj, doloras nin la vundoj, akuŝdoloras la historio, sed malgraŭ tio interne estas trankvilo ! Do ĉio okazas ekstere, ne povas ĝeni tion, kio interne regas. Ekstere ĉio estas malcerta kaj ŝanĝiĝas, sed interne ĉio estas certa kaj senŝanĝa. Tiel estas, kiel ĉe la maroj : la akvokolonoj moviĝas je 40 m. profunde, ili murmuradas, sed en la profundo estas plena trankvilo kvazaŭ nenio okazus supre. Mi kredas, ke oni tiel povas pacienci vere, ĉar

interne estas trankvilo. Tio ĉi radias eksteren, je mano, piedo, koro, nervaro, kaj mi kredas, ke tiujn ĉi pacience atendantajn, trankvilon radiantajn Di-filojn atendas la mondo.

Ili devas fari ateston pri tio, ke la forpaso de la malnovaj ĉielo kaj mondo havas sencon. Ĝi havas direkton, perpektivon. Ĝi okazas por la novaj ĉielo kaj tero. Tiuj ĉi Di-filoj scias, ke la fino je la intereso de ia komenco okazas al la homa gento. Kvankam doloriga estas tiu ĉi akuŝo, tamen estas bone vidi, ke tiu ĉi havas sencon kaj celon. la Di-filoj tion ĉi jam scias, kaj provas diri al la homoj de la mondo. Sed dume ne necesas ĉesi la protektheadon de la naturo, dume ne fariĝas sensenca la ŝirmado de la malnova, sed kiu scias, ke la daŭrigo ne estas la daŭrigo de la malnova, sed estos komenco venka, tiu eklernas esti pacienca kaj fariĝas trankvila, ĉar li scias, li atendas, ke Dio estu ĉio en ĉio. Kiu spertas efektan de eksteraj aferoj, historiaj, ekonomiaj, politikaj, tiel, ke la maltrankvilo penetras ĝis la koro, tiu ne povas longe elteni... Elteni povas nur tiu, kiu povas ne nur atendi, sed trankvile elteni, abdiki, fasti. Kie al la eltenkapablo kuniĝas la pacienca, tie nova frukto produktiĝas : la pacienca. Kiu tiamaniere gajnas paciencon, tiu ne volas la horloĝon de la historio plu movigi, ke kiel eble plej baldaŭ okazu tio, kio devas okazi. Tiu simple atendi povas, kaj scias, ke tio :

"Vere mi rapide venos," (Apo 22:20)

ne signifas rapide en tempo, sed ke li ne malfruigos. Pro tio la pacienca. Kie oni pacienca povas atendi, tie aperas ankaŭ la trankvilo, kaj dum la atendado fariĝas ekzemplo nia vivo. La kreita mondo atendas la malkaŝon de tiaj filoj.

Sed kie temas pri pacienca, elteno, trankvilo, tie venas ankaŭ la demando : el kiu fonto tion ni havas ? Ja, al la pacienca, elteno, povo por atendi necesas forto. Kaj ĉi tie indigniga mesaĝo sonas, je tiu ĉi demando, el kiu fonto ni povas elteni, la respondo: el MALFORTECO !

3. Malforteco ! Tion klare diras Paŭlo :

"La Spirito helpas nian malfortecon." (v. 26)

Tion ĝi signifas, ke la SPIRITO kompatas nin en nia malforteco, aliflanke, se ni ne volas esti fortaj, tiam la Spirito ne nur kompatas nin, sed fariĝas en ni forto. Forto por tio, ke li :

"prophetadas por ni per ĝemoj ne eldireblaj !" (v. 26)

Kiel tio ĉi eblas ?, ke el la plej profunda stato de la homa malforto io bona estiĝu ? Sed ĉi tie Paŭlo parolas, ne pri malforto, sed pri malkapablo. Ĉi tie temas pri tiu stato de la malkapablo kiam mi ne estas kapabla aranĝi mian vivon, kaj eĉ ne uzas forton

tiuinterese, ke mi mem faru absolvon. Tiu ĉi stato ne estas baro, se mi ĝin konfesas, ĉar tio movas la Sanktan Spiriton de Dio, ke li komencu propeti por mi per ne eldireblaj preĝoj. Kion li propetas, tio ne eldireblas. Sed kio estas la rezulto de la propeto, tio sperteblas. Dio je la propeto de Sia Sankta Spirito donacas al ni tiujn donacojn, kiujn ni nepre bezonas, kiuj sufiĉas al tio, ke ni povu atendi per espero, sub Lia gvido, ni povu atendi PACIENCEME nian filecon. Tiuj donacoj ne nian mondan prosperon helpas, prefere la paciencon en ni. Tiuj ĉi donacoj estas signoj de Dio, rilate tion, ke Li volas prilabori nian atendadon. Tiuj estas signoj pri tio, ke ĝis ni ne vidas Lin vidalvide, Li serioze prenas la Patran servon por ni. Tiamaniere ni, kiel donacitaj, malriĉe, tamen riĉige, povas aperi por tiuj, kiuj

"sopire atendas la malkaŝon de la filoj de Dio !"

Tiuj ĉi per Spirito gvidataj, donacon gajnintaj, kaj per la Spirito portataj Di-filoj estas tiuj, kiuj povas fariĝi beno por la mondo.

Portempe ĝene premas nin la forpaso de la malnova. La popolo de Dio ne povas fari ion vidante la forpason de la malnova, kaj ne povas fari la konservadon. Sed je tio, jes, ke la popolo de Dio faru ateston pri tio nova, kion anstataŭ la malnova donos la historio, la Sinjoro de la universo, la Patro de Jesuo Kristo.

Knáver Zoltán, Hungarujo



## ESPERANTISTA LIGO en la Ekumeno



### KELI ★ DIA REGNO

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
Fondita en 1911

Neneŭtrala ligo, kunlaboranta kun U.E.A.  
*Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prez.: A. Burkhardt, Ev. Pfarramt, D-7311 Bissingen/Teck, Fed. Resp. Germanujo.  
Skr.: E. van Dijk-Kuperus, -Koningsmantel 4, 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando. Tel. 01720-20222.

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto minimume 25 ned.gld. Membro-subtenanto 37,50 ned.gld. Membro de IKUE 12,50 ned.gld.

Monsendoj al poŝta ĝirkonto n-ro 5506132 de Kristana Esperantista Ligo Internacia KELI, van Hogendorplaan 4, 3135 CF Vlaardingen (Nederlando).

Dia Regno  
Oficiala organo de KELI  
Fond. 1908

Redaktoro: J. van Keulen, v. Beethovensingel 91A, 3131 ED Vlaardingen, Nederlando. Tel. 010-4351198.

Abonprezo, sen membreco en KELI: 21 ned.gld. aŭ egalvaloro. Abonoj kaj anonekostoj pagotaj al la kaso de KELI, vidu supre.

Ekspedo de Dia Regno, membrolisto de KELI: L. Hordijk, van Hogendorplaan 4, 3135 CD Vlaardingen, Nederlando.

### Esperanto-Misio

Box 7, Oslansjø · 694 02 HALLSBERG 2 · Svedujo

### LA MALBONA ADMINISTRANTO

Legante en la Biblio, mi ne trovas tie multajn tekstojn por subteni la modernan koncepton, ke ni homoj estas la administrantoj, nome de Dio, pri Lia mondo. Eble, laŭ kelkaj, mi ne serĉas bone. Persone, mi timas, ke tiuj, kiuj ja trovas tiajn tekstojn (eĉ klarajn !), iom eninterpretas la tekstojn por eltrovi sian propran opinion.

#### Unu ekzemplo

Foje mi legis varman pledon por la kristana tasko, savi la ekologion. En si mem : tute konsentite : ja temas pri io vere serioza kaj ankaŭ en nia rilato al Dio, kiel al Kreanto, estas religie grava demando. Sed la teksto, kiun la aŭtoro verve citis, ne multe signifas ĉi-rilate.

La koncerna cito estis : 1 Petro 4:10. Sed, atenta legado de la kunteksto tuj evidentigas, ke ne temas pri nia homa tasko rilate al la konservado aŭ la (mal-)polucio aŭ la (bona/justa) ekspluato de la kreitaro kiel tia. Prefere ni komprenu la tekston, kiel rilatantan al la intern-eklezia vivo : do amplekso multe pli limigita !

Ĉu tio implicu, ke sekve ni kristanoj tute ne parolu pri la grandaj nuntempaj problemoj pri la pluvivado, la polucio, la elĉerpiĝo de krudaj materialoj, ktp. ? - Kompreneble ne !

Sed ni sincere diru, ke kiel kredantoj je Dio, ni kuraĝas paroli pri aferoj kiuj nin tuŝas ; kaj ni ne kaŝu nin malkuraĝe malantaŭ bibliocitoj pruvantaj nenion. Paroli elde sia fido je Dio oni ja ankaŭ povas ne citante la Biblion.

#### La malbona administranto

Pri tiu homo (hom-tipo ?) ni ja povas legi en Luko 16:1-13. Temas pri parabolo tradicie konata kiel tre ĝene komplika.

Enhav e ĝi rakontas pri grandbienulo, kies administranto estis denunciata al li pro trompo. Li disipas la posedaĵon de l'mastro. Maldungo nepre sekvos. Sed li tion ne kviete atendas, sed ruze faras siajn prizorgojn : pere de kromaj trompoj li akiras amikojn, kiuj post la maldungo zorgos pri li.

Jen skize ĉi tiu parabolo.

Demando : Ĉu vere Jesuo ion tian povas esti rakontinta ? Ĉu tia trompemulo estu por kristanoj kvazaŭ ekzemplo ? - Ja estas ne-etike!

Luko, kiu liveras ĉi tiun parabolon, ŝajne ne povis ne uzi ĝin. Ĝi estis transdonita ankaŭ al li, kiel unu el la paraboloj de Jesuo : evangeliisto ja ne elpensas siajn anekdotojn, sed uzas la tradician materialon de la eklezio, al kiu li apartenas. Do, Luko ekkonis ĉi tiun parabolon en la eklezia tradicio - kaj verkante sian evangelion, li ne povis ne uzi ĝin. Tamen, ankaŭ por Luko, ĝi estis enigma : Ĉu ne estas ne-etike, meti iun tian kiel ekzemplon ?

Do Luko provas pli-akceptebligi la tuton aldonante ĉenon da saĝaj preskriboj kaj admonoj kaj sentencoj :

"La filoj de ĉi tiu mondo estas pli prudentaj ol la filoj de la lumo",

"Faru amikojn per la maljusta mamono, por ke, kiam ĝi mankos, oni akceptu vin en eternaj loĝejoj",

"Kiu estas fidela en la plej eta afero...", ktp.

#### Klarigo-provoj

Tra la jarcentoj oni serĉis klarigojn : por la malbona administranto oni i.a. trovia la jenajn inter si kontraŭdirajn "solvojn" : temas pri la judaj gvidantoj, temas pri la impostistoj, temas pri Poncio Pilato, temas pri Satano, eĉ temas pri Jesuo Kristo. Kvazaŭ la nura problemo estus : identigi kiu estas "la malbona administranto"...

#### La parabolo mem

Unue ni demandu nin, kio fakte estas la parabolo ? Kiuj estas ĝiaj limoj ? Luko en la teksto donas tuj sinsekve du klarigojn : versiklo 8 : "tiu sinjoro laŭdis la malbonan administranton, ĉar li prudente agis." kaj en versiklo 9 : "akiri amikojn pere de mono kiel ŝirmon por la eterneco."

Pri la unua klarigo nur eblas konstati : jes, agi prudente estas ... prudente. Pri la dua klarigo ni povas konsenti, ke la komencan eron (fari amikojn) la malbona administranto de nia parabolo celas, sed rilate la duan eron (sin antaŭŝirmi jam pere de mono por la eterneco : ĉu pere de aĉetita indulgenco akiri lokon en la ĉielo ?), ni nur povas konstati, ke enhance kaj tendence ĝi absolute fremdas al la tuta parabolo.

Prefere la parabolon ni limigu je versiklo 8a (t.e. tuj post "ĉar li prudente agis").

La cetero estas nura aldonaĵo, devenanta el alia tradicio pri Jesuo, supozeble.

#### Kion celas la parabolo ?

Mi sincere konfesu, ke mi ne scias. Mi nur povas doni kelkajn eventualajn aplik-eblecojn.

Povas temi pri la Eklezio (ne tiu aŭ alia historie difinita denominacio, sed La Eklezio de Jesuo-Kristo, t.e. mond-ampleksa, ĉiu-epoka). Ja povas vere temi pri la Eklezio. Ĉar, laŭ ortodoksa romkatolika teologio, kaj laŭ same ortodoksa protestanta teologio (ekz-e Karl Barth), la Eklezio estas la Administranto de la Vorto de Dio : Ĝin ĝi vartu, Ĝin ĝi diskonigu al la tuta mondo, Ĝin ĝi igu utila kaj bonfara por la bono de la tuta kreitaro. Sed kion fakte faris la Eklezio pri la Vorto de Dio ? Ĉu ĝi ne disipis Ĝin, interkverelante tra la jarmiloj pri dogmoj et-detaloj ? Ĉu la Eklezio ne perfidis sian mond-celatan mision, maltrafante la amasojn de la laboristoj, de la junularo, de la feminismo, ktp. ? Kaj nun : ĉu sekvos maldungo ? Aŭ ĉu la Eklezio ne kviete tion atendos - sed faros kion ajn por plej prudente kaj plej akravide antaŭzorgi ekde nun por trovi solvojn ?

Aŭ ĉu ni plilarĝigu la vidon : ni kunprenu Genezon 1:27-31, ĉu ? Ni konsideru - modernesprime - la Homon kiel administranton de la kreitaro. Ni ja scias el la Torao, ke

"La lando apartenas al JHVH."

- do ni homoj estas ĉe Li gaste. Kaj kion fakte ni faras, ni homoj ? Ni disdividas la mondon : jen mia, jen via lando, jen naciismoj, jen bariloj... Kion ni faras ? Jen krudaj materialoj bone uzablaj : ni ekspluatas la grundon, la hom-fortojn prefere de aliaj rasoj ; ni polucias - kondiĉe ke ni gajnu monon.

Jen la samaj demandoj : ĉu ĉi tio ne estas disipo ? Ĉu nun sekvos mond vasta maldungo de la Homo el lia rolo memelektita ? Aŭ ĉu la Homo agos ankoraŭ prudente, por savi - kiel ajn - tion, kio ankoraŭ estas savebla... ?

#### AMOS

En Amos 8:4-7 ni trovas unu el amaso da tekstoj, kiuj formas tutan tavolon en la Biblio : Dio ne forgesas, kiamaniere ni agas maljuste. Precipe kontraŭ niaj kunhomoj.

Ĉu eble ni nuntempuloj kombinu tion ĉi kun Luko 16:9

"faru al vi amikojn pere de la maljusta mamono" ?

Tiam la parabolo ricevas la signifon : faru malriĉulojn viaj amikoj pere de via nuntempa riĉo ; - ĉu tio identas je "ne subtenu certajn reĝimojn kiuj subpremas malriĉulojn, neblankulojn, ktp." ? Ĉu la parabolo de la malbona administranto tiamaniere ne povus instigi nin, subteni certan redistribuon de riĉeco ĉie tra la mondo ?

Jen, kiel vi vidas : mi ne arogas, ke ĉion mi scias. Mi starigas demandojn. Al vi - kaj al mi mem.

Gerrit Berveling, Nederlando

Bibliografio :

*The International Critical Commentary: St. Luke* / Rev. Alfred Plummer.

LA JUBILEA SISTEMO

Unu el la instruoj de la Torao (Biblio) estas la jara ciklo, kiu devas esti observata en la lando de Israelo. Ĉiu sepa jaro estas ripozjaro (hebree : *šmita*), kaj post sepoble sep jaroj venas la jubileo, jaro de liberiĝo kaj returno.

Evidentas, ke temas pri iu paralelo inter la semajna ciklo, kiu estis establita jam je la kreado de la mondo, kaj la jara ciklo de sep jaroj. En la Torao ni legas :

"Kaj Dio finis en la sepa tago Sian laboron, kiun Li faris." (Gen 2:2)

En la sama maniero, kiel Dio *riparis* en la sepa tago, tiel la tero devas *ripari* dum la sepa jaro. Tiel plenumiĝas la ĉefa juda principo, ke Dio estas en la ĉielo kaj sur la tero (*bešamajim ve-bearec*).

Ankaŭ la jubileo havas evidentan paralelon aliloke en la Torao. Ni povas legi, ke post la paska festo (*pesaĥ*) oni devas kalkuli sepoble sep tagojn, kaj poste oferi novan farunoferon (Lev 23:16) al la Eternulo dum la tiel nomata semajna festo (*šavuot*). Tiu semajna festo estis dekomence ligita kun la lando de Israelo, ĉar nur post "kiam vi venos en la landon..." (Lev 23:9) oni estis devigita observadi tiun 49-tagan kalkuladon.

Interese estas konstati, ke tiu festo de *šavuot* dum la tempo de la rabenoj ricevis tute alian kromsignifon, kiu almenaŭ en la liturgio tute forpuŝis la agrikulturan aspekton de la origina festo. Oni nomis tiun feston *Zman matan toratejnu* (la tempo de la donaco de nia Torao), apogante sin sur la verso :

"En la tria monato post la eliro de la Izraelidoj el la lando Egipta, en tiu tago ili venis en la dezerton Sinaj. ... kaj Izrael stariĝis tie tendare antaŭ la monto." (El 19:1-2)

Komparante la rabenan signifon de la semajna festo kun la instruoj (leĝoj) pri *šmita* kaj jubileo, ni trovas, ke nur koncerne tiujn instruojn estas aparte menciita, ke ili estis donitaj sur la monto Sinaj.

"Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo sur la monto Sinaj." (Lev 25:1)

Tiu instruoj ne estis poste ripetitaj sur la ebenaĵo de Moab, en la libro Readmono :

"... en la lando de Moab, krom la interligo, kiun Li faris kun ili sur Ĥoreb." (Rea 29:1).

Sajnas kvazaŭ Dio faris du apartajn interligojn laŭ la teksto de la Torao.

La du paralelaj cikloj de la semajnoj kaj de la jaroj estas ofte menciitaj en rabena literaturo. La sep tagoj de la semajno fontas el la kreado de la mondo kaj la sep jaroj de la ciklo de *ŝmita* fontas el la kreado de ĉiuj tagoj de la mondo. La Sabato signifas la regadon de la mondo kaj la Sepa Jaro signifas la regadon de la Lando (Israelo). Precize kiel oni devas ripozi dum la Sabato, ĉar en tiu tago Dio ripozis, oni devas ripozi ĝis la teron (*ŝmita*) dum la Sepa Jaro, por montri, ke la lando apartenas al Dio.

"Diris la Sanktulo, benata estu Lia nomo, semu dum ses jaroj kaj ripozigu sum la sepa, por ke vi eklernu, ke la lando apartenas al Mi." (Sanhedrin 39 a)

La Jubileo, t.e. ĉiu kvindeka jaro, aldonas al tiu agrikultura, ekologia aspekto de la Sepaj Jaroj, la dimension de socia kaj ekonomia liberigo kaj rekonstruo. Oni povas nomi ĝin la jaro de socia renaskiĝo, ĉar en tiu jaro ĉiu kaj ĉio returnas al la originaj kondiĉoj, kiuj regis je la naskiĝo de la hebrea nacio. Ĉar la karaktero de la Jubileo estas tia, oni povas deklari tiun jaron nur kiam la tuta hebrea popolo (oni bezonas ĉiujn dudek tribojn) troviĝas en la lando.

"Dum la tempo kiam ĉiuj ĝiaj loĝantoj loĝas sur ĝi kaj ne kiam parto de ili estas en eksterlando." (Arafin 32 b)

Rilate al la observado de *ŝmita*, ni diferencigas inter kvar gradoj de sankteco de la tero. La plej sankta estis la lando, kiu estis okupita post la eliro el Egiptujo. Tiu sankteco estis tamen tiel alta, ke ĝi ne povis resti post la detruo de la unua Templo, kaj ĝi forviŝiĝis dum la ekzilo en Babilono. Tiu periodo daŭris dum 17 jubileaj cikloj kaj komenciĝis post la sep jaroj de konkerado kaj la sep jaroj de dividado de la lando.

La dua sankteco devenas de la tempo, kiam la hebreej revenis de Babilono. Tio estis la tempo de Ezra kaj Neĥemja. Ĉar tiu sankteco estis de pli malalta grado ĝi daŭris eĉ post la detruo de la dua Templo kaj ĝi neniam forviŝiĝos. En tiu regiono, oni ne povas manĝi fruktojn, kiuj kreskis dum la sepa jaro, sen ke oni antaŭe fordonis ilin al la tuta popolo aŭ al speciala rabena komitato, kiu ĝin distribuos. Ankaŭ oni ne rajtas kulturi la teron.

Iomete pli malalta grado de sankteco havas hodiaŭ tiuj regionoj, kiuj perdis sian sanktecon dum la ekzilo en Babilono, kaj kiuj ne estis resanktigataj fare de Ezra. Pri ili deklaris la rabenoj, ke oni povas manĝi iliajn produktojn sed ke oni ne rajtas kulturi la teron.

Kvaragrade sankteco havas la lando, kiu neniam estis sanktigita dum la eliro de Egiptujo, sed tamen estis indikita en Nombroj 34:1-13 kiel apartenanta al Israelo. Tie oni ne devas observi *ŝmita*-n kaj oni rajtas kaj manĝi la produktaĵojn kaj kulturi la teron. Ili do similas al la cetera terglobo, kie ankaŭ la leĝoj de *ŝmita* ne validas. Oni ne scias precize pri kiu teritorio temas, sed laŭ rabeno Jisrael Shilta en la libro *Erec Ĥemda* temas pri la norda fonto de la rivero Kasmias ĝis la monto Ha-amana.

Ekzistas multaj mistikaj signifoj ligitaj kun tiu ciklo de Sepaj Jaroj kaj Jubileoj. Klare estas ke la lando Israelo estis donita al hebreej nur kondiĉe, ke ili observos tiujn ripozarojn por la honoro de la Eternulo. Per observado de la ripozaroj, oni montras, ke la lando apartenas al la Eternulo, kaj ke Li povas doni ĝin al kiu Li preferas. Oni ankaŭ nomas la jubileon : unu el la grandaj sekretoj de la Torao, kaj ekzistas ideo, ke ĉiuj aferoj kreitaj je la komenco estos kompletigitaj en la erao de la Jubileo. Oni ankaŭ trovas en la Talmudo la sekvan diraĵon :

"Kvindek pordegoj de kompreno estis kreitaj... kaj ĉiuj estis transdonitaj al Moseo, sed kun unu escepto... la escepto de la sankta Jubileo."

Kion signifas tiuj vortoj *ŝmita* kaj jubileo etimologie ? Evidentas, ke pri la vorto *ŝmita* ni havas nenian problemon. Ĝi signifas ripozigi, precize en la sama maniero kiel sabato signifas ripozi.

Male, la vorto jubileo estas multe pli komplika kaj ŝajnas, ke ĝi fakte havas multajn signifojn. Unue ĝi signifas virŝafon. Tiun signifon ĝi havas kiam Josuo konkeris Jerikon, ordonante la hebreejn trumpeti *beŝofrto hajovelim* (Jos 6:4) kaj per *bekeren hajovel* (Jos 6:5)<sup>1</sup>. Ni trovas ankaŭ ke en la araba lingvo *javlo* signifas virŝafon (Roŝ Haŝana 26 a). Ankaŭ komentistoj, kiel Raŝi kaj Radak, uzas tiun signifon.

Alian signifon de jubileo estas reveni aŭ porti. En Jesaja oni povas legi :

"En tiu tempo sur la lokon de la nomo de la Eternulo Cebaot, sur la monton Cion, alportos donacojn al la Eternulo Cebaot..." (*Be'et hahi jubal-ŝaj leJHVH...*) (Jes 18:7)

Plue ankaŭ Jeremia uzas tiun signifon :

"Kun ploro ili venos, kun preĝoj Mi kondukos ilin ; Mi irigos ilin apud torentoj da akvo, laŭ vojo ĝusta, sur kiu

ili ne falpuŝigos..." (bebakhi javo vebetaħnonim (j)ovilam el naħalej majim...) Jer 31:9<sup>2</sup>

Tria signifo estas tiu de akvotorentoj, kiel en Jesaja :

"Kaj sur ĉiu alta monto kaj sur ĉiu alta monteto estos riveroj, torrentoj da akvo, en la tago de la granda mortigado, kiam falos la turoj." (vehaja al-kol-har gavoha veal kol giva'a neħah pelagim jiblej-majim bejom harag rav benofel migdalim) Jes 30:25,

kaj ankaŭ en Jeremia :

"Li estos kiel arbo, plantita ĉe akvo kaj etendanta siajn radikojn al torento... "(vehaja ke'ec ŝatul almaĵim waljuval jislaħ ŝoršav... ) Jer 17:8.

Fine en la Torao mem, ni havas la bazan signifon de produktaĵo de la lando :

"Tiam Mi donos al vi pluvojn iliatepe, kaj la tero donos siajn produktaĵojn, kaj la kampa arbo donos siajn fruktojn." (venatati giħmejkhem beitam venatna ha'arec jevula ve'ec ĥasaħe jiten pirav) Lev 26:4,

signifo, kiun ni ankaŭ trovas ĉe la profeto Ĥabakuk :

"... la vinberbranĉoj ne donos fruktojn..." (ve'ejn jevul begefanim) Ĥab 3:17.

Ĉiuj tiuj signifoj enhavas en si aspekton aŭ karakteron de la esenco de la Jubilea jaro. Oni povas kompreni tiun jaron, kiel la revenon al la origino. La origino de la trumpetoj estas la kormoj de la virŝafoj. La alportado de donacoj al Dio estas (iamaniere) revenigi tion, kio fakte apartenas al Li. Akvotorentoj estas la origino de la akvo kaj la akvo mem estas la origina kaj plej baza nutrajbezono de ĉiu kreskaĵo kaj tiel ankaŭ por ĉiu vivanta estaĵo.

Eblas ankaŭ kompreni Jubileon, kiel sekvi naturan tendencon. Ĉiuj supre menciitaj signifoj povas esti komprenataj ankaŭ tiel.

Ofte estas montrita, ke la ĉefa esenco de la Jubileo estas libereco, eĉ indikante, ke la libereco, kiun oni proklamas dum tiuj jaroj, signifas la eternan vivon. Oni trovas, ke ekzemple rabeno Abraham ibn Ezra opinias, ke libereco estas la ĉefa esenco de la Jubileo, laŭ la vortoj de la Torao :

"... kaj proklamu liberecon en la lando por ĉiuj ĝiaj loĝantoj." (Lev 25:10).

La hebrea vorto por libereco estas *dror*. La kabalistoj, t.e. hebreaj mistikuloj, rimarkigis pri la simileco inter *dror* kaj *dor vedor* (generacio post generacio, vidu Pre 1:4), ĉar ĝuste temas pri reveno de generacio al la situacio, kiu ekzistis en la antaŭa. La vorto *dror* havas krome kelkajn ne mistikajn signifojn. En Eliro 20:

23 ĝi signifas pura (bonodora) mirho, kaj en la Psalmoj ĝi signifas birdo : hirundo (trovas neston (Psa 84:3)<sup>3</sup>. Tia pureco kaj tiu hirundo, flugante tre alte, povas facile simboli ankaŭ liberecon.

Unu el la ĉefaj aspektoj de la Sepa Jaro kaj de la Jubileo estas, ke ili devas esti observataj nur en la lando de Israelo. Post la detruo de la dua Templo, oni ĉesis iom post iom observi la *ŝmita*-n kaj dum pli ol mil jaroj ne ekzistis plu hebreaj terkulturistoj en Israelo<sup>4</sup>. Ĉar la observado fariĝis nebla kaj nenecesa, oni anstataŭis ĝin per studado de la koncernaj leĝoj. Tiuj leĝoj rilataj al la Sepa Jaro troviĝas krom en la Torao, ĉefe en la talmuda traktato *ŝevi'it* (signifas : sepa). El la du versioj de la Talmudo, la Jerusalema kaj la Babilona, la Jerusalema estas la sola kiu havas ankaŭ *Gemara*-n (la finpretigado fare de la *Amoraim* post la konkludo de la Miŝnao) pri tiu traktato. Ŝajne oni malpli bone konis la leĝojn de *ŝmita* en Babilono, loĝante malproksime de la lando Israelo. En la Jerusalema Talmudo kaj en ĝia sekva literaturo ili tamen estas detale klarigitaj.

Praktikan signifon tiuj leĝoj ricevis en moderna tempo, post kiam la unuaj grupoj de la Amantoj de Ciono (*Ĥovevej Cion*) komencis alveni al la Lando por denove kulturi la teron per propraj manoj. Subite stariĝis la demando pri la leĝoj de *ŝmita* kaj kion oni devus fari. La unuan fojon oni observis *ŝmita*-n post la longega ekzilo estis en la jaro 5649 laŭ la juda kalendaro (laŭ eŭropa kalendaro tio estas 1888/1889). Kvankam tiu movado de Amantoj de Ciono esence estis religia, oni decidis pro la malfacilaj cirkonstancoj, ke oni devas serĉi vojojn por ĉirkaŭiri tiujn leĝojn. Ankaŭ kelkaj oficiuloj laborantaj por la filantropo Moseo Montefiore agis por malebligi al la terkulturistoj observi *ŝmita*-n. La fina rezulto estis, ke nur malgranda grupo de terkulturistoj en Petaĥ Tikva observis *ŝmita*-n. La plimulto simple vendis sian teron al nehebreaĵoj kaj daŭrigis labori kiel antaŭe (teorie kiel luitaj laboristoj). Ekde tiu unua observado de *ŝmita* la rabenoj dividiĝis en du grupoj. La unua grupo insistis, ke la leĝoj de *ŝmita* devis esti observataj en ilia tuteco<sup>5</sup>. La dua grupo kontraŭe permesis, ke oni vendu la teron al nehebreaĵoj, kondiĉe ke tiuj ankaŭ faru la ĉefan laboron (t.e. ke oni devas lui aldone nehebreaĵajn laboristojn por fariĝi specialajn malpermesatajn taskojn).<sup>6</sup>

La fina decido fariĝis tiu de Abraham Jicĥak Hakohen Kook (*kuk*), la aŝkenaza ĉefrabeno de la juna hebrea kolonio. Li deklaris, ke tiel longe dum la hebreaĵoj posedas nur parteton de la totala areo, kaj aldone al tio, se ili ŝvebas en komerca danĝero ne gardante sian parton de la merkato, ili ne devas observi *ŝmita*-n kaj ili



rajtas vendi (teorie/praktike) sian teron al la nehebrea registaro (tiam turka kaj poste brita). La rabeno Kook ricevis multe da kritiko por tiu ĉi sia decido, kiu parte daŭras eĉ ĝis hodiaŭ, kvankam neniu el liaj tri kondiĉoj plu estas plenumataj<sup>7</sup>.

Jam en la jardeko 1930 la religia partio *Poalei Agudat Israel* komencis starigi kibucojn kaj moŝavojn (*moŝavim*)<sup>8</sup>. Ili formis kreskantan grupon, kiu volis observi *ŝmita*-n kaj ili turnis sin al rabeno Chazon Ish<sup>9</sup> (*Ĥazon iŝ*) por gvido kaj por studi liajn decidojn pri la Sepa Jaro, kiun li klarigis en la libro *Sefer Chazon Ish* (libro de la viziulo) kiun li publikigis en 5698 (1937/1938). Same ili serĉis gvidon en la plano, kiun ellaboris rabeno S. Weiser pri la maniero plej bone observi *ŝmita*-n el pure praktikaj ekonomiaj konsideroj.

Post la sendependeco de la ŝtato Israelo, ties tiama ĉefrabeno Jicĥak Halevi Herzog, aliĝis al tiuj, kiuj postulis plenan observadon de *ŝmita*. Plua paŝo en direkto de observado estis la starigo de Instituto por Agrikultura Esploro adaptita al la Instruoj de la Torao fare de la partio *Poalei Agudat Israel* en 5719 (1958/1959).

La observanta grupo trovis baldaŭ gvidan fortan en rabeno Mendelson, kiu starigis *Moŝav-on Komeniut* en kadro de la junuloj de *Agudat Israel*. Por la Sepa Jaro 5733 (1972/1973) li daŭrigis sian agadon fondante la Centro por terkulturistoj kiuj observas la Sepan Jaron kaj al tiu centro aliĝis 70 sendependaj terkulturistoj.

En la sekva Sepa Jaro 5740 (1979/1980) aliĝis al tiu centro 80 vilaĝoj kaj 1300 terkulturistoj kaj tiu ĉi grupo kreskis en la nuna Sepa Jaro 5747 (1986/1987) al 180 vilaĝoj kaj 3000 terkulturistoj. Oni povas konstati ke pli ol 40 000 dunamoj<sup>10</sup> da tero ĉijare ripozas en Israelo.

La centro, kiun li starigis, celas helpi terkulturistojn kun financaj problemoj, kaj provas ankaŭ trovi aliajn kromokupojn (etindustrio, ktp.) por la terkulturistoj. Oni ankaŭ organizas *kolel*-ojn, kiuj estas religiaj studejoj por edziĝintaj viroj, kaj en ili la terkulturistoj intense studas la leĝojn rilate al la Sepa Jaro kaj profundiĝas en la Talmudo kaj en la juda tradicio.

En la sama maniero, kiel la sabato estas ege grava tago, tiel ankaŭ la Sepa Jaro estas ege grava jaro. La studado de ties leĝoj estas konsiderata kiel la antaŭvenanto de Mesio. Nur la Sepa Jaro kaj la studado de ties leĝoj povas doni al homoj de ĉiu generacio la ideon kaj guston<sup>11</sup> de la Venonta Mondo (*Olam Haba*)<sup>12</sup>.

Jeremi Gishron, Israelo

## notoj

- 1) La vorto "jubilea" kiu aperas en la Esperanta Biblio, London, 1972, ne estas traduko de la hebrea vorto *Ha-jovel* sed nur transskribo kaj Esperantigo. Se oni tradukas oni devas skribi: "la virŝafaj korn-trumpetoj" anstataŭ "trumpetoj" kaj "jubilea korno".
- 2) En kelkaj biblioj oni havas la indikon Jer 31:8.
- 3) En kelkaj biblioj oni havas la indikon Psa 84:4.
- 4) Tiuj hebreoj, kiuj obstine daŭre loĝis en la lando, ĉefe preferis la grandajn urbojn kiel Ĉfat, Jerusalemo, Tveria kaj Ĥevron, kaj ili ne estis terkulturistoj.
- 5) Al tiu grupo apartenis la rabenoj Naftali Cvi Berlin, Josef Dov Solovejĉik, David Fridman, Josef Zefarja Stern kaj Gerŝon Henof.
- 6) Al tiu grupo apartenis la rabenoj Jicĥak Elĥonon Spektor, Jehoŝua Trunk, Ŝmuel Moĵilaver kaj Ŝmuel Zeinvil Klepfis.
- 7) Je la komenco de dudeka jarcento la disputo estis sufiĉe akra. Eliezer Ben-Yehuda (*ben-jehuda*), la patro de la moderna hebrea lingvo, estas ekzemplo pri homo, kiu tro intense miksis sin en la disputo, propagante la malobservadon de *ŝmita*. La rezulto estis ke oni ekskomunikis lin.
- 8) Vilaĝoj kun limigita kunlaboro kaj privata ekonomia respondeco. Ĉiu familio posedas sian teron mem kulturante ĝin, sed oni kunlaboras rilate al maŝinoj kaj vendado, ktp.
- 9) Li estas plej konata per tiu pseŭdonimo. Lia vera nomo estis Abraham Yeshayahu Karelitz (*Jesajahu karelit*), 1878-1953. Li venis al Israelo en la jaro 1933.
- 10) *Dunam* estas turka unuo por areo ĉie uzata en Mezoriento. Ĝi egalas al 1000 kvadrataj metroj.
- 11) "Gusto" estas hebree *ta'am*. Tiu vorto *ta'am* havas en la hebrea lingvo multe pli grandan signifon ol en Esperanto kaj signifas ankaŭ penson, ideon, logikon, komprenon, kialon, juĝon, ktp. Fakte ĝi estas la plej zata vorto por montri profundan racion. *Ba'al Ta'am* estas ambaŭ "persono kun bona gusto" kaj "profunde racia homo".
- 12) Tiuj estas mondo, kiu regas sin mem - kiam plena ekologia ekvilibro estos atingita, oni povus diri.

## Bibliografio

- LEIBOWITZ (Nehama). - *Studies in Vayikra (Leviticus)*, translated from the hebrew by Aryeh Newman. - Jerusalem: World Zionist Organisation, 1980.
- MILLER (M.). - *Shabbat Shiurim*. - London: Gateshead Foundation for Torah, 1969.
- The Pentateuch (Leviticus, part II)*, translated & explained by Samson Raphael Hirsch, english translation by Isaac Levy. - London, 1962.
- Ramban-commentary on the Torah (Leviticus)*, translated by Dr Charles B. Chavel. - New-York: Shilo Pub. House, 1974.

seriozo celanta aŭdigi la plej diversajn voĉojn de Kristanismo: de liberala ĝis ortodoksa, de rom-katolika ĝis protestanta, sendepende de dogmaj limigoj, depost Prækristanismo ĝis la nuna: intern-eklezio, ekumene, interrelegie kaj tutekumare.

aperis ĝis nun nur kelkaj numeroj. Ĉiu estas plene memstara. kiu havas ion seriozan por prezenti, sciigu tion al ni. kiu volas subteni nian entreprenon, ĉu per donaco ĉu per prunto ĉu alimaniere, sciigu tion al ni. diskonigu niajn eldonaĵojn!

jam aperis:

- 1 La Evangelio laŭ Petro & La Morto de Jesuo kaj kio posteo? apokrifaj evangelioj kaj esoo originala. 12 pag. 1,80 guld. dua eld.
- 2 Tertuliano - Apologio (el la jaro 197 p.Kr.) gravega latina verko el la frua eklezio. trad. de Gerrit Berveling. 116 pag. 9,90 guld. dua eld.
- 4 Al Diogeno. apologieto el la komenco de la 2a jc. el la helena de Isai Sumber. 16 pag. 1,80 guld. dua eld.
- 5 Kenneth Twinn - Unitarismo; skizo pri la kredoj historio kaj organizo de la religioj nomataj Unitarianoj. la aŭtoro estas unitaria pastro. 24 pag. 1,80 guld.
- 7 Gerrit Berveling - Dio/Kristanismo/Aliaj Religioj. studaĵo pri 'teologio de la religioj'. 36 pag. 4,20 guld.
- 8 La Evangelio laŭ Maria Magdalena. prelego kaj traduko de la restantaj fragmentoj de ĉi apokrifaj evangelioj. grava pri la rolo de virinoj en la frua kristanismo. 12 pag. 1,80 guld.
- 9 Jam tempo estas!; la "kairos-dokumento" de Sudafrika kristanoj. kontraŭ ras-apartheid. 32 pag. 4,20 guld.
- 10 Boatrijs. mezepoka romkatolika Maria-legendo. el la nederlanda. 24 pag. 3 guld.
- 11 Isai Sumber - Kie oni trovas tion en la Korano? malgranda konkordanco. 32 pag. 4,20 guld.
- 12 Tertuliano - Kuraĝigo por la Martiroj. por edifo de estontaj martiroj en Kartago, ĉ. 197 p.Kr. el la latina. 12 pag. 1,80 guld.
- 13 Kantu al la Eternulo. kantaro de (ĉefe ĉefaj) kristanoj. trad. el diversaj lingvoj de Jiri Korinek k.a. 44 pag. 6 guld. dua eld.

estas en preparo i.a.:

- 3 Sin-konservo. esooj kaj predikoj pri nukleaj armiloj kaj Kristanismo. dua eld.
- 6 Ekzegeza komentario pri JOHA.

krome prepariĝas verkoj (i.a.) pri la pozicio de la virino en Judismo pri religio kaj moralo pri samseksemo kaj Kristanismo poemaro el la K.E.L.I.-rondo k.m.a.

Eld. VoKo,  
Coornhertstraat 50,  
3132 GK VLAARDINGEN,  
NEDERLANDO.

mendojn al U.E.A. aŭ Esperanto-Centro Paderborn aŭ rekte ĉe VoKo.

LA NATURO EN APOKALIPSO

La libro Apokalipso enhavas la Dian planon de savo de la Eklezio de Kristo kaj de la homaro.

Apokalipso, el la greka lingvo, signifas malkaŝon. En la unua ĉapitro kaj en la unua versiklo estas skribita:

"APOKALIPSO de Jesuo Kristo, kiun Dio donis al li, por montri al siaj servistoj tion, kio devas baldaŭ okazi; kaj Li sendis kaj montris ĝin per Sia anĝelo al Sia servisto Johano."

Tio signifas, ke Dio la plejpotenca, havante en Si la sekreton de Sia plano de savo, malkaŝis ĝin unue al Sia solenaskita Filo, rilate al la maniero kaj al la tempo. Ekz-e, kiam Jesuo ankoraŭ vivis sur la tero, li tiam ankoraŭ ne sciis pri la horo kaj tago de sia dua alveno (Mat 24:36; Mk 13:32), sed li jam sciis pri tio post sia releviĝo (Apo 5:1-5). Dio la Plejaltulo, la Patro de Jesuo Kristo, permesis al Sia Filo malfermi la libron, la simbolon de la Dia plano de savo.

En la libro Apokalipso ni vidas la naturon, sed ĝi havas simbolan signifon; ni vidas en ĝi valojn, montojn, maron, riverojn, fontojn de akvo, kaj ankaŭ diversajn bestojn, birdojn, brutojn. Ni vidas ankaŭ akridojn, kiuj inverse ne manĝas herbon, sed

"Ili havas la povon turmenti homojn, kiel la skorpioj, estas en ili ordonite, ke ili ne difektu la herbon de la tero, nek ian verdaĵon, nek ian arbon, sed nur tiujn homojn, kiuj ne havas sur la frunto la sigelon de Dio." (Apo 9:2-5)

Sed ni havas ankaŭ la belan simbolon de nia Savanto Jesuo Kristo - el la dombestoj, brutoj - la Ŝafido de Dio!

Ni vidas ankaŭ la riveron de la eterna vivo, elfluantan el la trono de Dio kaj de la Ŝafido (Apo 22:1). Sur ambaŭ bordoj de la rivero estas arboj de vivo (v. 2, 14, 19).

En la apokalipsa libro ni rigardas sovaĝajn bestojn - sed tre mirindajn - ĉar tiaj bestoj ne ekzistas sur la tero, kun dek kornoj, sep kapoj (13:1-2); estas ankaŭ mirinda drako, havanta sep kapojn, dek kornojn (12:3). Tio ankaŭ estas simbolo.

En la 21-a ĉapitro de Apokalipso ni rigardas la malnovan teron kun ĝiaj apartenaĵoj, kiel ĝi forpasas, kaj la novan teron, kiel

## LA NATURO EN APOKALIPSO

Ĝi komencas ĝian estadon sub la influo de la nova ĉielo. La malnova ĉielo ankaŭ forpasis, kaj la maro jam ne ekzistis (21:1-4).

Kiel en la naturo sur la tero la ĉielo havas sian influon sur la teron - la suno, luno, steloj, aero, ktp., tiel sur la teron kaj ĝian naturon en la simbola signifo havas la simbola ĉielo, suno, luno, steloj, aero.

Estas en Apokalipso aĵoj, personoj, tempoj, kiuj estas realaj, laŭliteraj, ne metaforaj. En iuj lokoj de Apokalipso, ekz-e la nombroj 1, 2, 3 ktp. estas laŭliteraj ; personoj - Dio, Jesuo Kristo, la Diablo - estas laŭliteraj, sed la Diablo estas alie prezentata kiel Drako (12:12,7,9). Ankaŭ la mil jaroj de la regado de Kristo estas laŭliteraj, kvankam la libro Apokalipso estas libro plena de simboloj ? Laŭ la hebrea luna jaro, unu jaro entenas 360 tagojn. Kaj do laŭ 2 Pet 3:8 360-oble 1000 estus 360 000 jaroj. Ĉu oni ne devas tiel kalkuli ? Inverse la apostolo Paŭlo en Agoj 17:31 diras, Dio "difinis tagon en kiu Li juĝos la mondon en justeco per tiu viro, kiun Li elektis."

Akurate Paŭlo parolas pri la tago en la simbola signifo, akorde kun 2 Pet 3:8, kiu klarigas al ni, ke

"Ĉe la Sinjoro unu tago estas kiel mil jaroj."

Kaj do, en Apo 20:2-7 estas laŭliteraj jaroj, kiel ni homoj kalkulas.

Ni devas interpreti unu versiklon de la Sankta Skribo per aliaj tekstoj de la Sankta Skribo, kaj ne per la propraj homaj interpret-aĵoj.

Se estas skribite, ke "la malnova tero forpasis", tion ni ne povas kompreni en la laŭlitera signifo, ke la terglobo estos detruita kaj la nova kreita. Ni havas tiajn tekstojn en Pre 1:4 kaj en la profetaĵo de Jesaja 45:18 :

"Generacio foriras kaj generacio venas, kaj la tero restas eterne."

"Ĉar tiele diras la Eternulo, la kreinto de la ĉielo, Li estas Dio, la farinto kaj estiginto de la tero, Li ĝin aranĝis ; Li kreis ĝin, ne por ke ĝi estu malplena ; Li faris ĝin por ke ĝi estu loĝata."

Havante la superajn citaĵojn de la Sankta Skribo, ni devas akcepti, ke la esprimo "la malnova tero forpasis" devas esti komprenata en la simbola signifo.

Estas naturo surtera, ĉiela kaj ankaŭ Dia (2 Pet 1:4).

Nun mi klarigos malŝonge la simbolan signifon de ĉiuj aĵoj, objektoj, estaĵoj, de ĉiuj apartenaĵoj, komencante de la Ŝafido, kiu estas la grava viva estaĵo en la Dia plano de savo.

## EVANGELIAJ KAJEROJ

La Ŝafido (5:6-13 ; 6:11 ; 7:10 ; 13:8 ; 14:1,4,9,14,17 ; 12:11 ; 15:3 ; 17:14,7,9 ; 21:9,14,22-23,27 ; 22:1,3)

JESUO KRISTO kiel ofero pro la peko de la Eklezio de Kristo kaj de la homaro (Jes 53:7, profetaĵo pri Jesuo Kristo kiel ofero pro la peko ; Joh 1:9, plenumiĝo de la profetaĵo; Agoj 8:32, Filipo klarigas la plenumiĝon de la profetaĵo de Jesaja 53 al etiopa viro, potenculo sub Kandake, reĝino de Etiopujo; 1 Pet 1:19 , Dio kiel la aŭtoro de la savo antaŭdifinis Sian Filon, por ke li estu la Ofero pro la peko de Adam kaj en li de la homaro. Dio ankaŭ antaŭvidis, ke la homo pekos (1 Kor 15:22 ; Rom 5:17-19) ; 1 Kor 5:7, Jesuo kiel tipo de la Ŝafido oferita por la savo de la unuanaskitoj (Eli 12:2-14).

La sango de la Ŝafido (kp. Rom 4:24-25 ; 5:1,19,21)

La Vivo de Jesuo, nia Savinto, oferita por nia pravigo.

La kornoj de la Ŝafido (7 kornoj, 7 okuloj)

Laŭ la komento de Apokalipso mem :

- "la sep Spiritoj de Dio, senditaj sur la tutan teron (1:4c ; 3:1a ; 4:5b ; 5:6d). La Sankta Spirito en ĉiuj lokoj skribas pri la Dia Spirito en singulara formo (1 Kor 12:1,13). Estas klarigata Psa-on 104:4 en la epsitolo al la Hebreoj 1:7, ke Dio "faras ventojn Liaj senditoj."<sup>2</sup> Laŭ tiuj tekstoj supre menciitaj, la "sep spiritoj", "sep kornoj", "sep okuloj" kaj "sep fajraj torĉoj" kaj "sep steloj" estas la sep anĝeloj de la sep eklezioj (1:20). La "sep torĉoj" estis instalitaj sur la "sep lampingoj". Ĉi tiuj anĝeloj de la sep eklezioj ne estas spiritaj estaĵoj, sed homaj instrumentoj uzitaj de Dio, nia Patro, por la bono de la tuta Eklezio de Kristo el la sep periodoj de la Evangelia aĝo, komencante de la juda festo de Pentekosto, kiam estis elverŝita la Sankta Spirito sur la Eklezion.

Johano klarigas en 1 Joh 4:1-6, ke "spirito" estas tiu, kiu instruas, profetas, konfesas.

"La korno" estas simbolo de ia povo, aŭtoritato<sup>3</sup>.

"La sep kornoj de la Ŝafido" : la povo, aŭtoritato de nia Sinjoro Jesuo Kristo plenumita pere de la sep anĝeloj, kiuj plenumas siajn funkciojn de lumistoj (steloj, fajraj torĉoj), inspektistoj, kontrolistoj (okuloj)<sup>4</sup>.

La kvar kreitaĵoj (4:6-9 ; 5:6,8,11,14 ; 6:1,3,5-7 ; 14:3 ; 15:7 ; 19:4)

## LA NATURO EN APOKALIPSO

Kvar ĉefaj atributoj de Dio, la Plejpotenco :

Leono Justeco (Sen 28:1 ; Psa 89:14)  
Bovido Povo, potenco (Psa 97:2 ; 68:3-4 ; Sen 14:4)  
Homa vizaĝo Amo (Gen 1:27 ; 1 Joh 4:8 ; Jer 31:3)  
Aglo fluenta Saĝeco (Rea 32:11 ; Ijob 39:27-30 ; 12:13 ; Jes 55:9).

Komparu kun Jefa 1:10 ; 10:14...

La vitra maro (4:6)

1. La Dia Vorto havanta la purigan povon (2 Kor 7:1 ; Heb 10:22)
2. La Dia povo penetranta ĉion, vidanta ĉion (Heb 4:13).

La ĉielarko (4:3)

La konkreta Dia promeso kaj Lia interligo (Gen 9:11-18 ; Jes 54:9-12)

La fulmoj (4:5)

Klerigado, Dia, ne homa, sed ne tiel, kiel de la suno (Psa 97:4). Tio rilatas al la mondo, ne al la Eklezio.

Voĉoj kaj tondroj (4:5 ; 8:5 ; 11:9)<sup>5</sup>

Voĉoj : eldiroj de diversaj personoj, de grupoj de homoj, kaj ankaŭ de Dio kaj de Liaj anĝeloj (en simbola kaj laŭlitera signifoj).

Tondroj : fulmotondroj kiel hodiaŭ nomitaj, estas demonstracio de la povo de Dio<sup>6</sup>. Plej frue estas fulmo, poste estas aŭdata tondro. La fulmoj reprezentas Diajn penetrantajn verojn, kiuj kritikis malbonajn agojn. Tondroj, fulmotondroj reprezentas Diajn juĝojn, verdiktojn. En la kazo de 8:5 kaj 11:9 la tondroj povas reprezenti disputojn koncerne certajn temojn, aferojn. Kiam Dio, la Plejaltulo, kun Sia Filo, komencas regi super la mondon, tiam "estiĝis voĉoj, tondroj kaj tertremo", estis reago pro tio, iuj reagis bone, iuj malbone, diskutis akre kun aliaj.

Tertremo (8:5 ; 11:19)

Tertremoj estas ne raraj okazintaĵoj en nia surtera naturo kaj ili estas neagrablaj okazintaĵoj por la homoj, nacioj. Sed tertremo menciita en la libro Apokalipso ne estas laŭlitera tertremo, sed metafora. Eĉ hodiaŭ politikistoj, ĵurnalistoj memoras pri la soci-politika tertremo, kiu okazis en Pollando en 1980.

Estas plenumota ankoraŭ unu tertremo, "granda tertremo tia, kia ne okazis de kiam homoj estiĝis sur la tero, tia tertremo, tiel granda" (16:18 ; 11:19). Tio estos paralela okazintaĵo, kiu estas antaŭdirita pere de Jesuo pri "granda aflikto tia, kia ne estis de

## EVANGELIAJ KAJEROJ

la komenco de la mondo ĝis nun, nek iam estos" (Mat 24:21-22 ; kp. kun Dan 12:1). Tiel estas skribite en Eliro (12:12 ; 11-6) pri figura (tipa) tre granda aflikto<sup>7</sup>.

La profeto Elija havis viziojn : 1. pri la ventego, 2. pri tertremo, kaj 3. pri fajro (1 Reĝ 19:11-12). Ĉi tiuj bildaj vizioj de Elija faritaj de la Eternulo estas la samaj, kio estas la veoj en Apokalipso de Johano (8:13 ; 9:12 ; 11:14).

Granda hajlo (8:7 ; 11:19 ; 16:21)

Hajlo estas unu el la neagrablaj kaj katastrofigaj elementoj de la naturo, kiuj regas de la tempo de la granda diluvo (Gen 8:22c). Hajlo estas pluvo glaciiginta en atmosfero pro la malvarmo, kiu ekestas pro subita malvarmiĝo de la aero en la nuboj, se ne subita tiam la akvo troviĝanta en la atmosfero ŝanĝiĝas en neĝon (vidu Ijob 38:22-23,30 ; Psa 105:32 ; 148:8). Antaŭ la diluvo hajlo ne estis konata.

Hajlo estas simbolo de akra vero. La modera pluvo estas simbolo de la Dia Vorto alportanta konsolon, sed pluvego inundanta ankaŭ estas katastrofo por homoj, tiel ankaŭ la simbola pluvego, inunda Dia vero inundas regionojn de diversaj mensogaj doktrinoj (vidu Jes 28:17). Inunda akvego estas simbolo de ia invado de fremda armeo ankaŭ (Jer 47:2 ; 51:64).

En la profetaĵo de Ĥagaĵ staras skribite, ke Dio ankaŭ ekmovigos la ĉielon kaj la teron, la maron kaj la sekteron (2:6). Ĉi tio estas en akordo kun la vortoj de Jesuo, ke "la potenco de la ĉielo ŝanceliĝos", aliloke Jesuo antaŭdiris akorde kun Jesaja, Joel kaj Apokalipso<sup>8</sup>.

Ĉielo

En ĉi tiuj supraj profetaĵoj pri la ĉielo, ke ĝi ŝanceliĝos kaj forpasos, tio ne estas skribita pri la laŭlitera ĉielo, sed en la metafora signifo.

Kio estas komprenata per la metafora, simbola, ĉielo ?

Ni legas en Readmono 32:1 :

"Atentu, ĉielo, kaj mi parolos ; kaj aŭdu la tero la vortojn de mia buŝo."

Tie la "ĉielo" estis reprezentata de la pastraro kaj de la Levidoj. Tio estis la simbola ĉielo por la izraela nacio. Kaj la "tero" estis tie reprezentita de la izraela civito. La laŭlitera tero ne povas aŭdi la vortojn de iu parolanta homo. Kaj ankaŭ la laŭlitera "ĉielo" (Gen 1:7-8) ne povas aŭdi la vortojn de iu homo. Nur la metafora "ĉielo" povas aŭdi.

## LA NATURO EN APOKALIPSO

La suno, la luno kaj la steloj (8:12 ; 6:12 ; 9:2 ; 12:1 ; 19:17 ; 21:33)<sup>9</sup>

La supraj tekstoj estas en la simbola signifo.

En unu signifo, Dio, nia ĉiela Patro estas por ni kiel la "suno"<sup>10</sup>.

Ankaŭ nia Sinjoro Jesuo Kristo estas kiel la "suno", la "lumo" de la suno<sup>11</sup>.

La Evangelio de Kristo estas ankaŭ la simbola suno (vidu 12:1 ; 2 Kor 4:4-6).

La Eklezio de Kristo, kiam ankoraŭ en la korpo sur la tero, estas simboligita per "virino". Ĉi tiu virino estas survestita per la suno, per la lumo de la Evangelio de Kristo. Kaj la luno sub ĝiaj piedoj, la doktrinoj el la Malnova Testamento, kaŝitaj en tipoj, figuroj, estas apogoj por la Eklezio de Kristo. Jesuo, kiam li estis sur la tero, ofte citis la Vortojn de Dio el la Malnova Testamento. Kaj ankaŭ la apostoloj citis la Vortojn de Dio. "Kaj sur ŝia kapo krono el dek du steloj", doktrinoj, instruoj de la dek du apostoloj "de la Ŝafido".

La ĉielaj kreaĵoj, suno, luno, steloj, aero, influas sur la naturon de nia ĉero. Tiel same en la simbola signifo. La religiaj aŭtoritatoj, instruoj, ktp. influas sur la socian surteran ordon.

Rivero de akvo de vivo (22:1-2)

"La akvo", kies fontoj estas la grava elemento de la surtera naturo, estas tre bezona por la homa vivo en la laŭlitera signifo.

Jesuo, nia Sinjoro, oferis al unu virino el Samario "la akvon de la eterna vivo" por akvo el la fonto, el kiu ŝi ĉerpis por hejmaj bezonoj (Joh 4:4-10). En la 14-a versiklo, Jesuo diras al la samarianino :

"Sed kiu trinkos el la akvo, kiun mi donos al li, tiu neniam soifos ; sed la akvo, kiun mi donos al li, fariĝos el li fonto de akvo, ŝprucanta supren por eterna vivo."

Nun ni iros al alia regiono de la naturo en Apokalipso, nome al montoj, montetoj, riveroj, fontoj, maro, kavernoj, rokoj, insuloj, abismo<sup>12</sup>. Kaj inter ili ni vidos diversajn bestojn : ĉevalojn (6:1-8), sovaĝajn bestojn, sep-kapajn kaj dekkornajn (13:1-7 ; 17:7-12), beston dukornan (13:11-16), drakon sepkapan kaj dekkornan (12:3), akridojn (9:3-6), aglon (8:13). Kaj ni vidos ankaŭ rikoltajn kampojn kaj vinberejojn (14:14-20), kaj ni vidos ankaŭ nubojn (1-7 ; 14:14).

## EVANGELIAJ KAJEROJ

Ni vidos ankaŭ diversajn metalojn, oron, arĝenton, kupron, feron<sup>13</sup>, kaj ankaŭ altvalorajn ŝtonojn<sup>14</sup>. Kaj estas ankoraŭ elementoj kiel tiaj : sulfuro<sup>15</sup> kaj fajro<sup>16</sup>.

"Fajro povas deveni 1. el la ĉielo, el fulmotondroj<sup>17</sup>, 2. el sub la tero, kiel vulkano<sup>18</sup> (enteraj kaj surteraj elementoj de la tero frülüigataj par lavango) 3. fajro uzita de homo<sup>19</sup>, 4. fajro el antaŭ la Eternulo<sup>20</sup>.

Montoj : regnoj, regnaj aŭtoritatoj<sup>21</sup>.

Rokoj : sociaj fortikaĵoj, organizoj, asekur-societoj<sup>22</sup>.

Por la popolo de la Eternulo, Dio estas forta roko<sup>23</sup>.

Riveroj : diversaj eklezioj, kun iliaj grupoj, kiuj konsistigas kristanismon (povas esti ankaŭ eklezioj de paganismo)

Jer 47:2 inunda rivero : invadanta armeo de iu nacio.

Fontoj : fondintoj de iuj religioj, ideologioj, sed la fondinto de la vera religio, "la fonto de viva akvo" estas la Eternulo, la Dio<sup>24</sup>.

Maro : homamasoj ne volantaj esti sub ia ajn leĝo (Jes 57:20).

Kavernoj : (6:15 ; Jes 2:19) ligoj, sekretaj societoj

Insuloj : respublikoj (16:20). La laŭliteraj maro, tero, insuloj restos interne<sup>25</sup>, sed la respublikoj estintaj el revolucio, "maro", malaperos, cedante la lokon al la regado de Kristo.

Abismo : laŭ Gen 1:2 la grandaj masoj de akvoj ŝvebantaj alte super la tero (Sen 8:28) nimiĝis "abismo" kaj ili estis fonto de la maro, kaj dum la tutmonda diluvo en la dua epoko de la kreado (Gen 1:6-7) estis pra-maro kovranta la tutan teron, poste aperis kontinento (v. 9). Tia pra-maro estis nomita "abismo", poste la restanta akvo super firmaĵo falis en la diluvo, kiu ankaŭ estis tutmonda, sed kiel puno pro grandaj pekoj de la "unua mondo" (2 Pet 3:6). Abismo en la simbola signifo reprezentas grandajn revoluciajn masojn. Abismo estas sinonimo de la maro (Eli 15:5).

Ĉevaloj : doktrinoj, ideologioj (6:1-8). Laŭ 19:11-16, "blanka ĉevalo" : la pura doktrino de la vero de Kristo. "Rajdisto sur blanka ĉevalo" : nia Sinjoro Jesuo Kristo.

Oro : (3:18) La Dia naturo (2 Pet 1:4)

Arĝento : spirita, sed pli malalta ol Dia (Mal 3:3 ; 2 Tim 2:20)

Kupro : la perfekta, homa naturo

Fero : malperfekta homa naturo.

Karol Baklarz, Pollando  
mallongigita

## LA NATURO EN APOKALIPSO

### NOTOJ

1. Apo 5:6-13 ; 6:1,16 ; 7:10, 14, 17 ; 13:8 ; 14:1, 4, 9 ; 17:14 ; 19:7,9 ; 21:9, 14, 22-23, 27 ; 22:1, 3.
2. Aliaj tradukoj havas : Septuaginto (103:4) havas : *Ho poiñn tous aggelous (angelus) autou pneumatata, kai tous leitourgous (liturgus) autou pur flegon.* (la faranto la anĝelojn Siaj spiritoj kaj liajn servantojn flamanta fajro).
3. 2 Sam 22:3c ; vidu pliajn tekstojn : Psa 89:17 ; 92:10 ; Plo 2:3,17 ; Jeŝ 29:21 ; Miĥa 4:13 ; Zeĥ 1:18-19 ; Lk 1:69.
4. Rea 11:12 ; 2 Kro 16:9 ; Psa 5:5 ; 66:7 ; Sen 15:3 ; Jeŝ 5:11b ; 7:4,9 ; 8:18 ; 9:10 ; Amos 9:2-5,8 ; Heb 4:13. Vidu ankaŭ similan vizion pri la "sepaĵ okuloj" sur la ŝtono (Zeĥ 3:9 ; 4:10).
5. Komparu kun tekstoj : Psa 29:3-5 ; 18:13-15 ; 77:17-18 ; 97:4 ; 76:6-8 ; Ijob 37:5 ; 40:9 ; Pre 12:14 ; 1 Kor 4:5 ; Jer 23:29a.
6. Vidu 1 Sam 2:10 ; 7:10 ; 2 Sam 22:14 ; Ijob 40:4 ; Psa 18:14 ; Joh 12:29
7. Vidu ankaŭ Jeŝ 38:14-39:13, 21-29 ; Zeĥ 12:2-14 ; 14:1-13 ; Joel 3:1-17. La ĉi supre menciitaj profetaĵoj ankoraŭ ne estis plenumitaj, sed ili baldaŭ plenumiĝos.
8. Jes 13:13 ; 34:4 ; 51:6 ; 65:17 ; 66:22 ; Joel 2:10 ; 3:16 (Mat 24:35 ; Mk 13:31 ; Lk 21:33 ; Heb 12:26 ; 2 Pet 3:7-13) ; Apo 21:1.
9. Vidu ankaŭ Joel 2:10 ; 3:15 ; Agoj 2:20 ; Jes 30:26 ; Mal 4:2.
10. Psa 84:11a ; 1 Joh 1:5 ; Jak 1:17.
11. Joh 1:9 ; 3:19 ; 9:5 ; 8:12 ; 12:35-36,46 ; Mat 4:16.
12. Apo 6:14-16 ; 7:1-3 ; 8:8-10 ; 9:2,14 ; 16:3-4,12,20 ; 17:1,8-10 ; 12:12.
13. o. Apo 3:18 ; 9:7 ; 17:4 ; 18:16 ; 21:18,21. a. k. f. Apo 18:12.
14. Apo 17:4 ; 18:16 ; 21:11-20.
15. Apo 9:17-18 ; 14:10 ; 19:20 ; 20:10 ; 21:8.
16. Apo 8:5,7 ; 9:17-18 ; ktp.
17. Eli 9:23 ; 1 Kro 21:26 ; Ijob 1:6.
18. Ijob 28:5 ; 2 Pet 3:10.
19. Gen 22:6 ; Eli 35:3
20. Lev 10:2 ; Nom 11:1 kaj aliaj tekstoj.
21. Zeĥ 4:7 ; Jer 51:24-32 ; Miĥa 6:1-2 (simbola signifo)
22. Psa 44:3b ; 146:3 ; 118:8-9 ; Jes 44:8e.
23. 2 Sam 22:3 ; Psa 18:2 ; 31:2-3 ; 42:9 ; 62:2 ; Jes 26:4.
24. Jer 2:13 ; 17:13 ; Joh 17:17 ; Rom 1:19-24.
25. Vidu Psa 72:8 ; Jes 11:9 ; Pre 1:4b ; Jes 45:18 ; 42:4 ; 51:5 ; 60:9.

## EVANGELIAJ KAJEROJ

### LA MODERNA HOMO INTER EKOLŜGIO KAJ EKONOMIO

Kiam ni legas ĉi tiun temon, ni tuj demandas nin : kion ni intencas diri per la esprimo : la moderna homo ? Kiu li estas ? Kiel li aspektas ? Kion li volas ? Ĉu li volas akiri lukson ? Ĉu li strebas al pli bona ofico, per kiu li povos gajni pli da mono ?

Aŭ ĉu la moderna homo ĝuste intencas atingi la malon ? Malpli da zorgo por la propra mi, kaj pli da atento por la proksimulo ? Ĉu moderna en tiu kazo similas je modera ? Ekz-e agadi kontraŭ la difekto de la naturo, entute de la ekologio ? Kaj kiel ?

Kaj kio signifas por li ekonomio ? Ĉu pli kaj pli konkurenci per novaj eblecoj en la tekniko ? Nun jam gravedaj virinoj en fabrikoj pri miniaturo-komputiloj riskas la sanecon de si mem kaj de sia estonta bebo. Eksperimenti per atomenergio ? Kie restas la eluzita materialo ? Nun jam neneniĝas granda parto de la tero.

Aŭ ĉu la moderna homo komprenas, ke ni jam atingis la limon de la ekonomia kreskado ? Ni nomas tion la ekonomio-de-la-sufiĉo. Precipe kristano devas scii pri tio, kaj doni propran ekzemplon. Jam sufiĉe da homoj havas eĉ ne la minimuman rimedon kaj monon por bone kaj sane vivteni sin, eĉ en la tiel nomataj riĉaj landoj. Kaj ĉu ni ne havadas sufiĉe ?

Ni devas agadi kontraŭ tiu misuzo de la teraj sufiĉegaj abundaĵoj ! Kaj se ni tamen ankoraŭ kuraĝas preĝi ĉu Dio volas forigi la malsaton en la mondo, tiam ni aŭdas interne, se almenaŭ ni bone aŭskultas, la Dian voĉon, kiu diras : "Sed, miaj karaj, MI kreskigas sur la tero abundon da nutraĵoj por ĉiu homo ; vi nur devas honeste kaj juste kaj ĝuste DIVIDI tion inter la monda popolo."

Lao-Tse jam diris en la pasinteco :

"Havi sufiĉon estas feliĉo, sed havi pli ol sufiĉe estas malutile."

Kaj tio koncernas ĉiujn aferojn, sed precipe la nutraĵon kaj la monon. Ni devas voki al la ekonomia ekspansio : "Halton !" Ni devas NE cedi je pli kaj pli da danĝeregaj eksperimentoj, kies sekvoj ni eĉ ne scipovas antaŭvidi. Ne nur mem halti ĉe la limo de la sufiĉo, sed ankaŭ aliajn instigi fari la samon.

Eble ĉe ĉiuj kuŝas tiu limo ie aliloke. Ĉu ni vere devas posedi televidilon ? Eĉ du aŭ tri aparatojn, por ĉiu infano aŭ por ĉiu ĉambro ?

Ĉu ni vere bezonas aŭton, eĉ plurajn en la familio, kaj unuope veturi al nia laboro, kun hor-longaj atendoj en vicoj por la densa trafiko ? Ĉu ni vere bezonas havi la plej modernan lavmaŝinon, video-aparaton, duan domon, ruldomon, velŝipon, veltabulon, hejman komputilon, promen-kasetilon, ktp. ?

Mi mem havas nenion el tiuj aferoj, kaj tamen mi estas abunde feliĉa kaj kontenta. Kiel mi ne aĉetis tiujn artikolojn ? Ĉar tiam mi ne havas monon por helpi kaj apogi la multegajn help-bezonajn kunhomojn. Mi ne fumas, ne drinkas alkoholaĵojn, ne manĝas viandon, kaj ne nur mi, sed ankaŭ mia tuta familio. Ĉu merito ? Neniel ! Ĉu pia ? Nepra ne ! Ĉu kialo por esti fiera ? Nenia ! Ĉar mi estas nur pli feliĉa pro tio, kaj eble tio estas nur sekvo de bona eduko de miaj karaj gepatroj kaj de mia unika edzo. Eble tio estas ankaŭ nur sana sento, kiu ne volas sekvi ĉion, kion havas alia homo. Sed plej gravas certe la sufero de Kristo, kiu faris tion por bonigi kaj feliĉigi nin, kaj kiu donas al mi malfermitajn okulojn kaj orelojn, aŭdantajn la vivmanieron, kiun Dio priskribas al mi. Kaj estas nur ĝojo klopodi plenumi ĝin.

Ĉe la ekonomio-de-la-sufiĉo la ekologio bonfartas ! Ne uzado de daŝeraj nutraĵoj (la korpo ja estas la templo de Dio !), dum estas sufiĉe da nutrigaj aĵoj, kaj tiuj donas pli da spaco por la defendo de la medio, kiu jam estas venenigita.

Ĉu mi estas kontraŭ teknika progreso ? Ne, sed ni devas esti atentega pri la falpuŝo, la kaptilo de la tekniko. Tiam nia homa intelekto malaperas kaj ni fariĝas robotoj sen sento, sen amo, sen atento unu por la alia. Se ni ne agas kontraŭ la misuzo de la naturo, ni estas malbonaj administrantoj de la tero, kiun Dio donis al ni por gvidi ĝin laŭ bonaj vojoj. Kaj tio koncernas ne nur la homojn, sed ĉion vivantan sur ĝi. Laŭ la ekonomio-de-la-sufiĉo ni nepre estu probatalantoj de la jubilea sistemo laŭ la Biblio.

Laŭ la enkonduko de la tiel nomata Sabat-jaro, oni povas redukti ĝis la duono la senlaborecon, kiu pligrandiĝis pro la uzo de aŭtomataj aparatoj. Ekz-e, se la duono de proksimume 5 milionoj da homoj post ĉiu 7-a jaro estas unu jaron libera, tiam ekestas proksimume 350 000 laborlokoj, kiuj bezonas novan dungiton. Tiuj novaj dungitoj povas anstataŭi por unu jaro liberigitan personon, kaj denove post unu jaro alian libertempulon. La liberigito povos uzi la tempon ekz-e por studado aŭ por kreiva okupo, aŭ por multaj aferoj, por kiuj li, ĉe la ofte daŭre profund-intensa laboro, ne trovas tempon. Tiu libera jaro donos al li ripozon, malstreĉon, atenton por aliaj gravaj aferoj, mallonge, ĝi tre bone efikas kaj por la persona saneco, kaj por la etoso en la familio, kaj por la

ekleziaj intereso kaj laboro, kaj por la eduko de la infanoj, kaj por la geedzaj kaj amikaj rilatoj, kaj por la tuta medio ! Kaj tiu vorto li kompreneble same rilatas al Ŝi !

Junaj ekonomoj, ligitaj al la scienca oficejo de la *Evangelische Volks Party* (Evangelia Popol-Partio) en Nederlando prilaboras ĉi tiun teron kaj venas je ĉi tiu sensacia rezulto ! Vere pripensenda ! Nun multa kreivoj malaperas ! Post tiu libera jaro la homo revenos kiel freŝa vento kaj komencos denove kun granda ĝojo kaj energio sian laboron.

Kiel ni devas financi la tutan sistemon ? Nu, la nombro de impostpagantoj kreskegas tiam kaj la nombro de subvencijaj pagoj malgrandiĝas. Se la liberulo konsentas en tiu jaro ricevi 80 % de sia normala salajro, ĈIU povos vivteni sin.

Nun tempe en la ekonomio maljunaj homoj ne plu valoras por la prospero. Malgraŭ ke estis ĝuste ilia generacio, kiu zorgis, ke la ekonomio pli kaj pli evoluiĝis, en kelkaj landoj ĝis ekstrema alteco, nun tiu sama generacio malpli estas prikalkulata kaj devas kiel la unua malpli ricevi, kiam la ekonomio pro iu ajn kaŭzo devas malpligrandigi la elspezojn kaj subvenciojn por ne plu laborantaj maljunuloj. Cetere, la ĉiam malriĉaj homoj estas en tiu malevola situacio denove la viktimoj.

Pli kaj pli ni devas fariĝi partneroj unu de la alia, ne nur inter homoj, sed inter ĉiuj vivantaj estaĵoj. Ne la libereco estas la plej grava, sed la vivo. Por tio ni devas havi respekton kaj amon.

La malpurigo de la ekologio donas al la homoj strangajn, ofte nekuraĉeblajn malsanojn. Je la fino de la jaroj sesdek montriĝis la problemoj. La riveroj rapide malpurigis, la fetoro en la urboj densiĝis. La naturo devis cedi al urboj kaj aŭtovojoj. Scienculoj avertis nin pro la nevideblaj kaj neantaŭviditaj sekvoj de la ĉiam pli grandaj, ne-necesaj produktaĵoj. La materialoj, kiel ekz-e asbesto, donas kanceron, la fumado kanceron kaj astmon, kaj ekzistas grandega danĝero por kemiaj katastrofoj kaj eksplodoj. La klimato ŝanĝiĝas pro tio, la oceano veneniĝas pro la enĵetado de la neuzablaj kromproduktoj kaj la defalaĵo de nukleaĵo nenie povas eliminiĝi.

Ĉu ne estas nia tasko, kiel kristano, kiel mondĉivitano, ne nur averti, sed ankaŭ agadi kontraŭ la venenigo de la tero ? Sed kristanoj ĝenerale ne tre ŝatas agadi. "Ni ja devas obei niajn reĝimojn !" Kaj ne obei Dion mem ? Ĉu Li ne donis al ni la taskon prizorgi la teron kaj ĉion sur ĝi ?

En la kapitalisma ekonomio, la ekologio ne havas multan valoron. Nur la krudmaterialo, kion ni povas tiri el la ekologio, valoras. Kaj la kostojn devas pagi la popolo ! Nur ekologiaj aranĝoj, pri kiuj la industrio havas intereson, estas prikalkulataj. Nur gajno de pli kaj pli da mono estas la nuntempa kriterio. Kaj tio signifas malbonajn laborcirkonstancojn por la laboristoj kaj por la dungitaj fremduloj, kiuj serĉis sekuran lokon en nia lando, kaj ankaŭ ĝenadon por la enloĝantoj. Ofte industriistoj kontraŭstaras la ekologiajn aranĝojn de la registaro. Ĝis nun diversaj registaroj estas tre obeemaj al la potencaj entreprenistoj, koste de la medio kaj koste de nia saneco kaj sekureco.

Ĝuste kristanoj, kiuj kredas, ke la homoj ricevis de Dio la teron por regi kaj subteni ĝin, devas laboregi kontraŭ tiu sinteno. Sed nun ni devas demandi nin, ĉu kristano ĝenerale estas moderna homo ? Ĉu li ne ofte estas tradiciema homo, kiu ne volas ŝanĝi la iam ekzistantajn normojn, timante iri novajn vojojn ? Ĉu li ne estas ema lasi la zorgojn por ni kaj por la tuta mondo al Dio ? Nur Dio ja estas potenca fari tion ! Ĉu tia sinteno ne estas vivi kun skvamoj antaŭ la okuloj ? Ĉu tia vivo rilatas al la releviĝinta Sinjoro Jesuo Kristo, kiu vokas nin daŭre esti la voĉo de tiuj, kiuj perdis la voĉon, kiuj perdis la sanecon pro politikaj sistemoj, kiuj ne agas laŭ la ordono de Dio : "Amu unu la alian" ?

Ĉu Jesuo ne diris :

"Por juĝo mi venis en ĉi tiun mondon, por ke la nevidantoj vidu, kaj ke la vidantoj fariĝu blindaj" ?

Kaj la Fariseoj diris al li :

"Ĉu nia ankaŭ estas blindaj ?"

Kaj Jesuo respondis :

"Se vi estus blindaj, vi ne havus pekon, sed nun vi diras : Ni vidas ; do via peko restas." (Joh 9:39-41)

Tio estas averta vorto, dirita al ni ĉiuj ! En kia mondo niaj infanoj, niaj lernantoj, niaj posteuloj devos vivi ? Ĉu Dio ne donis al NI la respondecon por la bono de la naturo kaj de la homo ? Kial ni modernaj homoj kreas tiom da danĝero, malcerteco, malespero, kun la sekvoj de malsanoj, eksplodoj, eĉ tuta detruo de vivo de homoj, bestoj kaj plantoj ? Ĉu nur por la ekonomia evoluado, por nia bonfarto ? Pro tio ni malfidas unu la alian, antaŭjuĝas la aliajn, volas mem havi la superan potencon, minacas la alian per la plej teruraj armiloj, kiujn homoj povis elpensi, kaj kiuj mortigos milojn kaj milionojn da vivantaj estaĵoj per militoj, aŭ invalidigas ilin por la tuta vivo !

Sanaj arbaroj estas necesaj por la plua ekzistado de ĉia vivo. Acida pluvo nun minacas la arbojn, do nerekte ankaŭ nin. Acida pluvo estas sekvo de la ellasataj gasoj, kiujn miloj da aŭtoj kaj aliaj veturiloj produktas.

Sed la naturo venĝos sin, se la ekologia ekvilibro estas malhelpata ! Ĉiu materialo eluziĝas, arbaroj acidiĝas, arboj mortas, subtera akvo estas grave atakata, la ozon-tavolo maldikiĝas kaj venen-ellaso en riveroj mortigas la fiŝojn kaj ja tiuj ellaso pli kaj pli okazadas !

Nova sinteno pri la naturo kaj ĝia konservado estas postulata ! Tio estas devo kaj ordono ! La moderna homo, kiel ajn li aspektas, devas vidi la veron kaj ekkoni tion !

La registaroj ne vere serioze reagas je ĉiuj avertoj. Tamen ni homoj vivantaj inter ekologio kaj ekonomio ne estas malpotencaj ! Ni devas aŭdigi niajn voĉojn kaj alvoki la kunhomojn ne resti starantaj ĉe la flanko, sed harmonie, unuanime kunlabori kaj haltigi la detruon de la naturo. Sed la tempo urĝegas ! Baldaŭ ni atingos la limon, kie ni ne plu povos haltigi la katastrofon ! Multega laboro atendas nin, kaj ĉio rilatas la justecon, la pacon kaj la konservadon de la kreitaĵo, la universo.

La Biblio ne donas al ni rektan gvidilon, kiel ni devas trakti la naturon, ĉar ĝiaj rakontoj rilatas al antikva tempo. Sed nia Kreinto donis al ni majstrajn donacojn ! Pro tio ni povas VIDI la gravegan veron kaj neniam ni bezonas esti timema por tiu vero. En la Biblio ni legas :

"La vero vin liberigos !" (Joh 8:32)

Ni ankaŭ neniam devas perdi la esperon. Kiel ĉi tiu homo, kiel kristano, ni devas esti preta fari la ĝuston, ankaŭ se oni ne tuĝ vidas rezultojn.

Certe : la estonteco de la Dia Regno ne nur dependas de ni. Dank'al Dio feliĉe ne ! Sed eble ni devos preĝi kvazaŭ dependas ĉio de Dio kaj por tio labori kvazaŭ dependas ĉio de ni. Juda proverbo pri la tempo de Dio kaj nia partopreno en ĝi sonas :

"KIE, se ne estas ĈI TIE ?"

KIAM, se ne estas NUN ?

KIU, se ne estas farate de NI ?

Jelly Koopmans-Schotanus, Nederlando



## LA TEKNIKISTA KAPTILO

Demando : Dum la daŭro de via kariero de esploristo, de instruisto, de verkisto, vi pristudis la progreson, progreso samtempe teknika kaj homa. Ĉu ĝi estas konstatebla en ĉiu loko kaj en ĉiu tempo ?

Respondo : Male de tre disvastiĝinta ideo, mi konvinkigis, dum miaj historiaj esploroj (mi estis profesoro pri historio de la institucioj), ke ne estas vera HOMA progreso. Ĉar oni devas distingi inter pluraj specoj da progreso.

Evidente la TEKNIKA progreso estas nekontestebla ! Sed ĝi estas la nura ! Pri sciencoj, estas progresoj, sed multe malpli grandaj ol oni kredas : la prauloj sciis trege pli multe da aferoj ol ni pensis. Sed ili ne eksperimentis ilin kiel ni.

En la tereno de penso, filozofio, literaturo, ktp. ne estis iu progreso : la filozofio de Sōkratēs (Sokrato) valoras almenaŭ tiun de Sartre (*sartr'*).

Pri la socia organiziĝo... oni parolos tuj pri la forigo de la sklaveco... estas vere, sed antaŭ ol ni estis socioj sen iu sklaveco (sed kun malpli grava konsumado ol ni, evidente !) kaj ni malkovras nun, ke la prahistoria homo vivis en universo de abundo, kaj ke li ne estis senĉese serĉanta nutraĵon !

Same oni parolos pri la progreso de la emancipado de la virino, sed estis socioj, kie la virino estis tute egala al la viro (ĉe la persaj Seleŭkidoj, estis bankistinoj, ŝipposedantinoj, ktp.) kun la samaj rajtoj (ekz-e en Roma ek de la 2-a jarcento p.K.), kaj en la feŭda mondo, en la kamparaj komunumoj same. Ni havas la impreson de socia progreso kompare kun la 18-a kaj 19-a jarcentoj. ESTAS VERE. Sed precize en tiuj jarcentoj okazis grandega regreso !

Fine, ĉe la homa flanko, mi ne pensas, ke la eŭropano de 1980 estas supera morale, intelekto al la atenano de la 6-a jarcento a.K. aŭ al la burĝo de la 18-a jarcento ! La homo estas ĉiam la sama, kapabla por la plejbono kaj por la plejmalbono ! Kaj por kristano, la peko montriĝas sub malsamaj formoj, sed ĝi estas same decidiga !

Demando : La teknika progreso ĝajnas neevitebla. Ĉu fakte ĝi estas tia ? Ĉu ni povus analizi la ĉeestantajn fortojn ?

Respondo : Mi skribis, ke "en nia socio, la teknika progreso estas nia destino." La progreso ne ĉesas iri pli kaj pli rapide,

## PROGRAMOJ EN ESPERANTO

Programa Esperanto

世界語節目

البرنامج الايسراني

Esperanto Programme

## KION CELAS RADIO VATIKANAN?

- Interfratigi la homojn
- Anonci la Kristan mesagjon
- Kunligi la Katolikajn centron kun la diversaj landoj
- Farigi eĥo de la tutmonda katolika vivo
- Aŭdigi la voĉon de la Papo

## KIAL AŬSKULTI RADION VATIKANAN?

- Por ricevi tutmondajn, laŭeble senpartiajn, informojn pri humanaj problemoj
  - Por ekscii, kio okazas en la Eklezio
  - Por ekkoni pri Romo, tekste el la fonto
  - Por pov dialogi surpaze de taga informiteco
- KIEL AŬSKULTI RADION VATIKANAN?
- Per simpla radio-ĉeovilo
  - Per mezondoj
  - Sur kurtondoj

## KIAM AŬSKULTI RADION VATIKANAN?

- 24 horojn tage
- En Esperanto: dimanĉe h 20.00-20.09 (somere 19.00-19.09) kaj, en 1987, en la vesperoj de la tagoj: 20-a de aprilo; 1-a de majo; 14-a, 15-a de aŭgusto; 8-a, 24-a, 25-a, kaj 26-a de decembro.
- Jande h 06.00-06.14 (somere 05.00-05.14)
- Ĉiuj tempoj estas laŭ UTC (eksa GMT)

## KIAJN AŬSKULTANTOJN DEZIRAS RADIO VATIKANAN?

- Pensemajn aŭskultantojn, t.e.: kiuj
- aŭskultas antaŭ el juĝi
- kapablas aŭskulti ĉe ne satelajn atencojn aŭ esprimmanierojn
- foje komunikas siajn pozitajn aŭ negativajn prilaksajn foje scipovas vivi sen televido

## KIU AŬSKULTAS RADION VATIKANAN?

- Miliono da viroj kaj virinoj el la tuta mondo
- Kaj vi... kio?



Dum lia vizito en Romo, la Prezidento de Universala Esperanto-Asocio, Profr. Humphrey Tomkin, estis inoŝi kaj ĉirkaŭ Saratoga pri la Radio Vatiko, rezultoj de UEA por la Kvinna Juro de Esperanto.

## LA TEĤNIKISTA KAPTILO

kaj ĉio kunlaboras al konservi ĝin (la scienca esploro, la prestiĝo de la ŝtatoj, la internacia komerco, la neceseco havi pli kaj pli perfektigitajn armilojn...).

Sed reale, tio estas iluzio. Mi ne parolos pri la kreskanta polucio aŭ pri la prezo de la ne renovigeblaj krudaj materialoj, tre diskutataj demandoj. Sed oni devas reteni la esencan ideon, ke ne eblas senlima kresko en limigita mondo. Estas mensogo deklari, ke la tero povus nutri 60 miliardoj da homoj !

Aliflanke, estas problemoj pli kaj pli gravaj : la ekonomia problemoj ! Ju pli ĝi disvolviĝas, des pli la teknika progreso kostas multe : nune, mono nenion plu reprezentas. Kiam oni kalkulas en miloj da miliardoj da dolaroj, tio signifas nenion plu. Multaj ekonomistoj kaj fakuloj pri financoj konsciigis pri tio ĉi, kaj petas halton por reorganizi la financon mondon. Se ne, oni riskas gigantan tutmondan bankroton... Kaj ĉia teknika progreso tiam malaperus. Fine, oni devas kalkuli kun la ekkonsciigo de multaj sciencistoj, kiuj avertas pri la danĝero de tiu teknika progreso, kaj ankaŭ ili petas limojn kaj moratorion (halton de la teknikaj esploro kaj produktado dum kelkaj jaroj). La homaro riskas katastrofon se oni ne estas sufiĉe saĝa por halti... kaj pripensi !

Demando : Du freŝdataj eventoj inter aliaj, la aferoj Sandoz en Basel, kaj Ĉernobil, nete prezentis al ni la problemojn levitajn de tiu ĉi teknika socio. Ĉu en la daŭro de la historio, oni devis ĉiam pagi la kalkulon por la progreso ?

Respondo : Mi verkis artikolon pri "la duvaloreco de la teknika progreso", kie, interalie mi formulis la leĝon : Ĉiu teknika progreso estas pagenda. La prezo povas tre vari : en la 17-a kaj 18-a jarcentoj, la teknika progreso kondukis al la alprenado de landoj en Afriko kaj Ameriko, kaj povis fariĝi nur per la sklaveco. En la 19-a jarcento, la industria progreso estis pagata de la ekapero de la proletaro.

Ĉie kaj ĉiam, teknika progreso sekvigis novan problemon.

Oni devas ankaŭ konsideri la relativan aspekton de multaj el tiuj progresoj : ekz-e pri la sukero el beto, oni sin laŭdis pro la kresko de la konsumado de sukero en la 19-a kaj 20-a jarcentoj, sed antaŭe... la homo uzis mielon (dekoble pli ol hodiaŭ !) : nu, se oni kalkulas la nutran kvaliton de mielo, kaj tiun de sukero, oni ekvidas, ke oni nenion gajnis ! Cetere, mi multigis tiun ĉi specon de ekzemploj !

## EVANGELIAJ KAJEROJ

Kaj se la teknika progreso permesas fari kvanton da operacioj, antaŭe neeblaj, tiuj ĉi operacioj povas esti pozitivaj aŭ negativaj !! Sufiĉas kompari la militojn de la Mezepoko, kun tiuj de hodiaŭ ! Estas la teknika progreso, kiu permesas samtempe la amasajn bombadojn, la teroristajn atencojn, ktp. ktp. Oni devas meti tion ĉi vid'alvide al la progresoj de la medicino, de la kirurgio, de la sociala helpo, ktp. Unu ne iras sen la alia, bedaŭrinde. Kaj tamen, kun la POZITIVAJ teknikoj, estas ekapero de tre malfacilaj problemoj (ekz-e la multiĝo de pli kaj pli maljunaj personoj, kiuj baldaŭ "embarasos" ĉiujn landojn !).

Demando : Ĉu la majstreco super la teknikoj kaj la administrado de la riskoj nepre kondukas al polica sistemo ?

Respondo : Tio, kion mi ĵus diris, jam kondukas al la respondo al tiu demando : estas nediskuteble, ke por alveni al la organizigo de la teknika mondo, kaj al la provo limigi la riskojn, bedaŭrinde necesas multoblige la kontrolojn, la burokrataron, limigi la liberecon de la homoj.

Por lukti kontraŭ la terorismo, necesas alvoki la publikan denuncan, ĉi tio estas malmorala. por malhelpi la atencojn al la atom-centraloj, necesas organizi gardan servon, pli kaj pli fajnteknikan. Same, por malhelpi la fraŭdojn en la kontadaj komputiloj.

Ju pli estas potencaj rimedoj je dispono de la homoj, des pli necesas kontroli la uzon de tiuj rimedoj. Tie kuŝas la problemoj de la kresko de la potenco ! Se la homo estus bona, estus eble konfidi lin kaj lasi lin uzi tiujn rimedojn, sed la sperto pravas, ke la permeso komplete estas ruiniga. (vidu la nederlandan sperton pri drogo).

La plej simpla sperto estas pri aŭtomobilo : kun malmultnombraj malmulte potencaj aŭtoj, ne necesas havi fortan policon. Sed kun aŭtoj, kiuj povas rapidi 250 km/h (kaj tio ne estas hipotezo, komence de julio, estis arestita sur la Suda aŭtoŝoseo (*Autoroute du Sud*) junulo kiu veturis 250 km/h !), kaj kiuj tre multiĝas, oni devas kontroli kaj sankcii.

Konsekvence, konsiderante, ke la tekniko estas precipe pli-potenciĝo sur ĉiuj terenoj, ĝi kondukas necese al pli da kontroloj super ĉio, do da polico. Tiel, nepre, la tekniko efektive kondukas al politika sistemo, kie la polico havos grandigantan rolon, kaj la antaŭgardaj kontroloj estos pli kaj pli oftaj.

Demando : Ĉu la demokratio ne estas minacata, de kiam nur teknikistoj, teknokratoj, kapablas ĉirkaŭkompreni la problemojn ?

Respondo : Efektive, ni atingas ĉi tie la plej gravan politikan problemon. Ĝi havas du dimensiojn : unue pri la socia strukturo, oni alvenas nun al la estiĝo de aristokratio, la teknikistoj, disde la popolo. Freŝdata libro pri komputoscienco montras, ke post dek jaroj, tiuj, kiuj ne estos kapablaj uzi la komputilojn, estos tute kompareblaj kun la analfabetoj de antaŭ unu jarcento ! Nur la teknikistoj scias tion, kio estas fareda, en ĉiu okazo. Ili havas povon, kiun neniu povas kontroli. Ne temas pri reĝimo (dekstrula aŭ maldekstrula), sed, kia ajn estas socia aŭ ekonomia formo, la teknikistoj estas la novaj aristokratoj : tiuj, kiuj posedas la povon.

La dua aspekto devenas de ĉi tiu : ne nur la popolo povas nenion, sed ĝiaj reprezentantoj ne pli : la plejmulto el la decidoj nun estas decidoj de teknika vidpunkto (pri energio, pri aviado, pri produkto de io ajn, ktp.). Nu, la politikulo, pri ĉi tiuj aferoj, scias nenion : li estas informita pri la problemoj pere de raporto, kiuj estas provizitaj al li de teknikistoj, li faras decidojn surbaze de tiuj informoj, kaj la decidojn aplikas teknikistoj, sen ia ajn ebla kontrolo, escepte fare de aliaj teknikistoj !

Cetere, pri la gravaj demandoj, la publiko estas informita tra la amas-komunikiloj, nur de teknikistoj (la ekzemplo de Ĉernobil estas okulfrapa). Do ĝi ne povas vidi la problemojn alimaniere, kaj kiam la novaj aristokratoj estas ĝenataj, ili transdonas informojn ne kompreneblaj de la meza aŭskultanto ! Kaj kiam ĉi tiu alfrontas teknikan decidojn, kiu damaĝas lin (grandaj laboroj, aŭtoŝoseoj, ktp.), oni ne zorgas pri lia opinio. La "enketo de publika utileco" (en Francujo *enquête d'utilité publique*) estas nun senvalora, la laboroj deciditaj de teknikistoj estas farataj, eĉ se la interesita loĝantaro unuanime kontraŭstaras. Mi spertis tion plurfoje.

Demando : La mito pri reveno al la naturo estas potenca. Laŭ kiu mezuro ĝi estas ebla ? Ĉu ĝi estas akordigebla kun la teknikista mondo ?

Respondo : Ke la reveno al la naturo estas dezirinda, mi tute persvadiĝis. NECESAS reloĝigi la kamparon, sed laŭ kondiĉo rifuzi ĉion, kio konsistigas agro-industrion, t.e. troa maŝinizado, ĉefarma komputilo, trouzo de sterkaĵoj kaj kemiaĵoj, bateria bredado...

Efektive, ĉio ĉi tio kondukas al tri konsekvencoj : - malbonkvalitaj produktaĵoj, nemanĝeblaj de tiuj, kiuj ekkonis la guston de la "vera" kokidaĵo, de la "vera" bovidaĵo, ktp. - produktaĵoj en tro granda kvanto, kiuj estas nevendeblaj (la dramoj de la verda Eŭropo ! La miloj da tunoj da butero, stokitaj de kvin jaroj, kaj

kiujn oni baldaŭ denaturigos, la fruktoj ĉiujare ĵetitaj tunope al rubejoj) - kaj male al la ĝenerala kredo, tiuj ĉi produktaĵoj, ne estas malpli multekostaj ol tiuj de la tradicia eta agrikulturisto, ĈAR, kaj tio estas la tria konsekvenco, ĉiuj agrikulturistoj, kiuj eniris en la ciklo de la agro-industrio, devis "ekipiĝi" kaj ili ŝuldiĝis ĝis ekstrema limo.

Necesus do reveni al agrikultura modelo ne teknikigita. Tio ne estas utopia, se oni metas tion da mono por agrabligi la kamparon, per vivfacilaĵoj (transportoj, distraĵoj, ktp.), kiom oni elspezas por industriigi ĝin. Evidente, oni kolizias kun la interesoj de la grandaj entreprenoj de kemio kaj komputiloj. Reloĝigi la kamparon estas la nura rimedo por preskaŭ malaperigi la senlaborecon, kaj kiu cetere certigus pli bonan disigon de la loĝantaro kaj samtempe veran prizorgadon de la kampara pejzaĝo.

Ĉiu nun scias la ruiniĝon, kiun reprezentis la forigo de la vivaj heĝoj en la regionoj de *bocage\**, kaj kiun reprezentis la foriro el la arbaraj montaroj. Ĉiuj arbaraj fajregoj estas kaŭzitaj de manko de prizorgado de la subarbaro, nu tion ĉi ne povas fari buldozo, ktp., kiuj misdetruas sen distingo ! Nur la reloĝigo de la arbaro certigos la prizorgadon... Ĉu tio ĉi estas ekonomie ebla ? CERTE kaj psikologie... tio estas afero de propagando kaj de agado sur la publiko. La nura problemoj, mi jam indikis tion pli antaŭe, estas tiu de la kapitalisma profito de kelkaj grandaj firmaoj.

Demando : Ĉu la tradicia partigo konservativuloj/progresuloj havis efikon sur la disvolvo de la teknikista sistemo ? Kio estas la rolo de la kolektiva psikologio ?

Kia ankaŭ estas en la uzado kaj disvolvo de la teknikista mondo la gravecon de la egoista serĉo de la tuja bonstato flanke de la meza terano (aŭ de la meza provizito) ?

Respondo : Efektive la opinioj pri politikaj, socialaj, ktp. ideologioj havas nenian influon. Ĉiuj estas konvinkitaj, ke la teknika "progreso" estas samtempe neevitebla kaj bona. Kiam estas malaj pruvoj, tiuj ĉi estas prezentitaj kiel "akcidentoj". Sed la dekstro, samkiel la maldekstro, daŭrigas identan politikon de teknika disvolvo.

Pri la kolektiva psikologio, ĝi estas unue formita de la amas-komunikiloj (nu, ekz-e ĉiuvespere en la televida ĵurnalo, de iu ajn kanalo, estas ero pri admirinda teknika novaĵo) kaj de la reklamo. Kaj responde al tio ĉi, la meza individuo vidas evidente, ke li malpli penas, ke li gajnas tempon (por kio ? neniam demandata demando !), ke la vivo estas pli komforta, ktp. Sed tiuj ĉi

## LA TEĤNIKISTA KAPTILO

evidentaj rilatas al la tuja kaj sentebla profito, kaj oni ne vidas la malutilajn efektojn (malpurecon de la akvo, nespireblon de la aero, ktp.) kiuj estas je fora pagdato.

La homo perdas la kutimon peni (kio estas kompensata de trot-kurado (*jogging*) ! Ĉi tion oni ne bezonis, kiam oni marŝis 3 aŭ 4 km-ojn por iri al la laboro. Sed la aŭto estas nepra), li perdas la kutimon rezisti al la sufero, li perdas la kutimon de la persona rilato (anstataŭita de la televido). T.e. ke ĉio ĉi estas facilaĵoj, kaj la moderna homo volas facilan, komfortan, senprobleman vivon, tion, kion alportas al li diversaj teknikoj. Kio kuniras kun gigantaj malŝparoj (Ĉu oni scias, ke la tutmonda arbaro malaperas je vertiĝodona rapideco, en Afriko, en Amazonio. Sed, se ne estos plu arboj, ne estos plu oksigeno por spiri !).

En la teknika disvolvo, estas do kunagado, renkonto inter : - la teknikista esploro, - la mona profito (fare de la kapitalistoj, aŭ de la ŝtato en aliaj landoj, kio same rezultas), - la logo de la publiko, kiu ĉiam petas pli, kaj kiu soifas je novaĵoj.

Demando : Kiun rolon povus aŭ devus ludi la kristanoj kaj la kristana Eklezio, fronte al la teknikista sistemo, kiu instaligaĵoj kaj ĉirkaŭas nin pli kaj pli ?

Respondo : Mi pensas, ke la rolo de la kristanoj kaj de la Eklezio rilate al la senlima teknika kresko devus realiĝi je du niveloj : ili havas rolon por ludi rilate al la personoj kaj rolon rilate al la sistemo.

Rilate al la personoj, la unua aspekto notenda estas, ke la plejmulto de la homoj de la okcidenta mondo estas malesperanta, la homoj vivas en angoro kaj timo (tial la distraĵoj ludas tiel grandan rolon !), kaj ĉe tiu ĉi situacio, necesas anonci, prediki kaj manifesti la kristanan esperon. Poste, necesas provi "sentoksigi" tiujn, al kiuj ni alproksimiĝas, precipe rilate al la reklamo, necesas kritiki la televidon, provi konduki la homojn al ekkonsciigo pri ilia DEPENDECO de la konsumado. Fine necesas rememorigi la homajn devojn. Ĉiu multe insistas pri la homaj rajtoj, sed neniam temas pri devoj ! Ekzistas nuntempe internacia movado por starigi ĉarton de la homaj devoj. Mi kredas, ke la kristanoj devus ligiĝi al tio ĉi.

Pri la teknikista sistemo mem, nepre necesas lukti kontraŭ la spirito de potenco (kiu originas la militojn !) entenata en la tekniko. Necesas rememorigi la ĉefecon de la persono, rilate al la produkto, al la teknikaj aĵoj, ktp. Samtempe necesas ludi profetan rolon, rememorigante la juĝon de Dio, ne nur pri la ordinaraĵoj pekoj,

## EVANGELIAJ KAJEROJ

sed pri la ĝenerala fluo de civilizacio (la profetaĵoj kontraŭ Tiro, kontraŭ Babilono, ktp. kaj ne kontraŭ la individuaj loĝantoj de tiuj urboj...). Ĉio ĉi tio povas pozitive esprimiĝi, valorigante la paralelajn entreprenojn, kaj la aktivecojn sendependajn de la tekniko (la duala ekonomio, pri kiu oni multe kontraŭsencas !), kaj kuraĝigi la malpliigon de la konsumado, donante ekzemplon de vivo saĝa kaj sen troa konsumado !

Demando : Ĉu la Biblio havas ankoraŭ lecionojn por doni al ni, diraĵojn por klarigi ĉi tiun situacion ?

Respondo : Ĉi tie la respondo devenas necese de tio, kion mi ĵus diris ! Ĉio ĉi tio efektive baziĝis sur biblia legado.

La Biblio rememorigas nin pri la servo kaj la spirito de servo, t.e. konsideri la veran intereson de la proksimumo ; nu ĉi tio iras rekte kontraŭ la teknika disvastiĝo, kiu neniel kalkulas kun la bezonoj kaj interesoj de la homoj, sed kiu fabrikas tion, kio estas *high tech*, kaj kiu poste trudas ĝin al la personoj, estigante falsajn bezonojn.

Poste, la Biblio instruas al ni ĉiam la sinregadon (ni aplikas ĝin tro ofte nur al la problemoj de alkoholo !), tio respondas al la modereco, t.e. ke en ĉio, ni devas scii, kio estas la modera sinteno (la paco, la justeco, ktp.), kaj tio nete kolizias kun la *hybris* (la senmodereco, la ekzaltiĝo) de la tekniko.

Necesas ankaŭ rememorigi, ke en multaj paraboloj, la homo estas komparata kun administrantode bieno, kiun li ne posedas. Kaj ĉi tio respondas al la kondiĉo de la homo en Genezo (1 kaj 2). La ĝardeno, kiu estas fidlasita al ni, estas la tero, kaj ni devos raportari pri tio, kion ni faris el ĝi ! Jam malkonstrui la materion per la eksplodo de la atomo estas grave. Nun pretendi krei la vivon, estas eĉ pli. Ili estas du limuzurpoj ne akcepteblaj en la rezervitan terenon de Dio.

Kaj pri tio, ni havas multajn tekstojn de la Malnova Testamento, kiuj parolas pri la respekto al la naturo, kaj kiuj rememorigas nin ke ĝi estas tie, kiel donaco de Dio kiu kondukas nin adori Dion, kaj ne kiel objekto por ekspluatado. Kaj finfine la ekzempla sinteno de Jesuo montras al ni la vojon de la ne-potenco, t.e. ĝuste de tiu ebleco fari eksterordinarajn aferojn, kaj Jesuo ne faras ilin, pro amo kaj pro obo al sia Patro.

Jacques Ellul, Francujo  
perletere intervjuita kaj tradukita de Philippe Cousson

\**bocage* : pejzaĝo de kelkaj okcidentaj francaj regionoj, kie ĉiuj kampoj estas ĉirkaŭitaj de heĝoj. (pr. *bokaĵ'*)

el inter la verkaro de Jacques ELLUL

- Présence au monde moderne*, 1948 (Ĉeesto en la moderna mondo)  
*L'Homme et l'argent*, 1953, 1979 (La homo kaj la mono)  
*La Technique ou l'enjeu du siècle*, 1954 (La tekniko aŭ la vetaĵo de la jarcento)  
*Fausse présence au monde moderne*, 1964 (Malĝusta ĉeesto en la moderna mondo)  
*Autopsie de la Révolution*, 1969 (Nekropsio de la Revolucio)  
*Contre les violents*, 1972 (Kontraŭ la perfortuloj)  
*L'impossible prière*, 1972 (La neebla preĝo)  
*Les Nouveaux possédés*, 1973 (La novaj (demon-)posedatoj)  
*Trahison de l'occident*, 1975 (Perfido de la okcidento)  
*Le Système technicien*, 1977 (La teknikista sistemo)  
*L'Espérance oubliée*, 1977 (La forgesita espero)  
*L'Empire du non-sens*, 1980 (La imperio de la sensenŝajto)  
*La Foi au prix du doute*, 1980 (La fido je prezo de dubo)  
*Théologie du travail et monde moderne*, 1980 (Teologio de la laboro kaj moderna mondo)  
*La Parole humiliée*, 1981 (La humiligita parolo)

## KRISTANA INFLUO EN LA GERMANA EKOLOGIISMA MOVADO

Dum la pasinta jardeko en F. R. Germanujo, pli kaj pli da homoj ekhavis la konscion pri la kreskanta minaco al la naturo kaj al la medio. Kritike observantaj unuopuloj kaj asocioj ekkonis la seriozan kaj danĝeran situacion: malpurigo kaj veneniĝo de aero, akvo kaj grundo, malapero de bestoj kaj plantoj, malŝparado de krudaj materialoj kaj de energio. Firmiĝis la sento, ke la industria civilizacio per sia malrespekto al la medio kaj al la naturo sufokas la vivkondiĉojn de la homaro. Necesis forlasi fatalan vojon, necesis apelacii al la potenculoj en politiko kaj ekonomio, necesis vekii la dormantan plimulton de la popolo. Laŭte kaj fervore sonis la postulo pri nova sinteno. "Ekologio" fariĝis la vorto por la saĝa rilato al la naturo. La ekologiisma movado estiĝis.

Movado konsistas el interna ideo kaj homoj, kiuj klopodas realigi ĝin. Kiuj homgrupoj do formas la germanan ekologiisman movadon? Ni trovas unue la tradiciajn asociojn por naturprotektado. La ĉefaj estas *Bund für Umwelt und Naturschutz Deutschland* (Ligo por vivmedio kaj naturprotektado de Germanujo), kies nuna prezidanto estas s-ro Hubert Weinzierl (*vajncirl*), la verkinto de la libro *Nachklänge* (Resonoj)<sup>1</sup>, kiu aperis ankaŭ en Esperanta traduko, kaj *Deutscher Bund für Vogelschutz* (Germana ligo por birdoprotekto), kiu ne nur okupiĝas pri birdoj, sed ĝenerale zorgas pri bestaj kaj plantaj specioj. Tiuj asocioj registris dum la lastaj dek jaroj imponan kreskon de la membraro kaj tial povis konsiderinde plivastigi siajn agadojn, kiujn karakterizas sciencaj scioj kaj praktikaj spertoj. Due, menciindas novfonditaj grupoj, kiel *Robin Hood* (*vud*)<sup>2</sup> kaj la internacia organizo *Green Peace* (*grin pis*, verda paco), kiuj per sensaciaj agadoj rikoltis grandan atenton en la publiko por la celoj de ekologiismo. Tria, jen estas la verduloj, homoj de diversaj ideologiaj devenoj, kiuj estis mal-kontentaj pri la malkapablo de la establitaj partioj pri la protekto de la naturmedio (sed ne nur pri tio), kaj tial volis ekmontri novajn politikajn principojn. Fondiĝis la partio *Die Grünen* (la verduloj), kiu tre rapide atingis sukcesojn en balotoj kaj eniris multajn landajn (regionajn) parlamentojn, kaj en 1983 la federacian parlamenton *Bundestag*. La agado de tiu partio, kiel ĉefa politika branĉo de la ekologiisma movado, renkontas ne nur la malaprobos de la politikaj kontraŭuloj (tio estas precipe la konservativaj partioj, kiuj nomas sin kristanaj), sed ankaŭ de homoj plene jesantaj la intencojn de ekologiismo. Ekz-e la verduloj pledas por

## KRISTANA INFLUO EN LA GERMANA EKOLOGIISMA MOVADO

la tuta forigo de la leĝoj pri la aborto. Ilia pozicio estas por la vivo kiam temas pri bestoj, sed kontraŭ la vivo kiam temas pri nenaskitaj infanoj. Tiu kaj aliaj kontraŭdiroj malfaciligas al kristanoj la subtenon de la verduloj. Laste, kiel radikon kaj parton de la ekologiisma movado, ni ne forgesu la kontraŭ-atom-energian movadon. La homamasoj protestantaj kontraŭ la atomenergio estas preskaŭ la samaj, kiuj akuzas la facilaniman detruon de la natura vivmedio.

La kristana kredo ne estas iu privata rilato kun Dio, sed afero ampleksanta ĉiujn sferojn de la homa vivo. Tial veraj kristanoj nepre devas okupi sin pri la ekologiaj ideoj. Fakte inter la protagonistoj de la ekologiismo estas ankaŭ multaj kristanoj. Mi nur ŝatas nomi s-ron Herbert Gruhl (*gruhl*), iama kristandemokrata politikisto, kaj poste iniciatinto kaj elstara aktivulo de la *Ökologisch Demokratische Partei* (Ekologia demokratia partio), kiu per sia libro *Ein Planet wird geplündert* (Planedo estas elrabata)<sup>3</sup> donis gravajn impulsojn al la publika diskutado pri la estonteco de la tero. Tamen mankis, kaj ankoraŭ mankas ĝis hodiaŭ, renoma kristana institucio eksplicite dediĉanta sin al ekologia agado. Sur la kampo de la porpaca agado ja estas la katolika organizo *Pax Christi* (Paco de Kristo) kaj la protestanta *Aktion Sühnezeichen / Friedens Dienste* (Agado repaciĝosigno / Pacoservoj). Ambaŭ ekzistis jam antaŭ la apero de la fenomeno pacmovado kaj forte fekundigis ĝin. La kristana influo en la germana ekologiisma movado pro tio suferas nekontesteblan malavantaĝon. Simpligante mi eĉ inklinas aserti, ke ne la kristanismo kunkreis ekologiismon, sed ke la ekologiismo instigis la kristanajn ekleziojn ekpreni la ekologiajn problemojn kaj kontribui al ilia solvo. Post certa hezito kaj la protestantaj kaj la katolika eklezioj en F. R. Germanujo ekkonis la provokon, kiun prezentas la endanĝerigo de la vivmedio por la vigla kristano. Ankaŭ la demando, ĉu ekleziaj junularaj grupoj kaj eĉ pastroj partoprenu en manifestacioj kaj kampanjoj kontraŭ ŝtataj projektoj kaŭzis ekscititajn disputojn en la eklezioj. Kelkaj politikistoj, inter ili la tiama federacia kanceliero s-ro Helmut Schmidt (*ŝmit*), rekomendis retenemon kaj prefere silenton de la eklezioj pri politikaj aferoj. Do la eklezioj devis klarigi siajn starpunktojn. Kaj tio okazis.

La plej gravaj dokumentoj pri ekologiaj demandoj estas la jenaj :

- la konsilantara deklaro de la Evangelia Eklezio en Germanujo pri la energi-diskutado (1977),
- la deklaro de la katolika germana episkopa konferenco *Zukunft der Schöpfung, Zukunft der Menschheit* (Estonteco de la kreitaro, estonteco de la homaro) 1980,

## EVANGELIAJ KAJEROJ

- la komuna deklaro de la Konsilantaro de la Evangelia Eklezio en Germanujo kaj de la Germana Episkopa Konferenco *Verantwortung wahrnehmen für die Schöpfung* (Percepti respondecon por la kreitaro) 1985.

Per tiuj oficialaj deklaroj, la ekleziaj gvidantoj intencis kaj doni kompetentajn konsilojn al kristanoj maltrankviliĝintaj pro la ekologia problemaro, kaj influi la ekologiisman movadon prezentante agnoskindajn aspektojn, kiuj kongruas kun la kristanaj kredo kaj etiko.

"Ĉar la profunda krizo de la vivmedio ne estas blinda sorto nek natur-katastrofo kiel iam la glaciepoko, sed estas nekapablo de la homo, la demando estas nepreterirebla : Al kiuj normoj la homo devas orienti sin por tut-serioze teni sin en la respondeco por la vivo kaj la pluvivado de la homaro kaj la konservado de la natura vivmedio ? Tiu urĝa demando de la hodiaŭ homaro, aparte de la decidantoj en politiko kaj ekonomio, direktiĝas al la adreso de la etiko. Depost nememorebla tempo kristanismo kaj la Eklezio vidas kiel sian originan devon malfermi etikajn normojn, kiuj ne nur al la kredema kristano, sed al ĉiu homo evidentiĝas kaj tiel ebligas vastan konsenton trans ideologiaj limoj."<sup>4</sup>

La supre listigita ekumena deklaro el la jaro 1985, la plej ampleksa kaj matura, klare diras, ke ĉiu portas respondecon, kiu kaŭzas efikojn kaj damaĝojn.

"Kvankam ekzistas interplektado de la respondec-interligoj, tamen la respondeco koncernas la unuopulon kaj postulas de li respondon. Ĝi aparte koncernas la plenan civitanon en sia privata medio same kiel en siaj ebloj de politika partopreno. Respondeco tial estas pli ol nur kompetenteco aŭ kompensodevo. Ĝia postulo koncernas la unuopulon en la konscienco kaj la vivmaniero."<sup>5</sup>

Ni respondecas por nia tuta domo, la tero (la vorto ekologio devenas de la greka vorto por domo). Tiu komiso enhavas la zorgon por la bestaro kaj por la plantaro kaj la neorganika naturo, kiujn ni ne nur pro la senpera utilo al la homo devas konservadi, sed ankaŭ pro la speciriĉeco kaj la beleco. La homo estas parto de la kreitaro. Lia dispona rajto estas limigita. Arbitre li ne rajtas uzi kaj ekspluati la trezorojn de la kreitaro. La homo respondecas antaŭ Dio.

La homo ne faru senpripense ĉion, kion li teknike kapablas fari, sed faru tion, kion li etike rajtas kaj devas fari. Ĉefe gravas la

respekto antaŭ ĉia vivo. La homa, besta kaj planta vivoj meritas estimon. Tio postulas kontrolon de la homa potenco kaj ektimon antaŭ la sekvoj de la uzo de la potenco. La vivo estas sankta kaj protektinda. Ankaŭ akvo, grundo kaj aero, la biotopoj<sup>6</sup> kaj ilia funkciado estas partoj de la vivkondiĉoj de la homo kaj de siaj kunkreitaĵoj. Ni homoj devas agi kiel paŝtistoj, ne kiel buĉistoj de la ŝafoj. Necesas la prudento, per kiu ni singardeme taksas la sekvojn de nia agado. Evidentas naŭva senpripensemo pretervidanta la riskojn kaj detruajn sekvojn.

"En dubaj okazoj oni agu laŭ la pripensoj mala, ke ĉio bonordiĝos."<sup>7</sup>

Ŝparema konduto rilate la naturon estas saĝa, ĉar la naturaj leĝoj pruviĝis pli fortaj ol la homaj inventoj kaj regulado. Kiam mallongtempaj ekonomiaj kaj teknikaj interesoj, kaj longtempaj interesoj de la konservado de la naturo kaj vivmedio kolizias, tiam la longtempaj interesoj ĝuas prioritaton.

La verkintoj de la ekumena deklaro esperas, ke la kristana kredo ebligos pli profundan percepton de la vivmedio kiel Dia kreitaro kaj, donante klarajn motivojn, malfermos la ĝustan vojon el la ekologia krizo. Tamen ili devas konfesi, ke la eklezioj ne ĝustatempe rimarkis la minacajn danĝerojn kaj ne decideme kolpodis agi kiel advokato de la naturo. La teologio intertempe venkis sian embarason kaj akceptis la taskon, pere de biblia instruoj pri la kreitaro ekpuŝi novan pensmanieron kondukantan al pli sentiva rilato inter la homaro kaj la naturo. La homo regu tiel, ke laŭeble neniel ekestu detruo.

Post la prilumado de la etika kaj teologia fundamento, la ekumena deklaro prezentas kelkajn proponojn por sociaj kaj politikaj ŝanĝoj<sup>8</sup>:

- la rekomendo de nova vivostilo modesta, modera kaj malpostulema. El la scio de la ekologiaj interrilatoj la homo respondece rezignu pri konsumado kaj kutimoj, kiuj ŝarĝas la vivmedion. porekologia politika engaĝemo estas laŭdinda, sed la persona vivmaniero kongruu kun la ekologiopolitika opiniesprimo.
- la suplementigo de la socia merkatekonomio per la faktoro ekologia akordiĝemo. La konservado de la natura vivmedio fariĝu nepre aldonenda celo de la ekonomio. Industriaj entreprenoj damaĝantaj la medion devas esti persekutataj kaj punataj. Oni evoluigu novajn alternativajn produktadformojn, kiu zorgeme traktas la vivmedion.

- la ampleksa orientiĝo de la politiko al la ekologio.
- agnosko de la valoro kaj de la ekzisto-raĵo de la naturo,
- limigo de la foruzo de la naturaj donitaĵoj,
- justa partopreno de ĉiuj sociaj tavoloj kaj ĉiuj nacioj en la utiligo de la naturaj trezoroj.

La eklezioj ŝatas pruntepreni sian voĉon al la endanĝerigita kreitaro. Dio donis tiun taskon. Apokalipsaj angoroj ne lamigu la laboron por la estonteco de la naturo kaj de la homaro. Dio estas kreinto, konservanto kaj savonto. Li ne permesos la venkon de la detruemaj fortegoj.

"Al la Eternulo apartenas la tero, kaj ĉio, kio ĝin plenigas, la mondo kaj ĉiuj ĝiaj loĝantoj." (Psa 24:1)

Resume, ni povas konstati, ke la eklezioj en F. R. Germanujo aprezas la ekologiismon, kiel gardanton de la Dia kreitaro, kaj alvokas la kristanojn al kunlaboro. Tamen je konkretaj konfliktoj inter ekonomio kaj ekologio, ekz-e la konstruo de atom-centraloj kaj de plutonio-fabrikejoj, la detruo de riveraj pejzaĝoj per kanaloj aŭ la distranĉo de arbaroj per aŭtoŝoseoj, la ekleziaj gvidantaroj neŭtrale silentas. Multaj ekologie engaĝitaj kristanoj estas senluziigitaj pri sia eklezio, kiu diras jes al la ĝeneralaj celoj de la vivmedia protektado, sed rifuzas la subtenon en aktualaj okazoj. Ege dezirinde estas, ke la eklezioj pli forte admonu la respondeculojn en politiko kaj ekonomio. Ili senkaŝe diru faktojn kaj nomojn, anstataŭ diplomatece trakti tiuklajn aferojn. Ili ne timu riproĉojn el certaj partipolitikaj rondoj. Tiam la kristana influo en la ekologiisma movado signife kreskos.


Otto Gessner, Germanujo

## NOTOJ


1. WEINZIERL (Hubert). - *Nachklänge*. - München, 1985.
2. ROBIN WOOD. - *Und vor uns sterben die Wälder* (Kaj antaŭ ni mortas la arbaroj). - Reinbek, 1984.
3. GRUHL (Herbert). - *Ein Planet wird geplündert. Die Schreckenabläufe unserer Politik*. - Frankfurt, 1975.
4. *Verantwortung wahrnehmen für die Schöpfung. Gemeinsame Erklärung des Rates des Evangelischen Kirche in Deutschland und der Deutschen Bischofskonferenz*. - Köln, 1985. - p. 25.
5. *Verantwortung...* - p. 26.
6. biotopo : difinita biologia medio.
7. *Verantwortung...* - p. 29.
8. *Verantwortung...* - pp. 42-51.

## DE STEPPE ZAL BLOEIEN


Kanto de la Releviĝo




La stepo ekfloros. La stepo ĝoj-krios kaj ridos.




La rokoj, fermitaj jam de sia kreiĝo, akvoplenas ĝis



rand', -la rokoj oscedos. La akvo fluados, la akvo ar-



ĝentos kaj ŝaŭmos, kiu soifas jam trinkos. La stepo, ĝi



trinkos. La stepo ekfloros, la stepo ĝoj-krios kaj ridos.

- 2 L'ekzilo finiĝis. Revenas kun garboj or-flavaj popolo pelita el patrujo funebre, procesie, laŭ vic', por ĉiam revenas. Similaj al akvoj, torento rapidaj, profunden sin de montaro jetantaj, la homoj ĝoj-krias. Semintoj per larmoj revenas ĝoj-krie ridante.
- 3 Mortinto - li vivos. Mortinto ja aŭdos: Nun vivu! Post fin' de pilgrimo, superŝutis lin ŝtonoj: Levu vin, ho mortint', jam lumas mateno. Nin mano invitos, kaj voĉo nin vokos: Apertu tero, ĉielo, abismo, kaj tiam ni aŭdos. Ni sekve leviĝos, ĝoj-krios ridante kaj vivos.

Muziko: A. Oomen  
Vortoj: Huub Oosterhuis  
Trad. Jacques Tuinder, 1984

El Tero kaj Ĉielo kantu

## EVANGELIAJ KAJEROJ

### KRISTANO KAJ VERDULO

Mi naskiĝis en Dublin, antaŭ 65 jaroj, loĝis en Gibraltaro, revenis 19-jara al Irlando, fariĝis flegistino kaj fizioterapiisto. Mi interesiĝis pri filozofio kaj teologio, renkontis junan viron, kiu kutime legadis similajn librojn. Ni geedziĝis, kaj, tute ne-intence, havis dek unu infanojn. Eĉ tiam, mi bakis panon el natura greno kaj kultivis legomojn sen artefaritaj sterkaĵoj. Mi estis ŝajne 'verdolino'.

La infanoj multon lernis hejme, ili ŝparis multe da tempo, iĝis memfidaj; mi ĝoje spertis kun ili ĉiutage novajn malgrandajn venkojn. Kiam ili, jam ne tro junaj, iris al lernejoj, videblis, ke ili jam multe pli bone kaj ĝisfunde ili lernis hejme ol en grandaj klasoj. Pri tio mi verkis artikolojn, poste libron; mi fariĝis ĵurnalisto!

Antaŭ sep jaroj (1980), mi eklernis nian lingvon. Mi bedaŭras, ke mi ne konis ĝin antaŭe, kiam la infanoj restis hejme, sed nun kelkaj el ili lernas ĝin. Unu jaron poste, mia gvidanto pri Esperanto invitis min, kun aliaj, starigi verdan politikan partion, ĉar la politikistoj kaj la 'spertuloj' nur malbone komprenis la plej gravajn problemojn de nia mondo. Tion ni faris. Mi dufoje kandidat-iĝis por nia nia parlamento. Ĝis nun mi ne sukcesis, sed la afero ŝanĝiĝas. Mi nun verkas libron pri 'Mia plej ŝatata lingvo'.

Finfine, mi povas aldoni, ke mi ĵus partoprenis internacian verdan renkontiĝon en Stockholm, kie verda parlamentanino el Aŭstrujo diris, ke tie katolikaj verduloj pli kaj pli pensas kaj parolas pri la daŭra agado de Dio kiel kreanto, ne nur kreinto, kaj pri nia respondeco.

Pri la rilatoj inter verda politiko, aŭ politikaj aktivuloj, kaj la eklezioj, ni povas fari almenaŭ kvar demandojn.

Ĉu la plejmulto de verdaj aktivuloj estas kristanoj? Se ne, kial ne?

Ĉu la plejmulto de kristanoj (en landoj kie troveblas tiaj partioj) estas verduloj, aŭ eĉ simpatias kun tiu movado? Se ne, kial ne?

Mi povas fari tiujn demandojn, sed mi ne povas respondi. Mi estas dum du jaroj irlanda delegito je la Eŭropa Verda Kunordigo. Ni kunestas kvar foje jare, ĉiam je semajnfino. En la apuda preĝejo



mi renkontis hazarde alia IKUE-ano, sed mi ĝis nun neniam renkontis verdulojn, eĉ kiam ni havis kongreson en Liège (Lieĝo, Belĝujo), kaj oni bele kantis dum la Meso en antikva preĝejo flanke de la kongresejo.

Dum Universalaj Kongresoj de Esperanto oni ĉiam aranĝas Diservon. Eble ne ĉiuj ĉeestas, sed ĝi estas tute normala programero. Eble pro tio mi tro emfazas la mankon je verdaj kongresoj. Kaj mi konsentas, ke oni povas esti bona kristano sen ofte partopreni komunan preĝadon.

Krome, en mia hejmlando, kie la plejmulto ankoraŭ iras al iu preĝejo dimanĉon, ŝajnas al mi, ke multaj junaj verduloj tion ne faras.

Se ni nun demandu, kial? Eble ni devas unue konsideri la demandon: ĉu la plejmulto de la kristanoj simpatias kun la verda movado? Videblas, ke nur malgranda parto tiel voĉdonas.

Tio ŝajnas al mi iomete stranga. Mi vidas, ke la aliaj partioj fanfaronas: "se ni gvidos la aferojn, estos pli da kresko, ni venkos la senlaborecon per la kreo de miloj da oficoj (*jobs*)". Fakte, oni ripetadas la vortojn *job creation* (kreo de oficoj, *ĝob krieŝun*).

Samtempe, oni fieras pri produktivo. Tio signifas, ke en iu ajn fabriko, malpli da homoj produktas pli da varojn. Ŝajne, oni malofte demandas, ĉu ni bezonas tiujn varojn. Oni instigis la farmistojn produkti lakton kaj buteron, kaj ĉi tio fariĝas butermontoj, sed samtempe multe malpli da homoj laboras en la kamparo. Maŝinoj, multekostaj maŝinoj, faciligas la laboron, sed nun la farmistoj ne povas repagi al la bankoj siajn ŝuldojn, la koston de la maŝinoj.

Tio evidentas. Eble, ne tiel evidentas, ke ofte, por provizi la fabrikojn, oni forhakas la rapide malpligrandigantajn tropikajn pluv-arbaregojn, kaj malsatigas la loĝantaron de foraj landoj. Poste, oni grandskale muzikas por gajni monon por helpi ilin, kaj ankaŭ pri tio oni fieras!

Ŝajnas ankaŭ, ke la plejmulto ne bone komprenas, ke en Eŭropo mem tiu produktivo de la tero okazas nur ĉar oni aldonas ĉiam pli kaj pli da kemiaj sterkaĵoj, kiuj mortigas la teron. Mi mem povis aŭskulti eŭro-kongreson de sciencistoj, kiuj pridiskutis tiujn aferojn. Ili parolis pri la nitrato-bombo.

Do, kial kristanoj, kiuj subtenas justecon, normale voĉdonas por politikistoj, kiuj subtenas produktivon kaj kreskon?

Eble, tio okazas ĉar ili aŭskultas predikojn, kaj aŭdas, ke ili devas sendi donacojn al misistoj kaj preĝi por ili, sed nenion aŭdas pri la forhakitaj arbaregoj.

Ili legas, eble, la religian gazetaron. Malofte ili renkontas artikolojn pri kultivado sen kemiaj sterkaĵoj, pri la baza maljusteco de la lerneja sistemo, ktp. Pri tiuj aferoj oni informiĝas per aliaj medioj.

Pro tio, junuloj, kiuj interesiĝas pri verdaj ideoj foje flankenĵetas siajn ekleziojn. Sed eble nun la afero ŝanĝiĝas.

Malarmado, kontraŭnuklea aktivado, kunligas ekleziulojn kaj multajn aliajn homojn. Ni ektimas pri la terglobo mem, nia hejmo, kaj ni demandas, ĉu ni, eĉ sen nuklea milito, dum multaj jaroj ekspluatadis ĝin, anstataŭ prizorgi ĝin.

Fakte, mi nun estas ege kontenta. Tuj post kiam mi finos ĉi tiun artikolon, mi devos verki anglalingvan recenzon de nova libro: *Towards a story of the earth* (Ĝis historio de la terglobo), verkita de dominakana pastro, eldonita en Dublin, kiu traktis tiun temon.<sup>2</sup> Li montras, kiel la Malnova kaj Nova Testamento, la Patroj, aparte Ireneus (Ireneo), S. Tomaso de Aquino (Tomaso de Akvino) insistas, ke Dio daŭre, senĉese, kreas kaj la mondon kaj la tutan universon. El tio, li klarigas nian respondecon.

Tra S. Francesco de Assisi (Francisko de Asizo) kaj Teilhard de Chardin (*tejar' de ŝardē*), ĝis la Ekumena Konsilantaro de Eklezioj, li donas tute verdan mesaĝon. Li eĉ foje mencias la verdan partion, kaj aparte konsideras la justecon kaj la bonon de la tero.

Kaj ankaŭ, antaŭ du aŭ tri monatoj, aperis alia libro<sup>3</sup> de samlanda pastro, sed kiu laboras en la insuloj Filipinoj, kaj tie spertis la efektojn de la faraĉoj de la Monda Banko (*The World Bank*), kaj de la spertuloj, por la vivo de malriĉaj kultivistoj.

Jen almenaŭ du bonaj kaj vekigaj libroj en la angla lingvo. Mi esperas, ke similaj aperas en aliaj lingvoj, kaj ke kristanoj kaj verduloj pli kaj pli kunlaboros kaj kunfandiĝos.


Maire Mullarney, Irlando

## NOTOJ

1. Estas en Usono sufiĉe grava movado, *Growing without schooling* (kreski sen lernejoj), kiu sukcesas ŝanĝi leĝojn en multaj usonaj ŝtatoj.

2. CARROLL (Denis). - *Towards a story of the earth*. - Dublin : Dominican Publication.

3. McDONAGH (Sean). - *To care for the earth* (prizorgi la teron). - London : P. Geoffrey Chapman.



## SINTENO AL LA NATURO - KULTURA FENOMENO

Oni povus trovi plurajn difinojn pri la kulturo<sup>1</sup>. Mi provos konstrui alian difinon. Mi diru, ke kulturo koncernas ĉefe aron de homoj. Malgraŭ ke multaj pensus male, mi insistas, ke kulturo por homo sola neniel utilas. Ĝi konsistas el nediritaĵoj, el aŭtomataĵoj, el aferoj, kiujn oni ne bezonas klarigi. Ĝin oni ne ricevas denaske sed oni ricevas per la eduko fare de la gepatroj kaj de la socio (lernejo, ludoj, ktp.), kaj poste, kiam tiuj studitaĵoj fariĝis kulturo, ili eniĝis en la kutima, aŭtomata pensmaniero, vivmaniero de la persono, uzataj en la rilatoj, en la komunikado kun la aliaj.

La kulturo koncernas kolektivon, ĉar ĝi regas la rilatojn inter la diversaj anoj. Ĝi same unuecigas la pensmanieron de ĉiu en la grupo.

En Francujo, oni ankaŭ diras, ke la kulturo estas tio, kion la homo akiras per studo kaj sperto por pliriĝi la propran vivon kaj por plenumi sin mem. Sed tiujn akirojn oni iam uzas en la socia vivo. La escepto konfirmanta la regulon estas, kiam homo sola sur dezerta insulo uzas sian kulturon, sian scion por konstrui domon aŭ ŝipon.

Socia vivo estas komunikado. La etnologoj observas la diversajn sociojn. Ili konstatas la diversajn kutimojn, morojn. Ĉu temas pri manĝkutimoj, ĉu temas pri religiaj ritoj, ĉiam temas pri la kulturo. Ĉu temas pri la lingvo, ĉu pri la bildoj, la mitoj, la parabloj, la fabeloj, kiuj vivigas ĝin, ĉiam temas pri la kulturo.

Ĉiuj ĉi tiuj sintenoj, agoj, estas konsekvencoj de la t.n. kulturaj valoroj. Ili gvidas la pensmanieron, la moralon. Ili temas pri la bono, la belo, la vero. Ili kondukas al idealoj. Ili fiksas sekve normojn. Ili konstruas modelojn. Ili ĝenerale havas religian aŭ kvazaŭ religian karakteron.

Ĉar neniu grupo estas vasta kaj unueca, ekzistas sub-kulturoj. Kaj oni povas studi la diversajn sub-sub-kulturojn. Tio estas etnologia kaj sociologia laboro.

Mi citos nur kelkajn kazojn de kultura diverseco aŭ specifeco malbone konata aŭ supozata.

Oni multe parolas pri la "okcidenta kulturo", sed oni same mistsakas la grandan malsamecon inter la okcidenteŭropa kaj la nord-amerika kulturoj. Usonanoj ne sukcesas kompreni kiel pensas kaj

## SINTENO AL LA NATURO - KULTURA FENOMENO

agas eŭropanoj pri sociala asekuro. Inverse, eŭropanoj ne sukcesas kompreni, kion signifas por penso kaj ago la limo (*the frontier*).

Dua kazo, pri specifeco, estas la sub-kulturo de la adventistoj. Ilia pens- kaj ag-maniero multe diferencas de la ĉirkaŭanta medio, sed neniu eksterulo povas ekkoni ĝin. Temas ekz-e pri kiel estas vivata la sabata tagnokto<sup>2</sup>.

Do, en tiu kadro, kia estas la sinteno de la homoj, rilate al la naturo? Kiel niaj samteranoj sin tenas antaŭ la naturo, en kiu ili vivas? Kiel ni pensas, ke ĝi statas antaŭ ni?

Ĉu ĝi eble estas supera eĉ al ni, ke ni devu respekti ĝin, adori ĝin aŭ pli ĝuste ĝiajn erojn, antaŭgarde honori ĝin, por ke ni restu en paco kaj ricevu bonan rikolton. Sama sinteno estis tiu de diversaj kulturoj, ekz-e en Azio kaj Afriko<sup>3</sup>, kie la "Granda Dio", la kreinto, lasis la teron, devigante la homojn aranĝi la vivadon kun la diversaj spiritoj, kiuj troviĝas en la natur-elementoj. Tio kiel fortaj tabuoj tiam protektas la naturon, grandparte.

Aliaj kulturoj konsideras la naturon kaj ĝiajn elementojn, kiel egalaj al la homoj, samrajtaj, ĉu ĉar ambaŭ estas same kreitaj, per la sama mano, ĉu ĉar iranta de unu al alia stato la animoj troviĝas egale sub diversaj formoj. Tiu lasta kazo estas ĝenerale la hindua opinio, kiu etose eniras la okcidentan mondon. Alian ekzemplon pri tiu egala sinteno mi trovis en kino. En la filmo franclingve titolita *Les dieux sont tombés sur la tête* (La dioj falis sur la kapo, t.e. la dioj freneziĝis), boŝmana ĉasisto endormigas la ĉasitan beston, parolas al ĝi, ke li bezonas manĝi, kaj ke li pardonpetas, kaj nur post tio mortigas ĝin, kaj manĝas.

En Eŭropo de pluraj jarcentoj, sed ĉefe de la lastaj, la sinteno al la naturo estas tiu de la mastro al la sklava servenda objektaro. La naturo devas provizi la homojn per ĉiaspecaj rimedoj, por manĝi, vivi, ktp. Do estas ĉerpataj la krudaj materialoj, estas disigita la energio, ktp. Eĉ estas perforte laborigitaj aliaj homoj.

Sed post kelkaj kuraĝaj homoj, kiel antaŭ kelkaj jardekoj la franco René Dumont (*rene diŭmō*), la socio paŝete komencis ekonscii pri tio, ke eble la naturo ne povos elteni tion, kion la homoj faras el ĝi.

Tia konstato ne facile eniras la kulturon de la nuntempuloj. Kelkaj tutsimple neas la danĝeron, aŭ malgravigas ĝin. Mi nomu ilin la optimistoj. Varianto estas tiu, kiu agnoskas kelkan danĝeron, sed ne por li, por iu alia eble, sen konsekvencoj por li mem. Alia varianto estas tiu, kiu pensas, ke per atentego, sekurecaj zorgoj,

## EVANGELIAJ KAJEROJ

oni povas malhelpi eble hazardan (hazarde eblan) malbonan eventon.

Tamen, tiu ĉi problemoj de la limoj de la tera kapableco, eltenpovo, kondukas pli kaj pli al kultura rompo, ne ĉiam facila. La antaŭajn kulturajn skemojn oni devas anstataŭi. Oni per raciigo provas rekonstrui kulturajn sistemojn, kiu en la nun konsum- kaj plezur-kulturo, pravigus la nepre farendajn atentojn pri la naturo. La urĝo de la situacio devigis la intelektularon pripensi. Oni nun provas derivigi la moralon de la scienco, ĉar eĉ la ekziston de dio oni rifuzas. Kvankam restas ĉiam la egoismo kiel motoro de preskaŭ ĉiu kulturo, nun oni, pro timo kaj emocio, alprenas kelkajn altruismajn valorojn, kiel agnosko de nia vivmedio, de la graveco de ties ekvilibro, kiel agnosko de la neceso helpi la Trian Mondon, pro la danĝero de tro granda ekonomia malekvilibro.

Eble eĉ teologie, oni sekvas la ĝeneralan movon kaj provas klarigi el la Biblio aŭ el aliaj kristanaj fontoj, kial oni devus tiujn ekvilibrojn atenti.

Kiel do kulture funkcias homo, ĝenerale, kaj pri sia sinteno al la naturo? Koscie aŭ ne koscie, lia tuta vivo baziĝas sur kultura modelo, sur meza ideala sinteno, laŭ la dirita aŭ nedirita leĝo de la ĉirkaŭanta socio. Oni povas serĉi el kiu fonto tio devenas, en kiu tereno tio enradikiĝis, kiel li pravigas siajn agojn. Kaj tiu bazo, tiu modelo, kondukas al agoj kaj pensoj, al pensoj kaj agoj, al kondutoj. Sed ankaŭ ĉefe estas interese serĉi, kiam estas esceptoj en la konduto, kaj tiel trovi, kie troviĝas la veraj bazoj, modeloj, radikoj.

Ni ekzamenu, ni diru, la mezan ne-kristanan ekologiiston. Tio baziĝas sur personaj konatuloj. Ne temas pri konataj agantaj verduloj, sed pri simplaj homoj, kiuj pensas bone pensi kaj agi, ĝuste laŭ ili. Ili vivas inter idealoj kaj emocioj. Forta bildo ĉe la televido forte impresas ilin. Ili ne povas elteni la vidon de suferoj, ĉefe se homo kaŭzis ilin. La idealoj estas justeco, libereco. Ĉu tiu libereco estas de iu alia, ĉu estas ankaŭ la propra. Ili do favoras kaj vivas la seksan "liberiĝon", akceptas kaj uzas kiam bezone la aborton. Kelkfoje, ili ne fumas kaj batalas kontraŭ tabak-fumado, pli malofte ili ne trinkas alkoholon, ĉar ĉio ĉi tio estas malsaniga, kaj eble kostas monon al la socio. Ilia lukto por la kologio estas lukto por la estonto de la planedo, kie ili mem vivos, kaj ankaŭ iliaj infanoj, se tiujn ili havas. Ili batalas por la malriĉuloj, por la Tria Mondo, ĉar estas maljuste, ke tiuj malbone manĝas, ne estas liberaj. Ili deziras, ke oni lasu la ĵus trovitajn tribojn for de la moderna socio, pro la pureco de tiuj ĉi kaj por eviti al tiuj ĉi la danĝerojn de la nuntempa mondo,

de kiu ili ĝuas. Kvankam ĝenerale ili tute ne estas religiemaj, tiuj idealoj de justeco, libereco, egaleco alvenis al ili tra la t.n. jud-kristana kulturo. Laŭ tiuj homoj, tute senkonflikte kunvivis la serĉo de la propra plezuro kiel motoro de la agoj, kaj la idealoj. Ili ne estas anarkiistoj, ĉar ili bone ensociiĝis, kaj uzas la servojn de la socio. En tiu kunestado de idealoj kaj plezur-serĉo, unu aŭ alia radiko superas, laŭ la cirkonstancoj. Tio povas kaŭzi al kristana okulo strangajn impresojn.

Nun ni ekzameni la mezan kristanon, kiu konsciiĝis pri la danĝeroj, kiuj minacas nian medion. La kulturo de tiuj baziĝas sur la tradicia moralo, etiko, kiu devenas de la Biblio kaj de la deveninta teologio. la ĉefa trajto estas amo, amo al Dio kaj al la kunhomoj, ĉu ĉar ili pro peko foras el Dio kaj el la savo, ĉu ĉar ili malbonfartas, malsatas, ktp. Sed en ĉio tio ĉi, nenio aŭ preskaŭ pri la medio, pri la "ekologio". Antaŭ tiu ĉi malpleno, post ekkonsciiĝo pri la problemoj, estas diversaj reagoj, same kiel en la ĝenerala kulturo.


Kelkaj diris, diras, "vidu la nunan staton de nia tero, certe baldaŭ estos la fino". Aliaj komencas reagi, ĉu ete, ĉu pli forte, sen fondi la reagojn sur io pli ol la nura saviĝo de la planedo, nia vivmedio. Aliaj, kiuj luktas por ekologio, deziras fondi tiun ĉi agadon, kaj sekve serĉis sur kiu bazo oni konstruu modelon, etikon por kristana ekologiismo. El tekstoj, kiuj unue tute ne intencis tiun ĉi problemaron, ili tiras argumentojn por pruvi, ke oni devas tiel agi. Alvenis la ideoj de daŭra kreado, de kunkreado, de samkreito.

En sia historio, la Eklezio frontis diversajn tiajn problemojn. Ofte, oni provis pravigi ĝustan konduton, reage kontraŭ la tiama ĝenerala kulturo, sed obeante la bibliajn leĝojn de amo kaj respekto, ĝenerale trudate de la emocioj. Sed la kulturoj ŝanĝiĝas, la "bonaj modeloj" ankaŭ. Nun la Eklezio frontas diversajn iel rilatajn problemojn, la danĝero pri la vivmedio, la danĝero pri paco, kaj sekve pri la vivmedio, kaj la situacio de la Tria Mondo. Kaj la Eklezio ne povas ne paroli pri tiuj danĝeraj situacioj, ne povas eviti ilin. La Eklezio devas ankoraŭ alporti sian ŝtonon en la konstruo de la nova kulturo, se ne, malaperos unu post unu la kristanaj spuroj en la ĝenerala kulturo.


Philippe Cousson, Francujo

## NOTOJ


1. *Images de la culture* / P.H. Chombart de Lauwe & al.. - Paris : Ed. Ouvrières, 1966. - pp. 16 k.s.  
DOLLOT (Louis). - *Culture individuelle et culture de masse*. - Paris : P.U.F., 1983. -(Que sais-je ?). - pp. 5-15  
*Gospel and culture, The Willowbank report*, § 2, en *Explaining the Gospel in today's world*. - London : Scripture Union, 1978. -(Lausanne occasional papers). - pp. 17-18, aŭ en *La culture au risque de l'Évangile*. - Lausanne : P.B.U., 1979. - pp. 13-15.
2. *The wall of adventism* / Joan Craven, en *Christianity Today*, october 19th, 1984. - pp. 20-25.
3. RICHARDSON (Don). - *L'éternité dans leur cœur*. - Lausanne : Jeunesse en Mission.  
ELIADE (Mircea). - *La nostalgie des origines (The quest)*. - Paris : Gallimard, 1978. -(Idées),  
" " - *Traité d'histoire des religions*. - Paris : Payot, 1979.




1. En-danĝe-ri-ĝis, ho Sinjor', la  
Ni fuŝis la na-turon per mal-



mond' kaj nia vi-vo. A-do-ris ni  
sa-ĝa hom-akti-vo.



al la Progres', kaj nun montriĝas



ĝi-a prez: veneno-produktivo.

1 *Endanĝerigis, ho Sinjor',  
la mond' kaj nia vivo.  
Ni fuŝis la naturon per  
malsaĝa hom-aktivo.  
Adoris ni al la Progres',  
kaj nun montriĝas ĝia prez':  
veneno-produktivo.*

2 *Prudenton, fortojn donis Vi  
Por flegi vivo-spacon;  
sed aĉe ekonomis ni,  
detruis ĝian pacon.  
Ne ĉion fari, kion ni  
ja povus fari! — tio ĉi  
haltigos la minacon.*

3 *Ne retro-iru la Kristan'  
al forpasintaj normoj.  
Ni, male, helpu kun elan'  
pretigon de viv-formoj,  
en kiuj venas al akord'  
pretendoj homaj — Dia ord',  
ja kvazau roz' kaj dornoj.*

4 *Ho Dio, ne permesu, ke  
ni lasu nin instigi  
de profitem', aŭ jesu ke  
ĝi povu korojn ligi.  
Por homa vivo — bona fari',  
por la naturo — bona gard':  
provstona por praktiki!*

5 *La limojn del kreskad', Sinjor',  
ni devas akre senti.  
Necesas fantazio por  
teknikon komplementi  
per tute nova vivo-stil'  
kaj spari energiojn mil  
kaj pri l'natur' atenti.*

6 *La mondon Vi konfidis al  
ni por ĝin home formi.  
Ordonoj dek nin gvidas al  
viglec' por ne plu dormi:  
planante pri la estontec'  
ni volas, Di', en ĉiu pec'  
al Via vol' konformi.*

Detlev Block, 1979  
(Deutsches Pfarrerblatt 1979 nr. 14)  
El la germana trad. A. Burkhardt, 1979

## La polucio kaj la morto de la homo

SCHAEFFER (Francis A.). — *Pollution and the death of man; the Christian view of ecology.* — Wheaton, Ill. : Tyndale House Pub., 1970 & London : Coverdale House Pub. Ltd., 1970. — 125 p. ; 21 cm. — ISBN 0-8423-4840-9.

Kiam la redaktoro unue demandis min pri la ebleco verki recenzon de la libro, *Pollution and the death of man, the Christian view of ecology* (Polucio kaj la morto de la homo, la kristana vidpunkto pri ekologio), mi hezitis. Antaŭ eble 10 jaroj, mi legis du librojn de Francis Schaeffer (*ŝefr'*, 1912-1984), kaj mi devas konfesi, ke ili ne tute plaĉas al mi. Je multaj punktoj, mi konsentis kun liaj ideoj, sed ofte mi tute ne komprenis liajn argumentojn. Schaeffer ofte kondamnis aliajn pro iliaj saltegoj de fido, pro iliaj nepruvitaj supozoj, sed mi notis, ke Schaeffer ofte faris la samajn pekojn. Mi devas diri, ke ĉe tiu ĉi libro mankas tiaj problemoj. Ĝi estas libro de filozofio pri nia uzo (pli ĝuste nia misuzo) de la naturo kaj de la medio. Ĝi donas nenium konkretan solvon, sed Schaeffer donas voĉon al vidpunkto, kiun, mi kaj vi, mi certas, dezirus vidi en la tuta kristanaro, kaj, kompreneble, ekster la kristanaro : nome, ni devas zorgi kaj protekti la naturon ĉar ĝi, kiel ni, estas kreitaĵo de nia Sinjoro. Kion Dio kreis, mi same kreitaĵo, ne povas malami.

Schaeffer citas du artikolojn kiel komencpunkton : *The historical roots of our ecological crisis* (la historiaj radikoj de nia ekologia krizo) de Lynn WHITE Jr, *Science*, vol. 155, March 10th, 1967, pp. 1203-1207, kaj *Why worry about nature ?* (Kial maltrankviliĝi pri naturo ?) de Richard L. MEANS, *Saturday Review*, December 2nd 1967. Ambaŭ artikoloj estas repesitaj ĉe la fino de la libro. Schaeffer unue diskutas ĉi tiujn du artikolojn kaj disvolvas sian respondon aŭ solvon al la problemoj.

Prof. White en sia artikolo diras :

"La homa ekologio estas profunde formita de la kredo pri nia naturo kaj nia destino, t.e. de la religio."

Schaeffer tute konsentas. White sugestas, ke ni sekvu la ekzemplon de Sankta Francesco de Assisi (1182-1226) kaj de lia kredo pri la virto de humileco, por ambaŭ la individuo kaj la homa specio.

Al la artikolo de White, Prof. Means respondis en sia artikolo. Means etendas kaj ampleksigas la ideon de White, sed puŝas ĝin ĝis panteismo. Por Schaeffer panteismo (kaj orienta penso) estas ĉefa

kaj tre grava zorgo. Li antaŭvidas, ke zen-budhismo kaj orienta pensmaniero pli kaj pli influos okcidentan pensmanieron. Ankaŭ, li konsentas, ke la hipio<sup>1</sup> havas ĝustan zorgon por la medio, sed li ne konsentas pri ilia filozofia bazo, speciale se ĝi estas zen-budhismo (oni devas memori, ke ĉi tiu libro estis verkita en 1970, kiam la hipioj (flor-infanoj) estis floranaj).

Means prenas la pozicion, ke moralo estas fundamente pragmata sen ekstera aŭtoritato. Schaeffer kontraŭas ĉi tion kaj diras, ke panteismo donas neiun signifon al apartaĵoj de ekzisto. Ĝi donas respondon al unueco, sed neniun valoron al diverseco. Ankaŭ, panteismo ne altigas la homon, sed ĝi devas subpremi ambaŭ la homon kaj la naturon en la grundon.

Kio do estas la solvo de la mediaj problemoj? Schaeffer forte diras, ke la solvo estas en la kristanismo de la Reformacio. Tia kristanismo donas unuecan respondon kaj ĉi tiu unueco havas valoron ne nur en ĉielaj aferoj, sed ankaŭ pri la naturo. Nia Sinjoro parolis al ni, kaj diris al ni ion pri ambaŭ ĉielaj kaj naturaj aferoj. Do ni scias ambaŭ pri diverseco kaj universaleco. Unueco venis ne de la homoj kaj de ties racionalismo (ekz-e Kierkegaard, Kant, ktp.) sed de Dio.

En la ĉapitro "Grava kuraco" Schaeffer resumas siajn pensojn pri la falo kaj pri la fendoj, kiuj okazis: teologiaj, sociaj, psikaj, kaj naturaj. Nia apartado disde Dio estas kuracita de la pravigo, kaj ni atendu aliajn kuraciĝojn, ankaŭ per Kristo, en la sociaj, psikaj kaj naturaj partoj de nia vivo. Fakte, kun la helpo de Dio kaj de la Sankta Spirito, la Kristano devus nun trakti la naturon per kuracaj rimedoj. Ni ne posedas la naturan mondon, sed ni nur prunteprenas ĝin de la Sinjoro. Ni havas la respondecon flegi ĝin kiel intendanto.

Schaeffer finas la libron per la ideo de la kristana Eklezio kiel la modela fabriko (*pilot plant*). Li diras, ke la Eklezio, pasintece malinstruis nin pri homo kaj naturo. Nun la Eklezio devus esti modela fabriko, por montri ke, individue kaj komunume, en la nuna vivo, homo povas havi aŭtoritaton super la naturo sen detrui ĝin. La kristano havas la kapablon kaj la potencon ŝanĝi la nunan situacion.

Lia lasta frazo eble resumas lian sintenon kiam, ekvidante sovaĝan floron, la kristano diras: "Samkreito, samkreito, mi ne surpaŝos kaj subpiede premeĝos vin. Ni estas ambaŭ kreitaĵoj."

Cornelius J. McKown, Usono

notoj

1. Hipio (angle *hippy*): ano de grupo da personoj, ĉefe junaj, kiuj kritikis la socion pro ties nezorgo pri la individuoj kaj la medio. Hipioj estas porpacaj, kontraŭ la kutimaj reguloj de la socio, kontraŭ la institucioj. Li estas ankaŭ nomata *beatnik*, *bohemian*.

verkoj de Francis A. Schaeffer

- The God who is there* - La Dio kiu estas tie.  
*Escape from reason* - Fuĝo el racio.  
*He is there and he is not silent* - Li estas tie kaj li ne silentas.  
*Back to freedom and dignity* - Reen al libereco kaj digneco.  
*Genesis in space and time* - Genezo en spaco kaj tempo.  
*No final conflict* - Neniu fina konflikto.  
*Joshua and the flood of biblical history* - Josuo kaj la diluvo de biblia historio.  
*Basic Bible studies* - Bazaj bibliaj studoj.  
*Art and the Bible* - Arto kaj la Biblio.  
*No little people* - Neniu malgrandulo.  
*True spirituality* - Vera spiriteco.  
*The new super-spirituality* - La nova super-spiriteco.  
*Two contents, two realities* - Du enhavo, du realecoj.  
*The Church at the end of the twentieth century* - La Eklezio ĉe la fino de la dudeka jarcento.  
*The Church before the watching world* - La Eklezio antaŭ la rigardanta mondo.  
*The mark of the christian* - La marko de la kristano.  
*Death in the city* - Morto en la urbo.  
*The great evangelical disaster* - La granda evangelika ruiniĝo.  
*Pollution and the death of man* - Polucio kaj la morto de la homo.  
*How should we then live?* - Kiel ni devus do vivi?  
*Whatever happened to the human race?* - Kio do okazis ĉe la homa raso?  
*A christian manifesto* - Kristana manifesto.

## La blua planedo

*Séquence : La Planète Bleue, notes théologiques, pédagogiques et liturgiques pour les animateurs du culte des enfants de 8 à 12 ans* (sekvenco : La Blua Planedo, teologiaj, pedagogiaj kaj liturgiaj notoj por la animantoj de la Diservo de la 8- ĝis 12-jaraj infanoj). - Lausanne : Agence Romande d'Education Chrétienne, 1986. - 100 p. kaj  
*La Planète Bleue*. - Lausanne : A.R.E.C., 1986. - 36 p.  
 -(libreto por la infanoj)

"En la vastega spaco, loĝata de galaksioj kaj de miliardoj da steloj kun iliaj satelitoj, nia loko, por ni la homoj, estas la tero ! El malproksime la astronautoj ĝin vidis, admiris kaj fotis... Kaj jen : ĝi estas blua planedo ! Sur ĝi disvolviĝis la vivo, naturo abunda kaj escepta. Ĝis nun nia destino individua kaj kolektiva estas plene ligita al ĝia : 'Ni havas nur unu teron !'" (p. 3)

Tiu ĉi "sekvenco" entenas sep renkontojn de katekismo kaj/aŭ de celebrado, pri la temo de nia planedo, la blua, la tero. Temas, kiel la aŭtoroj klarigas en la enkonduko, pri nek oponi Biblion kun scienco, nek pruvi Dion per la naturo, nek respondi ĉiujn demandojn.

La ĝenerala plano estas : renkonto 1. prezento de la komuna projekto ; renkontoj 2 kaj 3. tio, kion ni vidas kaj aŭdas ; 4. Sur la tero... Dio ; 5 kaj 6. nia respondeco, la konsekvencoj de la Bona Novaĵo de Dio al la homoj ; 7. projekto de Dio pri "nova tero".

Tio ĉi estas kristana elpaŝo per ties spiritaĵaj dimensioj kaj per la frata aspekto de la grupo. Tiu elpaŝo metas vidalvide verojn ŝajne kontraŭdirajn.

La infan-libreto enhavas, por ĉiu "renkonto" : "neŭtran" titolon (nek optimisman, nek pesimisman), desegno(j)n por ridetigi kaj pripensigi, bibliajn tekstojn, preĝotekston. La tuta grupo dum la daŭro de la sekvenco plenigas nigran mondmapon, per desegnoj, fotoj, ktp.

La manlibro por la animanto enhavas : - enkondukon ; - por ĉiu renkonto, teologiajn, pedagogiajn notojn ; - du proponojn por fina celebrado.

"Nunaj loĝantoj de la Blua Planedo, ni fariĝis konsciaj pri ĝia fragileco, pri ĝia mistero en la senlima spaco, pri la vetaĵoj : kaj ni prenis la riskon de espero ! Ŝarĝitaj de nia propra respondeco, laŭ tio, kio ni estas, ni klopodas plenumi ĝin ne malfortiĝante. Ni faros tion meze de la aliaj, kun ili, aŭskultante la mobiliza parolo, kiun Dio alparolas al ni, animitaj de la dinamika Spirito, kiun en ni, en la nomo de Jesuo, la homo, la proksimulo, la frato, sed ankaŭ la Sinjoro, Li renovigas senĉese." (p. 81)

La celo de la sekvenco estas : lerni vivi kiel kristano sur la tero.

La temo igas, ke la enradikigo pure biblia estas malmulte grava, la elektitaj tekstoj tuŝante la temon oblikve. Tiu serio de renkontoj povas konduki la infanojn konsciiĝi pri problemoj kaj realaĵoj de la homo sur nia planedo. Ĝi situas en eskatologio, kiu metas la "grandan universalan savon" en veni en la "konfido kaj la konstanta praktiko de la amo".

Philippe Cousson, Francujo

La tombista aktaro

GUINNESS (Os) . - *The Gravedigger file : Papers on the subversion of the modern church* (La Aktaro "gravedigger" : dokumentoj pri la subfosado de la moderna eklezio). InterVarsity Press, 1983. - 245 p. ; broŝ.

La nuna libro konsideras la priplorindan staton de la okcidenta kristana eklezio - de la vidpunkto de iu fiktiva malamiko. La angla vorto *gravedigger* signifas "tombofosiston". Laŭ la opinio de tiu verko, la tombo-fosisto estas la eklezio mem, kiu fosas sian propran tombon. La libro estas verkita en stilo, kiu frape memorigas tiun de *Screwtape letters* de C. S. Lewis. Legintoj de tiu anglalingva klasiko rememoros, ke la nomitaj leteroj estas fiktiva korespondaĵo inter ĉefa diablo-tentisto kaj lia subulo. La leteroj montras la subulon, kiel konfuzi, diboĉi, kaj fine damnigi iun homon.

En la *Gravedigger file*, memorandoj anstataŭas leterojn, kaj la malamiko ne estas diabloj, sed sekreta kontraŭ-eklezia organizo fiktiva. Sed la premoj aplikataj por subfosi kaj ruinigi la eklezion tute ne estas fiktivaj. Ili estas : sekulariĝo, privatiĝo kaj pluriĝo.

Per sekulariĝo oni volas priskribi la procezon, kiu ekas ĉe la centraj sektoroj de moderna socio kaj disvastiĝas eksteren, liberiganta socion de la reala kaj decida influo de religio. La centraj sektoroj estas la lernejo, industrio, registaro, amas-komunikiloj, scienc-tekniko, ktp. En Eŭropo estas tiu premo pli superreganta kaj ruiniga ol en Usono.

Privatiĝo, la dua premo, kompletigas sekularigon, kaj koncernas la limigon de religia (kristana) influo al la privata sfero de la vivo. En tiu sfero troviĝas la familio, la eklezio, kaj la distra industrio. En tiu sfero la moderna okcidenta kristano ja havas liberon, sed li ne plu povas influi socion, kiu rigardas lian kredon kiel hobion.

La tria premo, pluriĝo (angle *pluralization*), konfuzas kaj malfortigas la kristanon per tio, ke ĝi proponas al li plurecon de elektoj. Kiun manĝaĵon ni manĝos ? Kiun eklezion ni vizitados ? Kiun profesion ni eniros ? Kiam estas tiom da elektoj (unuĵ bagatelaj, aliaj gravaj), niaj vivoj emas esti malpli stabilaj kaj certaj.

La aŭtoro, konata brita kristano, elmontras bonan scion ankaŭ pri la stato de kristaneco en Usono kaj en Eŭropo (precipe Francujo). Li asertas, ke kristanoj "ne havas senton pri la socia dimensio de sia kredo", notante ke multaj kristanaj organizoj ne metas la batalon kontraŭ sekulariĝo sur sian tagordon. Por kompreni kaj sukcese rezisti la tri premojn, necesas studo de la sociaj sciencoj, kie troviĝas tre malmultaj kristanoj.

Mi trovis tiun libron malkvietiga, portanta amaran novaĵon al ĉiu pensanta kristano. Kiamaniere ni lasas nian kredon fariĝi privata afero ? Ĉu la ondo de sekulariĝo rulas super nin, kaj ni restas indiferentaj al ĝi ? La Skriboj asertas, ke Kristo estas Sinjoro super ĉio. Ni preĝas :

"Venu via regno, fariĝu via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero" (Mat 6:10), sed sekulariĝo antaŭmetas la regnon de la falinta homo. Ni batalu por la vero !

Doug Portmann, Usono



## RECENZOJ

## El revuoj

Kiam mi trarigardis diversajn artikolojn en revuoj, mi trovis tre variajn alirojn al la problemaro pri la sinteno al la naturo. Inter ili estas persona atesto, teoria sintezo aŭ teologia studo.

*L'écosystémisme comme nouvelle manifestation du scientisme* (La ekosistemismo kiel nova manifestiĝo de la sciencismo) / Rémy Hedding, en *Cahiers du C.P.O.*, 44, juin 1982, pp. 11-18.

La aŭtoro trarigardas la ekologian teorion, kaj komparas ĝin kun la sciencismo de la fino de la lasta jarcento, kiu volis ĉion regi nome de la scienco. Tiam, kaj ankoraŭ en la ekologiisma ideologio oni volas derivi moralon el la scienco. La ideo estas, ke la tekniko implicas la socion, ke bona tekniko povas konduki al bona socio, kaj ke tiu bona tekniko estas certe eta tekniko. Sed la aŭtoro asertas, ke la tekniko estas nur ilo, kaj do de ĝi ne povas derivi moralon.

*Protektado de la naturo medio kaj la Biblio* / Theotima Rotthaus, en *Dia Regno*, 11, novembro 1986, pp. 2767-2768.

La aŭtorino, kunlaborinto en la unua numero de *Evangeliaj Kajeroj*, defendas la pozicion, ke la homoj, kaj la kristanoj, devas protekti la naturon. Ŝi komencas per konsideri la legadon de la Biblio, kiu povas esti ĝusta aŭ malĝusta. El la kompreno de la Biblio, oni povas tiri, ke ĉiuj naturaj elementoj estas kreitaĵoj, ke Dio lasis al la homoj la respondecon regi super la naturo, ekz-e, Li lasis la homon doni la nomojn de la bestoj. Sed samtempe, la homo restas kreitaĵo, kiel la ceteraj. La tekstoj, kiujn ŝi trovis pri la protektado de la naturo en la Biblio, estas pli pri pureco aŭ sankteco ol pri necesa protektado. Ŝi konkludas, ke la tuta naturo, homoj kaj ceteraj eroj servu kaj laŭdu Dion.

*La responsabilité des églises en matière de protection de la nature ou l'oubli du premier article du crédo* (La respondeco de la eklezioj pri la protektado de la naturo aŭ la forgeso de la unua artikolo de la apostola simbolo) / Frédéric Trautmann, en *Foi Education*, 55, juillet-septembre 1986, pp. 9-13.

En la prelego, el kiu estis verkita tiu teksto, la pastoro Trautmann, volas same alvoki la kristanojn al la protektado de la naturo. Li konstatas, ke la nuna stato de la planedo, la detruoj estigis ekkonsciigon. Li studas la opiniojn pri la naturo, unue en la MNT, kaj en la NT, ĉe la Patroj kaj filozofoj, kaj nun. Li

konstatas, ke la kreitaro, verko de Dio, estas nocio malfrue aperinta, kiu kontraŭas la tiuepokan kutiman religian aspekton de la diversaj natur-elementoj. La homo estas ero el tiu ĉi kreitaro. Kaj la kreitaro estas minacata, kulpe de la kreitaĵo, per perforto. En la NT, la kreitaro estas la kosmo, sed ne ekzistas senco de la naturo. La savo de la homo estas la kerno de la NT. Ankaŭ ĉe Augustinus (Aŭgusteno) la kreitaro estas duaranga. Tomaso de Aquino kontraŭmetas la naturon kaj la gracon. Kaj de Descartes estis neta distingo inter la scienco (la naturo) kaj la filozofio (la pensanta subjekto). Nune estiĝas repacigo inter la homo kaj la naturo. Ni devas rezigni pri la superregado super la mondo, nome de nia propra vivo. "Ni havas nur unu teron."

*A handful of mud* (manpleno de koto) / Paul Brand, en *Christianity Today*, 29, 7, april 19th 1985, pp. 25-31.

La aŭtoro estas filo de misiistoj, estis edukita en Hindujo. Li rakontas epizodon el la propra infaneco, el kiu li konkludas, ke "grundo estas vivo, kaj ĉiu generacio estas respondeca por ĉiuj generacioj por veni."

En lia infanaĝa regiono, oni nun senkonsidere hakas arbojn, kaj detruas la grundon, por gajni monon, sen zorgo pri la tero. Kiam li laboris en Etiopio, li konstatis, ke multaj problemoj devenas de tiuj bienuloj, kiuj povis postuli iun ajn bone zorgitan landpecon kaj preni ĝin de la kultivisto. Agrara reformo malhelpus tion. Pro multaj kialoj, tie ankaŭ la arboj estas hakitaj, kaj la Blua Nilo portas Etiopion al Egiptujo. La lando, kie li nun vivas, Louisiana (Luiziano) estas formita el tero el Kansas. Kial estas tiu erozio? Por gajni monon kaj tempon. Kaj pli, la rivero de Tom Sawyer estas nun serviva pro la multaj industrioj kiuj estas laŭ Mississippi. Li tiel formulas la egoisman sintenon jene:

"Pli granda parto POR MI el tio, kio estas havebla nun, sed, kiu eble ne estos havebla morgaŭ."

Li studas poste Lev 25:23, Jes 24:4-5 kaj Hoŝ 4:3. Por konkludi, li revenas al Hindujo, kie direktoro de lepruleja centro plantis arbojn, kie estis nur rokoj, kaj kie nun estas arbaro, deklarita "sanktejo" de la departemento de la medio de la ŝtato.

*Habiter la création* (Loĝi la kreitaron) / Otto Schäfer-Guignier, en *Bulletin du Centre Protestant d'Etudes*, 39, 3-4, mai 1987, 43 p.

La aŭtoro konstatas, ke ekologio estas unue scienco, kaj poste fariĝis konscio kaj batalo. Li substrekas la gravecon de la kreado, kaj pri la tradicia kontraŭmeto de tekniko kaj naturo, ke nek unu nek la alia estas bona aŭ malbona en si mem.

## RECENZOJ

"Inventi teknikon, kiu estas kreiva KUN la kreivo de la naturo kaj ne kontraŭ ĝi, redoni justecon al ĉiu kreitaĵo sub la ĉielo kaj ne nur al homaj interesoj mallongtempaj : jen la promeso kaj la postulo de nuna konfeso de la Kreinto." (p. 10)

Li notas la kontraŭmeton de aktiveco (industrio) kaj kontemplado. Li vidas renaskiĝon de la teologio de la kreado post forgeso en la okcidenta teologio.

"La adoro al la Kreinto kaj la amo al la kreitaĵoj (same) kunas."

Li trarigardas la bibliajn tekstojn rilatajn al la naturo, grupigante ilin en du kategorioj : la kondiĉo de la kreitaĵoj, kaj la signifo de la kreado. Li analizas en la NT tekstojn, kie la kreado estas reinterpretita tra Kristo, kiel la pasiono en Mateo kaj Romanoj 8. La kruco kaj la kreado estas ligitaj.

"La fido de la Eklezio devas substreki, ke la homo estas kunkreitaĵo kun la cetero de la kreitaro, kaj ke li ne havas la rajton detrui tion, kio ne apartenas al li." (p. 39)

Li parolas pri komuneco de la kreitaĵoj. Li diras : "Ni malbone loĝas la kreitaron". La Sankta Manĝo, kie eniras la naturo kaj la laboro de la homo, estas "alvoko al la partopreno kaj al la repacigo, alvoko al la universala komuneco de la kreitaĵoj." (p. 41)

Philippe Cousson, Francujo

## EVANGELIAJ KAJEROJ

### La kristano kaj la ekologio

Kvankam la Biblio ne enhavas la vorton "ekologio", ne estas ia dubo, ke nia Gvidlibro donas al ni konsilon pri ĉi tiu afero. Tiel kiel la psalmisto skribis :

"Via vorto estas lumilo por miaj piedoj,  
Kaj lumo por mia vojo." (Psa 119:105)

Tial ni neniam hezitu legi kaj esti instruata. Samtempe, ni uzu la Biblion por nia edifo kaj ne por pravigi nin aŭ niajn opiniojn.

Dio kreis la mondon. Tion ni kredas kaj pri tio ni povas legi multloke. Ekz-e en la unua ĉapitro de Genezo, aŭ en Jesaja 45:18, aŭ Neĥemja 9:6, kaj ceterloke.

"Kaj Dio rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona." (Gen 1:31)

Bonvolu rimarki, ke ĝi ne estas simple "bona", sed "ĝi estas tre bona".

Post la kreado du aferoj okazis. Unue, Dio transdonis Lian kreaĵon al la homaro por uzi kaj prizorgi :

"Kaj Dio benis ilin (la viron kaj la virinon), kaj Dio diris al ili : Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero." (Gen 1:28)

Due, la perfekta kondiĉo de la mondo ŝanĝiĝis. En Genezo 3:17-18 ni legas :

"... malbenita estu la tero por vi (Adam)... Kaj dornojn kaj pikaĵojn ĝi kreskigos por vi..."

Kaj en Genezo 8:21-22 ni legas :

"... La Eternulo diris (post la diluvo) ... : Mi ne plu malbenos la teron pro la homo, ĉar la penso de la homa koro estas malbona jam de lia juneco, kaj Mi ne batos plu ĉion vivantan, kiel mi faris."

La mondo ne estas tiel perfekta, kia je la kreado, sed ĝi certe restas mirindaĵo spite la pekadon de la homaro kaj la malbenojn de Dio.

Kion ni lernus el ĉi tiuj du aferoj ? Ĉefe, ni lernus nian respondecon al Dio pri la mondo kaj ĝiaj enhavaĵoj. Tiam, kiam Dio diras submetu la teron, Li ne diris detruu aŭ eluzu ĝin. Nun ne forhaku ĉiujn arbojn por anstataŭigi ilin per niaj propraj betonaj ĝangaloj. Plue ni rajtas regi "super... fiŝoj... birdoj... kaj..."

bestoj" (Bonvolu rimarki, ke kunhomoj ne estas inter la listo). Sed ni regu laŭ la dia modelo ; ni regu ame. Tio forviŝas la eblecon de krueleco aŭ forpasigo de iu fiŝo, birdo aŭ besto pro ago de la homaro.

Permesu, ke ni pasu al la temo per alia vojo. Tre bone konitaĵ estas ĉi tiuj vortoj el Mateo 25:14-15 :

"Ĉar tiel estas, kvazaŭ viro, forvojaĝante, alvokis siajn servistojn, kaj komisiis al ili siajn posedaĵojn. Kaj al unu li donis kvin talantojn... ; al ĉiu laŭ lia kapableco."

Pro la familiareco de tiu parabolo ni kutime pensas pri la bonaj servistoj, kiuj duobligis la valoron de la ricevita mono. Sed tio ne estas la ĉefa punkto laŭ mia vidpunkto.

La talanto estas grava valoraĵo, ĉu argento, ĉu oro. La punkto de la rakonto estas ke iu viro (Dio) transdonis al siaj servistoj (ni mem) gravan valoraĵon (inter aliaj la teron). La servistoj, kiuj ricevas la laŭdon (kaj eternan vivon) estas tiuj, kiuj duobligis (aŭ plibonigis) la originalan ricevitaĵon.

Nu, se ni difektas la mondon, certe ni ne plibonigas ĝin. Ni similas al tiu servisto, kiu enterigis sian talanton. Ni evitas nian respondecon, ĉar ni misuzas nian talanton. La mesaĝo estas sufiĉe klara : ni respondecas pri la uzado de la valoraĵoj (inter kiuj estas la mondo), kiujn Dio trandonis al ni. Tial io, kion ni faras, kiu difektas la mondon, estas misuzo de unu el la talantoj, kiujn ni ricevis.

Eble vi demandas : "Kion mi povas fari por plibonigi la ekologion ?" Vi povas fari ion, ĉar la parabolo klare konstatas, ke la talantoj estas donitaĵ "al ĉiu laŭ lia kapableco." Se vi ne povas planti arbon, plantu arbustojn. Se vi ne povas renovigi la domaĉaron en aŭ apud via urbo, balau la straton antaŭ via propra domo. Ne uzu produktaĵojn, kiuj malhelpas la ekologion. Se vi ne povas pensi pri io farebla, preĝu por gvidado. Sed agu ! Kaj agu hodiaŭ ! Nia mondo velkas pli rapide ol ĉiu el ni kredas.

Edwin C. Harler Jr., Usono

Kelkaj bibliaj rimarkigoj

Ofte, rilate al ekologiaj aferoj, oni citas el Gen 1:26 :

"Kaj Dio diris : Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni ; kaj ili regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo kaj super la brutoj, kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero."

Kaj el ĉi tiu cito, nuntempe oni ellegas, ke ni homoj havas la taskon, bone prizorgi la kreitaron, ke ni devas esti bonaj administrantoj de la kreo de Dio.

Tamen, enestas teksta problemo : la verbo regi, kiun ĉi tie uzis Zamenhof en sia traduko, renkontiĝas en Gen 1 kaj 3 plurfoje : Gen 1:16,18 (pri la suno kaj la luno, kiuj regas la tagon kaj la nokton) ; Gen 1:26,28 (la homoj kiu regas super la kreitaĵoj) ; Gen 3:16 (viro kiu regas super la virino).

En tiuj lokoj temas pri du malsamaj hebreaj vortoj : שָׂרָה kaj מָלַךְ. La unua (mašal) havas kiel bazan signifon : reprezenti | esti simbolo, parabolo : ĝin la teksto uzas en Gen 1:16,18 kaj 3:16. La senco de tiuj frazoj do estas, pli malpli, jena : Se oni vidas la sunon, oni sciu ke ĝi reprezentas la tagon; la luno reprezentas la nokton ; same, se vi vidas viron, li reprezentas (en la socia vivo tiutempa) la virinon. la dua verbo (rada') havas kiel bazan signifon : piedpremi, distreti. Do tiuj frazoj pli malpli diras : la homo piedpremas la fiŝojn, la birdojn, la brutojn kaj ĉiujn ceterajn bestojn.

Por konkludi ĉi tiun etan ekskurson, ni do povas konstati, ke ĝuste la versiklo, kiun oni plej ofte citas el Genezo rilate la ekologian taskon de la homo, ... diras ekzakte la malon ! Ĝi ne instigas la homon al zorgoplena uzado de la kreitaro, sed ĝi konstatas, ke ni homoj ĝin distretas...

Gerrit Berveling, Nederlando



## Afrika vidpunkto al la naturo

Tradicie, la afrika homo havas konon pri Dio.

La joruboj\* havas la nocion pri superrega Dio, kiu jam havis substancajn sekvantojn en Okcidenta Afriko.

Natura spirito kaj la spirito de Dio ŝvebas super la akvo, la aero kaj la naturo.

La afrikaj homoj kredis je multaj spiritoj, sed ni bezonas la bonsanktan spiriton de Dio.

Spirito natura loĝas en lokoj, homoj, plantoj, bestoj. Ili ĉiuj havas spiriton.

Tradicie, la afrikanoj adoris Dion pere de arboj, bestoj, birdoj, steloj, luno, suno, spiritoj, anĝeloj, fiŝoj, akvo, pluvo, heliko kaj diversaj manieroj pro nescio.

En la nomo de la religioj, antaŭ la alveno de Jesuo Kristo, homo oferdonis vegetaĵojn, bestojn, fruktojn por adori Dion.

Ĉar la nevideblaj Diaj ecoj, de post la kreado de la mondo fariĝas videblaj, sentataj per Liaj faritaĵoj, nome, Lia eterna potenco kaj dieco, tial al la homo mankas defenda pledo.

La tri regnoj de la naturo estas mineraloj, vegetaĵoj, bestoj. La mondo kaj lando prezentas multajn multajn naturajn belaĵojn kiel pluvo, blovo, suno, kaj sezona klimato.

Ni dankas Dion, ke Li kreis la ĉielon kaj ĉion kaj la teron. La tero apartenas al la Eternulo. La ĉio bona, kio ĝin plenigas, estas de Dio per Jesuo Kristo. Ni gloras Dion Cebaot. La teron Dio transdonis al la homaro.

"Kaj Dio diris : jen Mi donis al vi ĉiujn herbojn, kiuj semas semon, kiuj troviĝas sur la tuta tero, kaj ĉiujn arbojn, kiuj havas en si arban frukton, kiu semas semon ; tio estu por vi manĝaĵo. Kaj al ĉiuj bestoj de la tero kaj al ĉiuj birdoj de la ĉielo kaj al ĉiuj rampaĵoj sur la tero, kiuj havas en si animon, la tutan verdan herbaĵon kiel manĝaĵon." (Gen 1:29-30)

Denaska esenco propra al iuj estuloj aŭ estaĵoj, plejofte konsiderata kontraste kun la ecoj akiritaj per laboro kaj arto de

la homo estas naturo.

Naturo estas kunaĵo de ĉio, kio ekzistas en la mondo, konsiderata ĉu kiel kvazaŭa potenca diaĵo personiganta la kaŭzon kaj leĝojn de ĉiuj fenomenoj, ĉu kiel tuto submetita al konstantaj universalaj leĝoj de ago kaj reago.

Tradicie, naturo helpas homojn, vegetaĵojn kaj bestojn. La naturo estas amiko de homo. La naturo estas pli grava por ĉio en la rolo de inicado de la kompreno de la naturaj scienco kaj fenomenoj. Dio estas respondeca pri la naturo. Ni deziras bonan naturon. Naturo povas fariĝi danĝero kaj malamiko al la homo, kaj bestoj kaj vegetaĵoj, ekz-e kiel dum tempesto, tertremo, ŝtormo, akcidento kaj natura katastrofo laŭ la Dia volo al la malbenita estaĵo.

Dio lokis la bestojn kaj vegetaĵojn apud ni kiel helpantojn, por ke ili nutru nin, liveru al ni, servante Dion.

La naturo apartenas al Dio. La homoj en mia ĉirkaŭaĵo, nigruloj, terkultivas kaj fiŝkaptas por subteni sin mem.

Sur ĉiu paŝo vi trovas la elmontron de tiu senĉesa irado de la homaro al la progreso. La homa genro havas konstantan nevenkeblan nerefuteblan progresadon. La leĝo de progreso, kiu vin nepre pelas antaŭen kaj ĉiam antaŭen.

Godwin I. Oboh, Niĝerio  
kondensita

\*Joruboj : nigra popolo de Okcidenta Afriko, ĉefe en Niĝerio.

## El leteroj

Ernst Venter, Sudafriko :

... Laŭ mia kompreno, ĉiu eldono de via gazeto pritraktas alian temon. Ĉu vi jam pensis pri artikolaro kun la temo : "Observado de la malnovtestamenta leĝaro kaj publika (tutlanda) sano" ? Hebrea lama kunlaboranto mia foje rakontis, ke la MNT-a leĝaro grandparte estis sanec-reguloj kaj malmulte religio. Ekzameninte tion, mi konstatis, ke oferado kaj festotagoj pleje estis la sola aŭ ĉefa religiaĵo. Sabaton oni ne vizitis la sinagogon, kiu komence ankoraŭ ne ekzistis aŭ havis en- aŭ ekster-domajn religiajn kunvenojn. La tuta familio aŭ amikgrupo trankvile ripoze dormis, kuŝis, aŭ sidis sub ombra arbo, oni ĝoje babilis aŭ kantis aŭ aŭskultis malnovan rakonton fare de la maljuna avĉjo *Goldŝtajn* aŭ aŭskultis klarigon de ero de la leĝaro fare de gasta vojaĝanta levido aŭ pastro.

Tiu sabattaga ripozo gardas nin kontraŭ kormalsanoj kaj same la nemanĝo de besta sango kaj graso, kaj de la viando de la "malpuraj" bestoj, malebligas aŭ malpliigas la ensangan kolesterolon ĉe ni. Cetere, ne manĝante ekz-e prokaĵon ni evitas la enigon de parazitaj kiuj tiel aŭde formanĝas nian internon. La cirkumcido protektas tiun viron (ankaŭ lian edzinon). Tiel alte oni taksis la publikan sanon, ke ulo ne observanta la sanecregulojn estis tuj ŝtonmortigita, t.e. longan tempon antaŭ ol li malsaniĝus kaj fariĝus ŝarĝo por la komunumo. Eĉ kanaananoj kaj filistoj (ekz-e fakuloj kaj komercistoj) loĝantaj en la izraela teritorio kaj kiuj ne rajtis ĉeesti la izraelajn religiajn kunvenojn (eĉ post dek generacioj de loĝado inter la izraelidoj) tamen devis observi la sanecregulojn ĉar malsanuloj estis ne dezirataj ! Tio ĉi estas nur kelkaj ekzemploj. Oni ja povas verki kelkajn librojn pri tiu ĉi temo, mi do sugestas serion da artikoloj rilate tion ĉi. ...

EVANGELIAJ KAJEROJ

jam aperintaj numeroj

- |   |   |      |
|---|---|------|
| 1 | LA BIBLIO, el kie fontas nia fido                 | 1987 |
| 2 | EKOLOGIO, kiel ni administras la teron            | 1987 |
| 3 | LA SPIRITA VIVO, ne mi mem sed Kristo vivas en mi | 1988 |
| 4 | KOMUNIKADO  | 1988 |
| 5 | LA REGNO DE DIO                                   | 1989 |

TABACKI (Antoni Paweł). - *La naturo en la Biblio - Akvo.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 2, 1987, pp. 3-8

La BIBLIO priskribas la NATURON. La aŭtoro tie studas la AKVON kaj ĝiajn STATOjn (DE LA MATERIO).

JACKSON (Mervyn C.). - *Homa respondeco pri la klimato ?*

*Evangeliaj Kajeroj*, 2, 1987, pp. 9-14

La HISTORIO de la KLIMATO montras ŜANĜOjn. La POLUCIO minacas. Kie estas la RESPONDECO ?

Tiuj ĉi paĝoj estas modeloj por reprodukti katalog-slipojn. Sur ĉiu estas indeksa resumo, kun la deskriptoroj (ŝlosilvortoj) majuskle indikitaj. Malantaŭ ĉiu estas la tradukoj de tiu ĉi resumo.

Die BIBEL beschreibt die NATUR. Der Vefasser befasst sich hier mit dem WASSER und seinen AGGREGATZUSTÄNDEN.

La BIBBIA describe la NATURA. Qui l'autore studia l'ACQUA e suoi STATI (DELLA MATERIA).

NATURE is described in the BIBLE. The author makes a study of WATER in its differents STATES (OF THE SUBSTANCE).

La BIBLE décrit la NATURE. L'auteur étudie ici l'EAU et ses ETATS (DE LA NATURE).

La BIBLIA describe la NATURALEZA. El aŭtor estudia allí el AGUA y sus ESTADOS (DE LA MATERIA).

Die GESCHICHTE des KLIMAs weist VERÄNDERUNGEN auf. Es droht die VERSCHMUTZUNG. Wo liegt die VERANTWORTUNG ?

La STORIA del CLIMA mostra MUTAMENTI. L'INQUINAMENTO è una minaccia. Dov'è la RESPONSABILITA' ?

The HISTORY of CLIMATE shows changes. POLLUTION is a threat. Where does RESPONSABILITY lie ?

L'HISTOIRE du CLIMAT révèle des CHANGEMENTS. La POLLUTION menace. Où est la RESPONSABILITE ?

La HISTORIA del CLIMA señala CAMBIOS. La CONTAMINACIÓN amenaza. ¿Dónde está la RESPONSABILIDAD ?

KNÁVER Zoltán. - *La sopiro de la kreitaro - Rom 8: 19-22.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 2, 1987, pp. 15-19.

La MONDO kaj la EKLEZIO atentas unu la alian. La unua atendas, ke la dua manifestiĝu, kaj la dua atendas la FILECON per PACIENCO.

○

BERVELING (Gerrit). - *La malbona administranto.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 2, 1987, pp. 21-24.

Ĉu la BIBLIO vere instigas al EKOLOGIA ZORGO ? La aŭtoro komentas la tekston LUKO 16:1-13. Ĝi eble instigas al HELPO AL LA MALRIĈULOJ.

○



plurlingva kristana lesaŭro  
multilingual christian thesaurus  
thésaurus chrétien multilingue  
mehrsprachiger christlicher Thesaurus  
tesauro cristiano multilingüe

Vi estas petata sendi al la revuo adresojn de teologiaj bibliotekoj, por enketo al 1 bibliotekistoj pri indeksado

kaj eventuala partopreno en TETH, unue por la lingvoj angla, franca, germana, hispana kaj Esperanto.

Die WELT und die KIRCHE achten aufeinander. Erstere wartet darauf, daß letztere offenbart werde, und letztere wartet auf die SOHNSCHAFT in GEDULD.

Il MONDO e la CHIESA si attendono l'un l'altra. Il primo aspetta che la seconda si manifesti, e la seconda attende la FIGLIAZIONE, mediante la PAZIENZA.

The WORLD and the CHURCH are watching one another. The world is waiting for the Church to make itself known, and the Church awaits the SONSHIP of God with PATIENCE.

Le MONDE et l'EGLISE s'observent. Le premier attend que la deuxième se manifeste, et la deuxième attend l'ETAT DE FILS, par la PATIENCE.

El MUNDO y la IGLESIA se aguardan mutuamente. El primero aguarda a que la segunda se pronuncie, y la segunda espera la FILIACIÓN por medio de la PACIENCA.

Ermuntert die BIBEL tatsächlich zur SORGE FÜR DIE UMWELT ? Der Verfasser kommentiert den Text LUKAS 16,1-13. Möglicherweise ermuntert er zur HILFE FÜR DIE ARMEN.

La BIBBIA spinge davvero all'IMPEGNO ECOLOGICO ? L'autore commenta il testo di LUCA 16:1-3. Forse esso raccomanda l'AIUTO AI POVERI.

Does the BIBLE really provoke a CONCERN FOR ECOLOGY ? The author comments on the text in LUKE 16:1-13. It possibly provokes us to give HELP TO THE POOR.

La BIBLE incite-t-elle vraiment au SOUCI ECOLOGIQUE ? L'auteur commente le texte de LUC 16:1-13. Il incite peut-être à l'AIDE AUX PAUVRES.

La BIBLIA ¿incita verdaderamente a la PREOCUPACIÓN ECOLÓGICA ? El autor comenta el texto de LUCAS 16:1-13; el cual quizás instiga a la AYUDA A LOS POBRES.

GISHRON (Jeremi). - *La jubilea sistemo.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 2, 1987, pp. 25-31.

En la TORAO troviĝas instruoj pri la SABATA JARO (ŝmita) kaj pri la JUBILEO. Kio estas la ETIMOLOGIO de la du vortoj ? Ili devis efektiviĝi en la PROMESITA LANDO. Kiel apliki ilin nun ? OBSERVANTOJ organiziĝas en ISRAELO.

BAKLARZ (Karol). - *La naturo en Apokalipso.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 2, 1987, pp. 33-40.

De APOKALIPSO oni povas fari LAŬLITERAN INTERPRETON kaj/aŭ SIMBOLAN INTERPRETON, same de la ELEMENTOJ EL LA NATURO. La aŭtoro simbole interpretas kelkajn el ili.



In der TORAH finden sich Anweisungen über das SABBATJAHR (schmita) und über das ERLASSJAHR. Was ist die ETYMOLOGIE der beiden Wörter ? Sie sollten im VERHEISSENEN LAND zur Anwendung kommen. Wie soll man sie heute durchführen ? In ISRAEL bilden sich Gruppen zu ihrer ENNHALTUNG.

Nella TORAH si trovano istruzioni sull' ANNO SABBATICO (šmita) e sul GIUBILEO. Qual'è l'ETIMOLOGIA delle due parole ? Si dovevano praticare nella TERRA PROMESSA. Come applicarli ora ? In ISRAELE gli OSSERVANTI si organizzano.

In the TORAH are teachings about the SABBATICAL YEAR (shmita) and the JUBILEE. What is the ETYMOLOGY of these two words ? They were to be applied in the PROMISED LAND. How can we apply them now ? OBSERVERS get organised in ISRAEL.

Die OFFENBARUNG erlaubt eine WÖRTLICHE DEUTUNG und/oder eine SYMBOLISCHE DEUTUNG, ebenso die darin vorkommenden ELEMENTE DER NATUR. Der Verfasser deutet einige davon symbolisch.

Dell'APOCALISSE si può dare una INTERPRETAZIONE LETTERALE e/o una INTERPRETAZIONE SIMBOLICA ; lo stesso si può fare degli ELEMENTI DELLA NATURA. L'autore ne interpreta simbolicamente alcuni.

It is possible to study REVELATION with a LITTEAL INTERPRETATION and/or a SYMBOLIC INTERPRETATION, the same as NATURAL ELEMENTS. The author interprets several of these symbolically.

Dans la TORAH se trouvent des enseignements sur l'ANNEE SABBATIQUE (shmita) et le JUBILE. Quelle est l'ETYMOLOGIE des deux mots ? Ils devaient être appliqués dans la TERRE PROMISE. Comment les appliquer maintenant ? Les OBSERVATEURS s'organisent en ISRAEL.

En la TORÁ se hablan enseñanzas sobre el AÑO SABÁTICO (shmita) y sobre el JUBILEO. ¿Cuál es la ETIMOLOGÍA de las dos palabras ? Habían de tener lugar en la TIERRA PROMETIDA. ¿Cómo aplicarlas al presente ? Los OBSERVANTES se organizan en ISRAEL.

De l'APOCALYPSE il est possible de faire une INTERPRETATION LITTERALE et/ou une INTERPRETATION SYMBOLIQUE, de même pour les ELEMENTS DE LA NATURE. L'auteur en interprète symboliquement quelques uns.

Del APOCALIPSIS, se puede hacer una INTERPRETACIÓN LITERAL y/o una INTERPRETACIÓN SIMBOLICA, y lo mismo de los ELEMENTOS DE LA NATURALEZA. El autor interpreta simbólicamente algunos de ellos.

KOOPMANS-SCHOTANUS (Jelly). - *La moderna homo inter ekologio kaj ekonomio.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 2, 1987, pp. 41-45.

Kio estas MODERNA HOMO ? EKONOMIO DE LA SUFIĈO kaj EKOLOGIA ZORGO bone kunvivas. Kiel statas la KRISTANOJ ?

ELLUL (Jacques) (intervjuo). - *La teknikista kaptilo.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 2, 1987, pp. 47-54.

La TEKNIKA PROGRESO estas evidenta, sed ĝi implicas KOSTON kaj KONTROLOn. Oni deziras havi FACILAN VIVON. Oni devus reloĝigi la KAMPARON. Pri ĉio tio, per la BIBLIO, la KRISTANO devas konsciiĝi kaj lukti.

Was ist ein MODERNER MENSCH ? Eine WIRTSCHAFT DER GENÜGSAMKEIT und UMWELTSCHUTZ passen durchaus zusammen. Wie steht es mit den CHRISTEN ?

Che è l'UOMO MODERNO ? ECONOMIA DELLA SUFFICIENZA ed IMPEGNO ECOLOGICO possono ben convivere. A che punto si trovano i CHRISTIANI ?

What is MODERN MAN ? A NO-GROWTH ECONOMY fits in well with a CONCERN FOR ECOLOGY. What is the position of CHRISTIANS ?

Qu'est ce que l'HOMME MODERNE ? L'ECONOMIE DE LA SUFFISANCE et le SOUCI ECOLOGIQUE vont bien ensemble. Comment se situent les CHRETIENS ?

¿ Qué es un HOMBRE MODERNO ? ECONOMÍA DE LA SUFICIENCIA y PREOCUPACIÓN ECOLÓGICA pueden convivir fácilmente. ¿ Qué tal los CRISTIANOS ?

Der TECHNISCHE FORTSCHRITT ist offenkundig, fordert jedoch auch KOSTEN und ÜBERWACHUNG. Man möchte ein LEICHTES LEBEN haben. Man sollte wieder aufs LAND ziehen. Der CHRIST muß sich das mit der BIBEL bewußt machen und dafür kämpfen.

Il PROGRESSO TECNICO è evidente, ma esso implica COSTI et CONTROLLI. Si vuole una VITA FACILE. Occorrerebbe ripopolare le CAMPAGNE. Il CRISTIANO, sulla base della BIBBIA, dovrebbe coscientizzarsi e lottare per tutto questo.

TECHNOLOGICAL PROGRESS is obvious, but implies a COST and a CONTROL. People want an EASY LIFE. The COUNTRYSIDE must be repopulated. The CHRISTIAN with a BIBLE must be aware of and fight for this.

Le PROGRES TECHNIQUE est évident, mais il implique un COUT et un CONTROLE. On désire avoir une VIE FACILE. On devrait repeupler la CAMPAGNE. Sur tout ceci, par la BIBLE, le CHRETIEN doit prendre conscience et lutter.

El PROGRESO TÉCNICO es evidente, pero impone COSTES y CONTROL. Se desea tener una VIDA FÁCIL. Habría que hacer volver de nuevo a la vida en el CAMPO. Acerca de todo esto, y por medio de la BIBLIA, el CRISTIANO ha de concienciarse y luchar.

GESSNER (Otto). - *Kristana influo en la germana ekologiisma movado.*

*Evangeliaj Kajeroj, 2, 1987, pp. 55-59.*

La aŭtoro priskribas la HISTORION de la EKOLOGIISMA MOVADO en F.R. GERMANUJO, en kiu KRISTANOJ, kiuj devus havi EKOLOGIAN ZORGON, malmulte partoprenas. La EKLEZIOJ produktis TEKSTOJN, kiuj proponas novan ETIKON.

○

MULLARNEY (Maire). - *Kristano kaj verdulo.*

*Evangeliaj Kajeroj, 2, 1987, pp. 61-64.*

Kial ne pli da samtempe KRISTANOJ kaj VERDULOJ ?

○

Se vi posedas tiun ĉi revuon, aŭ alian numeron, ne pere de abono, bonvolu indiki tiun ĉi posedon al la administracio, tiel vi povos esti pli bone informita.

Der Verfasser beschreibt die GESCHICHTE der UMWELTBEWEGUNG in B. R. DEUTSCHLAND, an der CHRISTEN, die sich doch um den UMWELTSCHUTZ kümmern müsten, wenig Anteil haben. Die KIRCHEN haben TEXTE erstellt, in denen eine neue ETHIK vorgeschlagen wird.

L'autore descrive la STORIA del MOVIMENTO ECOLOGICO nella R. F. DI GERMANIA, nel quale i CRISTIANI, che pure dovrebbero avere un IMPEGNO ECOLOGICO, partecipano scarsamente. La CHIESE hanno prodotto TESTI che propongono una nuova ETICA.

The author describes the HISTORY of the ENVIRONMENTAL MOVEMENT in WEST GERMANY. CHRISTIANS, who ought to have a CONCERN FOR ECOLOGY, have taken little part in it. The CHURCHES have produced TEXTS for a new ETHIC.

L'auteur décrit l'HISTOIRE du MOUVEMENT ECOLOGISTE en ALLEMAGNE FEDERALE, dans lequel les CHRETIENS, qui devraient avoir un SOUCI ECOLOGIQUE, participent peu. Les EGLISES ont produit des TEXTES, qui proposent une nouvelle ETHIQUE.

El autor describe la HISTORIA del MOVIMIENTO ECOLÓGICO de la ALEMANIA FEDERAL, en el cual los CRISTIANOS, que deberían sentir una PREOCUPACIÓN ECOLÓGICA, tienen escasa participación. Las IGLESIAS han dado a conocer TEXTOS que proponen una nueva ÉTICA.

Warum gibt es nicht mehr Menschen, die zugleich CHRISTEN und GRÜNE sind ?

Perchè non un maggior numero di CRISTIANI e VERDI contemporaneamente ?

Why are there not more people who are both CHRISTIANS and GREENS ?

Pourquoi n'y a-t-il pas plus de gens à la fois CHRETIENS et VERTS ?

¿ Por qué no más personas que sean a la vez CRISTIANOS y VERDES ?

COUSSON (Philippe). - *Sinteno al la naturo - kultura fenomeno.*

*Evangeliaj Kajeroj*, 2, 1987, pp. 65-69.

La KULTURO, kolektiva aĵo, koncernas ankaŭ la SINTENOn al la NATURO. La EKOLOGIA KRIZO kaŭzis ŜANĜOjn, ankaŭ ĉe la KRISTANOj.



Die KULTUR als kollektive Erscheinung betrifft auch die EINSTELLUNG zur NATUR. Die UMWELTKRISE hat zu VERÄNDERUNGEN geführt, auch bei den CHRISTEN.

La CULTURA, retaggio collettivo, riguarda anche l'ATTEGGIAMENTO verso la NATURA. La CRISI ECOLOGICA ha causato CAMBIAMENTI, anche presso i CRISTIANI.

CULTURE, a collective thing, concerns itself also with the ATTITUDE to NATURE. The ECOLOGICAL CRISIS has caused CHANGES also among CHRISTIANS.

La CULTURE, chose collective, concerne aussi l'ATTITUDE envers la NATURE. La CRISE ECOLOGIQUE a causé des CHANGEMENTS, aussi chez les CHRETIENS.

La CULTURA, cosa colectiva, se extiende también a la ACTITUD para con la NATURALEZA. La CRISIS ECOLÓGICA ha producido CAMBIOS, también entre los CRISTIANOS.

## ABONOJ

Abono por du numeroj, t.e. unu jaro : 70 FRF (ECU 10)  
(Vi nepre indiku por kiu jaro aŭ ekde kiu numero).

al Philippe Cousson, Rue de Pré Ventenet, 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio.

per poŝta konto, Philippe Cousson, 244 45 X, Limoges, Francio,  
aŭ per internacia poŝta mandato en FRF,  
aŭ per 16 internaciaj respondkuponoj.

aŭ al Aŭstrujo, Heinz Platzer, Brünnerstr. 107-109/2/1, 1210 Wien  
ÖPSK-konto 3675.724, Heinz Platzer

Belgio, Jacques Lemaire, r. des déportés 100, 6180 Courcelles  
konto 001-0405933-64

Britio, Thomas Neil, 82 Glasgow Rd, Kilmarnock, KA3 1UN  
national giro, FEBC, 65274 0006

F.R. Germanio, Sr Theotima Rotthaus, 7794 Wald

Sparkasse Meßkirch K-tonummer 9434, BLZ 693 520 60

Irlando, Maire Mullarney, Mill H., Whitechurch Rd, Rathfarnham,  
Dublin 14

Israelo, Esperanto Centro, P.O. Box 23 180, 91231 Jerusalem

Italio, Centra Oficejo de IKUE, v. F. Berni 9, 00185 Roma

CCP, Centra Oficejo de IKUE, 23290000

Nederlando, Leen Hordijk, v. Hogendorplaan 4, 3135 CD Vlaardingen  
post giro, KELI, 5506132

Svedio, Gustav Stenholm, Domprostgatan 18 B, 532 31 Skara

poŝtĝirkonto, Kristliga Esperantoförbundet, 9 14 39-0

Svislando, Lina Reutemann, Iddastr. 34, 9008 St Gallen

poŝta ĉekkonto, KELI svisa sekcio (Z en), 80-52203-8, Zürich

Usono, Edwin C. Harler Jr, 47 Hardy Rd, Levittown, Pa 19056

aŭ al UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ  
Rotterdam, Nederlando, pere de la konto phco-m.  
(vidu en la jarlibro 1989, ĉe la paĝo 34)

Ni daŭre serĉas perantojn en aliaj landoj.

Vi kompreneble povas donace aboni iun alian, kiu cetere havus problemon por sin aboni.

## ARTIKOLOJ

Antoni Paweł TABACKI : La naturo en la Biblio - Akvo	3
Mervyn C. JACKSON : Homa respondeco pri la klimato ?	9
KNÁVER Zoltán : La sopiro de la kreitaro - Rom 8:19-22	15
Gerrit BERVELING : La malbona administranto	21
Jeremi GISHRON : La jubilea sistemo	25
Karol BAKLARZ : La naturo en Apokalipso	33
Jelly KOOPMANS-SCHOTANUS : La moderna homo inter ekologio kaj ekonomio	41
Jacques ELLUL (intervjuita) : La teknikista kaptilo	47
Otto GESSNER : Kristana influo en la germana ekologiisma movado	55
Maire MULLARNEY : Kristano kaj verdulo	61
Philippe COUSSON : Sinteno al la naturo - kultura fenomeno	65

## RECENZOJ

Cornelius MCKOWN : SCHAEFFER : Pollution and the death of man	71
Philippe COUSSON : La planète bleue	74
Doug PORTMANN : GUINNESS : The gravedigger file	76
Philippe COUSSON : el revuoj	78

## KONTRIBUAĴOJ

Edwin C. HARLER : La kristano kaj la ekologio	81
Gerrit BERVELING : Kelkaj bibliaj rimarkigoj	83
Godwin I. OBOH : Afrika vidpunkto al la naturo	85
E! leteroj	87

prezo : 30 FRF